

# IL POPOLO CINIO

中国报道

9 1987





*Arda amo*

Foto de LIŪ SIGONG

## Enhavo

Ĉina oceana trafiko en miaj okuloj . . . . .	2
VOJAĜO LAŬ JANGZI-RIVERO (9): Ambaŭborde de Ĝinŝa-rivero . . . . .	62
Vizito en Ŝanŝji-provinco . . . . .	9
<b>JUBILEA JARO DE ESPERANTO:</b>	
Miaj spertaĵoj en lernado de Esperanto . . . . .	12
Wong Kenn, pioniro de la ĉina Esp-movado . . . . .	15
“La Espero” sonu tra la mondo de la juna generacio . . . . .	17
Kie estas la denaskaj esperantistoj? . . . . .	18
ESP-NOVAĴOJ . . . . .	20
POR KOMENCANTOJ: Plumoj de birdoj . . . . .	32
Vilaĝa orkestro sensacia en Pekino . . . . .	30
La Pekina Infana Piedpilka Lernejo . . . . .	33
NOVELO: Kanto-stelulo migranta inter kafejoj (Dua parto) . . . . .	35
<b>ĈINA LITERATURO:</b>	
Taŭ Jŭanming . . . . .	39
Du verkaĵoj de Taŭ Jŭanming . . . . .	42
<b>ĈINAJ ARTOJ: Ĉina kaligrafio . . . . .</b>	
Diskuto pri edzeco kaj familio . . . . .	52
Nacimalplimulto lerta en kantado . . . . .	55
<b>TRA NIA LENSŬ: Fotado, ŝatokupo disvastiĝanta en la ĉina kamparo . . . . .</b>	
Rakonto pri la libro “Ji Ĝing” kaj ĝia aŭtoro . . . . .	57
Prifosado de la kulturo de la Okcidenta Ŝja . . . . .	48
Gardi arbaron kontraŭ incendio . . . . .	60
<b>ENCIKLOPEDIETO DE ĈINIO: Abako — antikva kalkulilo de Ĉinio . . . . .</b>	
AMUZO . . . . .	51
KURANTAJ AFEROJ . . . . .	70
KORESPONDI DEZIRAS . . . . .	14, 61
SUR LA KOVRILO: Gajaj infanoj (Ĝenro pri taj-nacieco)	de <b>GOŬ SIŬĈING</b>
INTERNE DE LA KOVRILO: Arda amo	Foto de <b>LIŬ SIGONG</b>
INTERNE DE LA DORSKOVRILO: ĈINAJ POŝTMARKOJ	
SUR LA DORSKOVRILO: Liĝjang-rivero en subiranta suno	Foto de <b>ZENG ŜJANGMIN</b>

JARABONTARIFO		Britio	£	8.00	Japanio	Yen	3000	Svisio	SF	25.00	
Aŭstralio	\$A	14.00	Finnlando	Fmk	64.00	Jugoslavio	Din.	500	Usono	US\$	12.00
Aŭstrio	Sch	200	Francio	FF	90.00	Nederlando	Gld.	34.00	Kanado	Can\$	13.00
Belgio	BF	550	Hispanio	Ptas	1200	Nov-Zelando	NZ\$	20.00			
FR Germanio	DM	30.00	Italio	Lit	18000	Portugalio	Esc	1100			
Por aliaj landoj en Eŭropo: £ 8.00 US\$ 10.00 Por aliaj landoj en Azio, Afriko kaj Latin-Ameriko: £ 5.00 US\$ 6:50											

# ĈINA OCEANA TRAFIKO EN MIAJ OKULOJ


Antaŭ 10 jaroj mi estis maristo. Mi scias, ke por navigado oni devas ne nur batali kun furiozaj ondoj, sed ankaŭ elteni longan izolitecan vojaĝon: sube estas senlima maro kaj supre la vasta firmamento. Tage kaj nokte oni aŭdas nur muĝadon de maro kaj monotonan bruadon de la ĉefmaŝino de la ŝipo. Dum 10 — 20 tagoj oni renkontas neniun marbirdon por ne paroli pri patrolanda ŝipo. Kvankam mi jam forlasis la ŝipon, tamen mi ankoraŭ laboras en oceanrafika


departemento, ĉar tia izoliteca marista vivo ne rompis mian profundan amon al marnavigado.

Lastatempe mi iris al haveno por adiaŭi miajn baldaŭ navigontajn amikojn. Kiam mi pensis pri ilia longa vojaĝo kaj netolerebla izoliteco sur la maro, la adiaŭa sento kaptis min. Tamen miaj amikoj gaje interparolis, montrante nenan malĝojon. Ili ridis je mia superflua tristo.

Fakte, mi bone konas la progreson de la ĉina oceanrafiko en la lastaj 10 jaroj kaj la ŝan-

*Ĉina kargoŝipo plensarĝita*





*Interkonsiliĝo pri naviglinio*

ĝon de la marista vivo kaŭzitan de tiu progreso. Sed antaŭe la malprospera navigacio profunde gravuriĝis en mia memoro. Mi memoras, ke antaŭ la 70-aj jaroj nur dekoj da ĉinaj ŝipoj veturadis sur oceano. Tiam mankis varoj, malmultis profundaj ankrejoj, malnoviĝis porŝarĝaj instalaĵoj kaj iuj havenoj ankoraŭ dependis de korpa laboro, tial iuj ŝipoj longe restis en ankrejo por atendi varojn, aliaj atendis ankradon kaj malŝarĝadon, kaj triaj bezonis riparon. Nur dekelkaj ŝipoj veturis sur maro.

Hodiaŭ la afero estas tute alia. Post 1979 la ĉina oceanrafiko ricevis reformadon en administrado kaj paŝon post paŝo suriris la ĝustan vojon. La nombro de la oceanrafikaj entreprenoj kreskis de 4 al 81, kun pli ol 1 200 oceanŝipoj havantaj totalan ŝarĝkapaciton de pli ol 17 milionoj da tunoj. La ĉinaj ŝipoj eniri en la unuan vicon en la mondo laŭnombre kaj ĝia totala tonelaro okupas la 9-an lokon. La ĉina oceana floto

el varŝipoj disvolviĝis en tiun el rulkargoŝipoj, kontenerŝipoj, fridigaj ŝipoj, ŝipoj por diversaspecaj varoj, lozkargoŝipoj, cisternŝipoj, barĝoj kaj luksaj pasaĝerŝipoj. Tiuj ŝipoj navigas inter pli ol 400 havenoj de pli ol 150 landoj. Ilia navigmapo imagigas, kiom pezan taskon ili devas plenumi.

Lastajn jarojn, multe ŝanĝiĝis la teknika strukturo de la ĉina oceana floto. Rapide kreskis la kvanto de kontenerŝipoj, rulkargoŝipoj kaj aŭtomaciaj ŝipoj. La tro malnovaj ŝipoj estas ne plu uzataj. Multe mallongiĝis la ŝiprestada tempo en haveno pro multiĝo de profundaj ankrejoj, moderniĝo de ŝarĝaj kaj malŝarĝaj instalaĵoj kaj multiĝo de retoj de kunordigita kaj pera transportadoj kaj de konservejoj, tenejoj kaj specialaj aŭtoj por konteneroj. Antaŭ pli ol 10 jaroj iom pezan kaj grandan varon oni ne povis elŝipigi. La ŝarĝitaj ŝipoj devis resti en ankrejo 20—30 tagojn. Sed nun ne nur varo dekojn da tunoj

peza, sed eĉ kompleto da instalaĵoj pli ol cent tunojn peza povas esti facile elŝipigita per granda grupo. Antaŭe oni ŝultre kaj mane elŝipigis lozajn varojn. Por elŝipigi pli ol 15 000 tunojn da loza sukero estis bezonataj ĉ. 100 personoj kaj 30 — 40 tagoj. Sed nun nur 5—6 tagoj jam sufiĉas por plenumi tian taskon per maŝino.

Holdo kaj konteneroj estas granda ŝanĝo sur ŝipo. Antaŭe Ĉinio eksportis nur arakidon, melonsemon, abrikotajn kernojn kaj pajlajn produktaĵojn. Ili estis ne multe kostaj kaj malfacile transporteblaj. Malgraŭ ke vi rompis al vi la kapon, la centro de gravito de ŝipo ankoraŭ estis alta. Kiam leviĝis ventego kaj ondegos, ŝipo forte tangis. Pro tio ŝipanoj apenaŭ povis sin teni stabile. Eĉ la kvanto de tiuj eksportaĵoj estis limigita, multaj ŝipoj ekveturis duonŝarĝite.

Nun la holdoj de oceanŝipoj estas plenaj de tekstilaĵoj, vestoj, maŝinoj, diversaj aŭtoj, metiartaĵoj, elektraj aparatoj, ĉinaj kaj okcidentaj muzikiloj, fridigitaj manĝaĵoj, fruktoj, legomoj, envazaj florplantoj ktp. Pro facila akirebleco de varoj, multeco de iliaj specoj kaj rapideco de ilia kolektiĝo, ŝipoj ne plu longe restas en ankrejo por atendi varojn.

La disvolviĝo de mara transportado baziĝas sur la ĉiuflanka disvolviĝo de la naci-ekonomiaj branĉoj, kiaj industrio, agrikulturo, energio kaj ŝipkonstruado. La cirkulado kaj konsisto de varoj spegulas la disvolviĝon de la ŝtata produktiva kapablo. En la 60-aj jaroj la enlandaj varoj de Ĉinio estis transportataj ĉefe per luitaj ekster-


landaj ŝipoj kaj ĉinaj ŝipoj transportis nur 1%. En la 70-aj jaroj la procentaĵo kreskis al 23%. Kaj nun ĝi jam superis 60%. La ĉefa kialo de rapida kresko estas la ĉiuflanka disvolviĝo de la nacia ekonomio post la ekonomia reformado de Ĉinio.

Pro la rimarkinda ŝanĝiĝo la ĉina oceana trafiko akceptas formon de regula transportado laŭ la internaciaj normoj. Regula transportado estas karakterizita per fiksitaĵoj kurso, ankrejo, tempo, ŝipo kaj varospeco, tial ŝipoj navigas akurate. Ĉinaj ŝipoj tenas la principon meti la varposedantojn kaj sian honoron sur la unuan lokon kaj servas bone, rapide kaj kontentige, tial ili ĝuas prestiĝon inter la kolegoj kaj klientoj. Nun ĉiumonate funkcias 89 kursoj sur 37 naviglinioj al la okcidenta kaj norda Eŭropo, suda kaj norda bordoj de Mediteraneo, orienta kaj okcidenta Afriko, Persa Golfo, Aŭstralio, Usono, Kanado, Japanio kaj sudorienta Azio. Krome, en la lastaj jaroj Ĉinio vaste kunlaboris en oceanrafiko kun aliaj landoj kaj organizis 14 navigaciajn entreprenojn kune administratajn de Ĉinio kaj aliaj landoj. Tiuj entreprenoj estas en Nederlando, Belgio, FR Germanio, Norvegio, Usono, Aŭstralio, Kenjo, Japanio, Tajlando kaj Hongkongo, Tial, kien ajn tiuj ŝipoj navigas, la ĉinaj ŝipanoj povas renkonti ne nur kolegojn de sia lando, sed ankaŭ sincerajn kunlaborantojn de aliaj landoj. Ili ne plu tediĝas de longa marnavigado. □

\* La aŭtoro estas laboranto de la Oceanrafika Kompanio de Ĉinio.




Telekomunikado sur oceanŝipo



*Ôina kargoôipo en navegado*




*En stirejo*



*Kajuto por tele-  
komunikado sur  
oceanŝipo*








*Parto de la haveno de Ljanjungang* Foto de JAN ĜIN

*Kontenera kajo de la haveno de Ŝanhajo* Foto de ZENG ŜJANGMING





*Cina kargoŝipo en fremdlanda haveno*

# Vizito en Ŝanŝji-provinco

Majon de la kuranta jaro mi faris plezuran vojaĝon en Ŝanŝji-provinco laŭ invito de ĝia turisma departemento.

La 13-an mi trajne veturis de Pekino al mia unua etapo, la urbo Datong kun longa historio. Frumatene en la dua tago mi atingis la lokon, kie sidas Jungangŝtonkavernaro, unu el la tri grandaj ŝtonkavernaroj de Ĉinio, kaj famaj historiaj vidindejoj Hŭajan-templo, Ŝanhŭa-templo kaj Naŭdraka Ekranmuro.

Hŭajan-templo konstruiĝis en Ljaŭ-dinastio (907 — 1125 p.K.), kiu konsistas el la supra kaj malsupra partoj kaj ricevis la nomon pro tio, ke ĝi apartenas al la hŭajan-a sekto de budhismo. Kiam mi estis tie, la malsupra parto estis riparata kaj jam de longe ne akceptis turistojn. Kiam laboranto malfermis la grandan pordon de Mahavira halo, min atakis malseka nebulo kaj malvarmeto. Enirinte la halon, mi tuj dronis en granda miro: tie kuŝas giganta altaro ore brilanta, en ĝia mezo majeste sidas tri gigantaj koloraj budhostatuoj, ĉirkaŭ kiuj estas 28 kolore modlitaj servantoj-bodisatvoj kaj infanoj. Ŝajnas, ke ili aŭskultas rakonton pri sutro kaj budhisma doktrino kun diversaj vizaĝaj esprimoj: Ili mienas nature, absorbiĝe, pripenseme kaj rideme. Kvankam iliaj vestoj iom senkoloriĝis pro incensa fumatako dum multaj jaroj, tamen admirindaj senescepte estas iliaj plenaj korpoj, graciaj konturoj kaj aliaj. Mi

ne kredas je budhismo, tamen mi ne povis ne admiri la budhostatuojn antaŭ mi. Ili estas valoraĵoj en arta palaco, pli ol statuoj adorataj. Inter la kolore modlitaj figuroj estas tre versimila servanto-bodisatvo, kiu nudpiede kaj iom kliniĝe staras sur lotusforma altaro, kun iom nuda

korposupro, rondaj vangoj, malsupren rigardantaj okuloj, duonmalfermita buŝo kaj kunmetitaj manplatoj, kaj estas hontema, kvazaŭ belaĝa junulino. Oni nomas ĝin bodisatvo kun kunmetitaj manplatoj kaj montriĝintaj dentoj, kiu estis tre ŝatata de la turistoj en kaj eksterlandaj.

*Kolora statuo de bodisatvo en Hŭajan-templo*



Poste, ankaŭ en aliaj temploj de Ŝanŝji mi vidis similajn kolore modlitajn figurojn. Por diri sincere, se mi ne propraokule vidus tion, mi certe ne kredus, ke en Ŝanŝji troviĝas jam tiom da senkompare belaj statuoj.


En la urbo mi vizitis ankaŭ la Datong-an Lokomotivan Fabrikon, unu el la malmultaj vaporlokomotivaj fabrikoj en Ĉinio. Krom vaporlokomotivoj, la fabriko produktas ankaŭ alispecajn lokomotivojn. La vaporlokomotivoj altiras al si multajn eksterlandajn amikojn, ĉar ili jam tute ne aŭ malofte videblas en iuj landoj de la mondo. Precipe la turistoj, kiuj funkciis kiel lokomotivestroj, certe vizitis la fabrikon, kiam ili restis en Datong. Multaj el ili ĝoje ascendis la lokomotivon, pretigitan de la fabriko por ili, hejtis ĝin kaj sonigis la sirenon. Kaj la fabriko donis al ili honoran ateston. Mi ekhavis la feliĉon, ke la okazo venis al mia nazo! Kiam mia lokomotivo malrapide eliris el la parko, kun granda ĝojo mi forte piedpremis la sirenon, kies bruo

forte zumis ĉe miaj oreloj. Tiam mi estis tre ĝoja, ke mi la unuan fojon veturigis lokomotivon.

Foririnte de Datong mi ekvojaĝis suden. Dumvoje mi vizitis Ŝjŭankong-templon en Hengŝan-monto, lignan pagodon en Jingŝjan-gubernio, poste la templaron en Tajhŭaj-urbeto en Utaj-montaro kaj fine atingis Tajjŭan, la ĉefurbon de Ŝanŝji-provinco. En ĝi ne mankas historiaj vidindejoj. Laŭ statistiko de koncerna fako, tie la konstruaĵoj faritaj antaŭ Ljaŭ-dinastio kaj Ĝin-dinastio (1115 — 1234 p.K.) konsistigas pli ol 70% de la totala nombro de tiuj en la tuta lando. Ankaŭ originalaj estas la lokaj moroj kaj kutimoj. Tie abundas la rezervo de bonkvalita karbo. Per nur kelkaj paperpecoj oni povas bruligi la karbon, kio rapidigas manĝo-preparadon kaj akvoboligon. En Ŝanŝji oni uzas karbon kiel hejtaĵon, tial ĉu kabanoj, ĉu etaĝdomoj, ĉiuj havas brikan fumtubon sur tegmento. Se oni de alte rigardas foren, oni vidas nur dense starantajn fumtubojn, kio prezentiĝas tre interesa

spektaklo. La Ŝanŝji-anoj ŝatas uzi vinagron. Humuraĵo diras, ke lokaj armeanoj kaptitaj en milito preferis fordoni sian armilon ol sian vinagrujon. Kial la milito preferis fordoni sian armilon ol sian vinagrujon. Kial la Ŝanŝji-anoj ŝatas manĝi vinaĝron? Iuj diras, ke vinaĝro estas kontraŭkancera, apetitiveka, beliga kaj saniga, aliaj diras, ke pro tromalriĉeco la Ŝanŝji-anoj havis antaŭe nesufiĉe da spicaĵoj, sed nur malmultekostan vinaĝron. Mi informiĝis, ke ankoraŭ en la periodo de Printempo kaj Aŭtuno (770-476 a.K.) la vinaĝraj metiejoj jam vidiĝis ĉie en la regiono de Tajjŭan. La nuna Ĉingŝju-a Vinaĝra Fabriko ĉe Tajjŭan konstruiĝis surbaze de malgrandaj vinaĝraj metiejoj. La vinaĝro produktita de la fabriko estas fama en- kaj eksterlande. Ĝi estas negranda, kaj en ĝi regas pureco kaj bonordeco. En la vasta korto de la fabriko mi vidis vicajn da vazegoj. Laboristoj konigis al mi: La ŝlosila procedo de vinaĝroproduktado estas trakti duonpretan vinaĝron

### *Plezurŝipo sur la Flava Rivero*



en vazego. Oni devas sunumi ĝin en somero kaj elpreni glacieron el ĝi en vintro por kiel eble plej grandkvante vaporigi ĝian akvon. Post filtrado kaj sterilizado produktiĝas plej bonkvalita vinagro. Ordinare, post tiuj procedoj el 250 kg. da duonpreta vinagro oni ricevas 100 kg. da matura vinagro, kiu havas eksterordine agrablan guston. Mi informiĝis, ke inter la laboristoj de la vinagra fabriko neniu suferis kanceron, eĉ tre malmultaj malvarmumon. Tial, antaŭ manĝo mi ĉiam trinkas iom da vinagro.

Suden vojaĝinte de Tajjŭan mi atingis Linfen-regionon. Kvakam Ŝanŝji kuŝas sur Leŭsa Altebenaĵo, tamen tie videblas nek diktavola leŭso nek araneaje kruciĝantaj valoj. Antaŭ mi prezentiĝas nur kampara pejzaĝo. La loko estas grenodona regiono de Ŝanŝji. Jam en la tria tagdeko de majo ondis ora tritiko sur la vasta ebenaĵo. En la sunbrilo prosperis vicoj post vicoj da verdaj poploj meze de la tritikaj kampoj.


Mi ne povis ne prokrasti vojaĝi al la Hukoŭ-a Akvofalo de la Flava Rivero en Ĝjiŝjan-gubernio, pro pluvego, post kiam mi atingis Linfen. La akvofalo prezentas mirindan spektaklon en la meza baseno de la Flava Rivero. Oni diras, ke kiam la Flava Rivero fluas tra la loko, la akvo abrupte enfluas en la riverujon 20-30 metrojn larĝan kaj falas kiel el beko de kruĉo, tial la akvofalo ricevis la nomon. Ĝi havas nivel-diferencon de ĉ. 30 metroj kaj la plej grandan larĝecon de pli ol 1 000 metroj. Tre bedaŭrinde, mi ne rigardis la akvofalon dum la restado en Linfen.

En la dua tago ĉesis la pluvo kaj mi daŭrigis mian vojaĝon. Hukoŭ distancas de Linfen je


170 km. Tie plejparte estas montvojo. Post pli-ol-3-hora veturado mi atingis la bordon de la Flava Rivero kaj jam aŭdis tondran bruon je 1 km. for de la akvofalo. Proksime de ĝi, mi vidis, ke la torenta rivero kirlige sin jetas en la profundan lagon kaj kun altaj kolonoj kaj disŝprucanta blanka ŝaŭmo fluas foren.

De miloj da jaroj ni ĉina nacio vivas en la sino de la Flava Rivero, kiu nutras nin kaj donas al ni neelĉerpeblan forton. Kiel filino de la Flava Rivero mi sentas la patrinon granda kaj tenera kun forto nerezistebla. Mi prifieras nian nacion kaj la patrinon Flava Rivero. Tiam, mi staris ĉe la patrino kaj ne volis foriri de ŝi. Mi havis multe por diri, tamen mi ne povis diri eĉ unu vorton pro emociiĝo.

Forlasinte Hukoŭ, kun granda kortuŝeco mi atingis Dajudu de la urbo Junĉeng en suda Ŝanŝji. Tie mi ekveturis per la plezurboato "Granda Flava Rivero" nove farita, bela kaj komforta, kiu jam akceptis nemalmultajn turistojn en- kaj eksterlandajn. Tie malrapide fluas la Flava Rivero kaj larĝiĝas ĝia surfaco, kio plezurigas la turistojn. En la kajuto mi libervole rigardis ambaŭbordajn pejzaĝojn. En la malproksimo alta leŭsa klifo ŝirmas ĉion kaj faras la Flavan Riveron mistera regno en la leŭsa riverujo. Ambaŭborde de la Flava Rivero sterniĝas peco post peco da kampoj, sur kiuj laboras junuloj kaj junulinoj en brile ruĝaj vestoj. La riverakvo tie estas ne tiom malklara. Oni diris, ke tio okazis pro la akvorezervado de la Sanmenŝja-a Akvokonservejo de la Flava Rivero. Mi ne volis scii la kialon, mi volis nur senvorte rigardi, cerbumi kaj ĝui la amon de la patrino Flava Rivero en ŝia sino. □



*Ligna pagodo en Ĝjiŝjan-gubernio*



*Akvofalo de Hukoŭ*

# Miaj spertaĵoj en lernado de Esperanto

de CHUN-CHAN YEH\*

Mi devenis de kamparana familio en izolita montvilaĝo, proksime de Jangzi-rivero, meze de Ĉinio, kaj tute ne sciis, kio estas Esperanto. En 1929 mi venis al Ŝanhajo, la plej granda komerca urbo de Ĉinio siatempe. Sed la urbo estis koncesiita al japanaj, francaj kaj alilandaj imperiistoj kaj tie la ĉina registaro ne rajtis praktiki sian suverenecon. Mia koro estis peze premata kaj mi sentis ian pereon de la ŝtato. Ĝuste tiam mi eksciis la ekziston de la lingvo Esperanto kaj reflamiĝis en mi ia malgranda espero.

En la komenco de 1931, kiam mi lernis en mezlernejo, mi interesiĝis pri literaturo. Mi legis literaturajn revuojn redaktitajn de progresemaj verkistoj Luŝin, Maŭ Dun k.a. La revuoj de tempo al tempo publikigis literaturaĵojn de malgrandaj landoj, precipe orient-eŭropaj landoj. La popola vivo priskribita en tiuj verkoj estis simila al la vivo de la ĉina popolo, kio vekis ĉe mi simpatian. La gazeto "Novela Monato" redaktita de Maŭ Dun havis specialan numeron por literaturaĵoj de malfortaj nacioj, el kiuj kelkaj estis tradukitaj el Esperanto. En tio mi trovis la rolon


de Esperanto, kiun la aliaj lingvoj ne povis ludi. Ĝi altiris min kaj mi komencis lerni tiun lingvon.

La unua lernolibro por mi estis "Plena Esperanto-kurso" kompilita de Ŝeng Gŭoĉeng, unu el la plej fruaj esperantistoj de Ĉinio. Dum lernado mi pluapaŝe komprenis, ke Esperanto havas tre allogan idealon, nome akceli mondpacon kaj elimini nacian diskriminacion pere de reciproka kompreniĝo de la popoloj. Ankaŭ tio estis la celo de D-ro Zamenhof en kreado de Esperanto. Ne ĉiuj liaj pensoj koincidis kun la miaj, sed granda parto de ili estis proksima. Tio multe levis mian fervoron por lernado. Baldaŭ mi posedis la gramatikon kaj povis legi Esperantajn literaturaĵojn. Sed mia prononcado ne estis tute ĝusta. Mi konsultis veteranajn esperantistojn de la Ŝanhaja Esperantista Ligo. Tie mi ofte renkontis veteranajn esperantistojn. Iu el ili afable ĝustigis mian prononcadon. Mi ĝojis, ke mi aĉetis tie kelkajn Esperantajn librojn, kiaj "Fundamenta Krestomatio" de Zamenhof, verkoj eldonitaj de orient-eŭropaj landoj kaj Espe-

rantaj verkoj originalaj aŭ tradukitaj de samtempuloj de Zamenhof. La lingvonivelo de tiuj libroj estis tre alta. Interalie, en "Fundamenta Krestomatio" estas kaj originalaj kaj tradukitaj verkoj, kaj ankaŭ fabeloj de Andersen, iuj artikoloj estas tre belaj. Lernante Esperanton, mi atente legis tiujn verkojn.

La 28-an de januaro 1932, japanaj agresantoj atakis Ŝanhajon, kaj mia lernejo devis ĉesigi leciondonadon. La domo de la Ŝanhaja Esperanto-Asocio estis ruinigita de bomboj de la japanaj agresantoj. Sennombraj ĉinoj mortis kaj vundiĝis. Mi estis profunde malĝoja, sed Esperanto donis al mi grandan konsolon. Mi ekamis tiun lingvon, sekve mia lernado rapide progresis.

En la somero kaj aŭtuno de 1932, la postmilita Ŝanhajo dromis en plena depresio. Pro financa malfacilo mi revenis al Uhan, ĉefurbo de la provinco Hubej. Tie mi eniris en iun universitaton post ekzameno kaj studis fremdlandan literaturon. En la sekva jaro mi komencis verki en Esperanto en postlecionaj horoj — El la motivo de mia lernado de Esperanto, mi konigis per mia



*S-ro Chun-Chan Yeh*



*Chun-Chan Yeh kaj bofilino de Zamenhof en Britio, 1949*

plumo la mizeran vivon kaj batalon de la ordinaraj ĉinoj al la malfortaj nacioj en la mondo, kiuj havis la saman sorton. Kiel verkisto, mi dediĉis al literaturo mian unuan novelon "Jarfino" en Esperanto. Tiam mi verkis en ĉiu libera tempo kaj post tri jaroj mi publikigis mian verkaron "Forgesitaj Homoj" pere de la librejo "Verda Folio" en Ŝanhajo. Ĝi estis la unua Esperanta eldonejo de Ĉinio. Pro manko de mono la eldono de la libro prokrastiĝas ĝis 1937. Mia amiko Tikos multe helpis min en polurado de la verkaro.

Mia lernejo estis en kamparo, sed mi laŭeble partoprenis en aktivadoj de Esperanta organizo de Hankoŭ. En la malnova Ĉinio Esperanto estis rigardata kiel danĝera lingvo, ĉar pere de ĝi oni povis kontakti kun fremdlandaj esperantistoj. Kompreneble tio estis absolute malpermesata de la reakcia registra-

ro praktikanta faŝisman regadon. Iun tagon, Tikos kaj aliaj esperantistoj estis enkarcerigitaj. Tiam mi loĝis en kamparo kaj feliĉe eskapis el la danĝero. Iu kuracisto-esperantisto estis kondamnita je kvinjara mallibereco. En 1937 mi venis al Tokio, aliĝis al la Japana Esperanto-Instituto kaj instruis Esperanton al ĉinaj studentoj. Kelkajn semajnojn antaŭ la agresiva milito de la japanaj trupoj kontraŭ Ĉinio, nome la Evento de Lugoŭĉjaŭ, japanaj policianoj arestis min kaj aliajn ĉinajn esperantistojn en Tokio. En Ĉinio estas proverbo: "Ĉiuj korvoj sub la ĉielo estas same nigraj." Ĉiuj faŝistoj en la mondo estis same malbonaj. Mi evitis areston en Ĉinio, sed mi ne povis eskapi en Japanio. Mi pasigis pli ol du monatojn en la subtera karcero de la policejo de Kanda-distrikto de Tokio.

Liberigite, mi tuj revenis al la patrolando. La japanaj faŝis-

toj jam levis totalan atakon kontraŭ Ĉinio kaj la ĉina popolo faris totalan reziston. Ankaŭ intelektuloj de Ĉinio partoprenis en la rezisto. Tiam la fama verkisto Ĝuo Moĵŭo fondis kontraŭagresan propagandan institucion, konsistantan el intelektuloj. Ankaŭ mi aliĝis al tiu fondaĵo. En universitato mi studis la anglan lingvon, kaj en tiu institucio mi prenis sur min la laboron de anglalingva tradukado, dum la Esperanta laboro estis plenumata de Ĵelezo k. a. Kaj mia ĉefa laboro turniĝis de Esperanto al la angla lingvo. Tamen mi ne forlasis Esperanton, nek la movadon. En 1938 mi esperantigis novelaron pri la Kontraŭjapana Rezistmilito de Ĉinio, sub la titolo "Nova Tasako". La libro estis eldonita de la eldonejo "Orienta Kuriero" en Hongkongo.

Laŭ mia memoro, en la specifa historia periodo, la ĉinaj esperan-



Chun-Chan Yeh (dekstre) kaj kongresanoj de la 34-a UK en Britio, 1949

paco. Tio estis ne tre malproksima de la celo de Zamenhof aspiri la reciprokan interkompreniĝon de la tutmondaj popoloj kaj la mondpaco. Por tiu celo ĉinaj esperantistoj estis suspekta-taj, persekutataj kaj malliberigataj. Tamen ilia pago ne restis senfrukta. Hodiaŭ la Esp-movado finfine akiris liberan disvolviĝon en Ĉinio. Pli kaj pli multaj lernas kaj subtenas Esperanton (inkluze de la subteno de multaj famuloj de kulturaj rondoj, la societo "Amikoj de Esperanto" kaj la ĉina registaro), kaj pli kaj pli vastiĝas la aplikado de Esperanto (de eldono de libroj kaj gazetoj ĝis radiodisaŭdigo). Por la ĉinaj esperantistoj en la frua periodo de la nuna jarcento, tio estas la plej granda feliĉo kaj rekompenco. □

\* La aŭtoro estas fama ĉina verkisto kaj tradukisto, komitatano de UEA. La artikolon li skribis laŭ peto de nia redakcio por la centjara jubileo de Esperanto.

tistoj strikte kunligis la aktivaĵojn de Esperanto kaj ĝian aplikon kun la batalo de la ĉina po-

polo por la nacia liberiĝo, sendependeco, libereco, demokratio, la mondpopola unuiĝo kaj mond-

## KORESPONDI DEZIRAS

**Tarifo:** 1 internacia respondkupon por 5 vortoj aŭ mallongigoj. Por fotoj: 1 intern. resp. kup. por spaco de 1 linio. Niaj perantoj kaj kunlaborantoj ĝuas 30% da rabato. Esp. organizoj povas senpage aperigi anonceteton kun maksimume 50 vortoj. La redakcio ne respondecas pri la enhavo de la anoncetoj, nek pri la plenumado de la promesoj faritaj en ili.

\*Klubo de Internacia Libro kaj Gazetaro ekligos kunlaboron kun ĉiuj kluboj, grupoj kaj izolitaj esperantistoj kiuj dez. kor. aŭ vere kunlabori kun ni. Esperantan informilon ni sendos al ĉiuj volontuloj. Adr.:

Klub MPiK/Esperanta Sekcio/, ul. Westerplatte 19, 65-034 Zielona Gora, Pollando.

\* Esp. gelernantoj volas korespondi kun samaĝuloj kolektive aŭ individue. Skribu al instruisto Jusuf Dizdarevic, Osnovna Skola, Omgr Maslic Babino-Arwauti 72207 Puhovac/Zewica, Jugoslavio.

\* 20-j. junuloj dez. kor. kun gesamaĝuloj de Ĉinio. Adr.: 1 Krzysztof Molajda, Zrodalna 70, 42-115 Pajeczno, Pollando; 2. Tomasz Topolewski, Srebrna 14/1/12, 42-610 Tarn, G. 6, Pollando.

\* Pentristo volas korespondi kun samideanoj de Ĉinio kaj kolektas bk kaj pm. Adr.: S-ro Turcinek Stepan, str. Husova 644, 749 01 Vitkov Okres Opava, Ĉeĥoslovakio.

\* Kontakton serĉas kun kolektantoj de pm., stampoj etiketoj per temo Esperanto tm. Manfred Granitz, Ernst Schneller Str 87, 9091 Karl Marx Stadt, DDR.

\* 23-j. instruisto de geografio dez. kor. tm, interesiĝas pri sporto, muziko, geografio kaj aliaj aferoj kaj kolektas bk, insignojn kaj monerojn. Adr.: Piotr Rychlewski, 08-440 Pilawa, Al. Wyzw, 283, Pollando.

\*21-j. studento dez. interŝanĝi spertojn kun ĉinaj esperantistoj pri historio, geografio, arto, sportoj, kutimoj ktp. kaj kolekti bk., diskojn (folkloraj kaj popola muziko), afiŝojn, kalendarojn kaj surgluojn. Adr.: Alfredo Ovalles Perdomo, Urbanizacion Las Acacias Edificio 32, N-ro 9 Maracay 2103, Estado Aragua, Venezuelo.



# Wong Kenn, pioniro de la ĉina Esp-movado



*Doktoro Wong Kenn*

Estas multaj laŭdindaj pioniroj en la historio de la ĉina Esp-movado. Unu el ili estas d-ro Wong Kenn. Ekde la komenco de la kuranta jarcento li dediĉis sin al la disvolviĝo de la ĉina Esp-movado, plurfoje partoprenis internaciajn kongresojn de Esperanto kaj ĝuas altan reputacion en la tuta esperantistaro.

Li naskiĝis en Panju-gubernio de Ĝuangdong-provinco julie de 1894. En la aĝo de 18 jaroj li komencis lerni Esperanton ĉe s-ro Hsu W.K. Poste li funkciigis Esp-kurson kaj instruis Esperanton en Ŝjangŝan-gubernio (la nuna Ĝongŝan-urbo) kaj Malajo. En 1921 li vojaĝis al Francio kaj studis en la Liona Universitato. Pro sia inteligenteco kaj diligenteo li akiris literaturan doktorecon ĉe diplomitiĝo. Tie li aliĝis al la Liona Esperantista Societo. En 1922 li unuafoje partoprenis la Internacian Konferencon pri Esperanto en Lernejoj okazinta en Ĝenevo. Li koniĝis al la konferenco la staton de la Esperanta instruado en Ĉinio.

Printempe de 1923 li ĉeestis la Internacian Konferencon por Komuna Komerca Lingvo okazinta en Venecio, Italio, en la nomo de la ĝeneralaj komercaj ĉambroj de Pekino kaj Tjanĝin. Maje de la sama jaro li invitive ĉeestis la Unuan Kongreson de Esperanto en la Ibera Duoninsulo, kune okazigitan de Hispanio kaj Portugalio.

Pro siaj erudicio kaj alta klerco en Esperanto kaj la ĉina lingvo, en 1924 li estis elektita kiel membro de la Lingva Komitato de Esp. kaj tiu de la Centra Komitato de la Esperanto-movado. Maje de 1924 invitive li ĉeestis la Duan Kongreson de Esperanto en la Ibera Duoninsulo. Julie li veturis al Balkanoj por partopreni la 12-an Tutlandan Kongreson de Esperanto en Bulgario en la nomo de la Centra Komitato de la Esperanto-movado. Poste li partoprenis la 4-an Kongreson de Esperanto de Rumanio kaj la Duan Kongreson de Esperanto de Jugoslavio. Li estis elektita kiel honora vicprezidanto de la

kongresoj de Hispanio, Rumanio kaj Jugoslavio.

Por ke la ĉina eminentulo Caj Ĵuanpej, kiu la unua enkondukis Esperanton en lernejon, pli bone konu la internacian situacion de Esperanto en aplikado kaj disvolviĝo, d-ro Wong Kenn akompanis lin por ĉeesti la 16-an Universalan Kongreson de Esperanto okazintan en Vieno.

En la printempo de 1925 40 membroj de la Franca Akademio de Sciencoj iniciatis la Internacian Konferencon por Uzado de Esperanto en la Sciencoj Puraj kaj Aplikaj okazintan en Parizo. Ĝin ĉeestis d-ro Wong Kenn, komisie de la ĉina Eduka Ministerio. Post la konferenco li verkis 40 000-ideograman artikolon pri la valoro de Esperanto en scienco. Ĝin eldonis la Kantona Esperanta Instituto. Aŭguste de la sama jaro la 17-a UK okazis en Ĝenevo kaj fondis la Someran Universitaton. Wong Kenn estis unu el ĝiaj prelegantoj. La kongresanoj aplaŭdis lian prelegon pri la eduka filozofio kaj politika penso de Konfuceo.



*D-ro Wong Kenn (la dua de maldekstre) dum la 4-a Kongreso de Esperanto de Rumanio en Arad, julion de 1924*

En la printempo de 1926 li revenis al Kantonon fininte sian studadon. Li estis engaĝita en la Gŭangdong-a Universitato (la nuna Gongŝan-a Universitato), kie li instruis filologion, lingvistikon kaj Esperanton. Krome li instruis Esperanton ankaŭ en la Nacia Universitato kaj la Urba Belarta Lernejo. Maje de la sama jaro en Gŭangdong-provinco okazis provinca eduka kunveno, al kiu li prezentis proponon preni Esperanton kiel lernobjekton de diversagradaj lernejoj. La propono estis aprobita kaj sekve en nemalmultaj altlernejoj kaj mezlernejoj estis instruata Esperanto kiel nedeviga lernobjekto. En tiu ĉi kunveno oni aprobis ankaŭ la proponon fondi la Kantonan Esperantan Instituton. Wong Kenn estis engaĝita kiel ĝia unua estro. En la tri jaroj post la fondiĝo la instituto elbakis 200 esperantis-

tojn. Kantonon fariĝis sisteme unu el la plej viglaj urboj de la Esp-movado. Laŭ la raporto de la tiama revuo "Esperanto", la 15-an de decembro 1926 la kantonaj esperantistoj kunvenis en la halo de la provinca eduka societo por celebri la 67-an naskiĝtagon de Zamenhof, kun partopreno de ĉ. 2 000 personoj. Tage 30 aŭtoj ornamitaj per verdaj rubandoj faris paradon, vespere pli ol 1 500 esperantistoj okazigis amuzan vesperon. Post la vespero 500 esperantistoj kun verdaj lanternoj en la mano parade tra iris la urbon.

Por krei al esperantistoj favorajn kondiĉojn sin kompletigi, Wong Kenn, Ĉaj Jŭanpej, U Ĝihuj, Ĉjan Ŝjŭantong, Ĝoŭ Zŭojen, S. Ĉ. Lu kaj aliaj eminentuloj en la kultura rondo de Ĉinio kune iniciatis la Ĉinan Esperanto-Instituton. D-ro Wong Kenn persone veturis al Sin-

gapuro kaj Malajo por kolekti fonduson. Kvankam la rezulto ne estis kontentiga, tamen lia penado por tio estas eterne memorinda.

En 1929 la Ŝanhaja Esperanto-Asocio eldonis lian verkon "Ĉinio kaj Problemo pri Esperanto". En la libro li detale konigas la historion de la ĉina Esp-movado, traktas pri la rilato inter Ĉinio kaj Esperanto kaj proponas reprosporigi Ĉinion per Esperanto, kio manifestas lian patriotismon.

En la komenco de la 30-aj jaroj li daŭre klopodis por funkciigi la Kantonan Esperantan Instituton kune kun Sinpak Au, Wu Ta-Kwang kaj Hsu W. K. Li dediĉis sian tutan energion al disvastigo de Esperanto kaj elkulturo de esperantistoj.

En kaj post la Kontraŭjapana Rezistmilito la migrada vivo portempe apartigis lin de la Esperanto-movado. En la mezo de la 50-aj jaroj li denove sin jetis en la movadon. En aŭgusto 1955 li partoprenis la 40-an UK en Bolonjo, Italio. Post nelonge li elektiĝis kiel membro de la Akademio de Esperanto kun servotempo de 9 jaroj kaj fariĝis la unua akademiano de tiu ĉi organizo en la historio de la ĉina Esp-movado. Kiam li vivis eksterlande, li ĉiam zorgis pri la ĉina Esp-movado. En la unua numero de 1976 la revuo "Pacifika Lumturo" publikigis lian artikolon pri liaj travivaĵoj en la ĉina Esp-movado kaj lia sincera espero al ĝia estonteco.

Nun d-ro Wong Kenn aĝas 94 jarojn. Unu el liaj okuloj jam estas blinda kaj la alia duonblinda. Tamen li ofte legas la revuojn "El Popola Ĉinio" kaj "La Mondo". Li kore ĝojas pri la atingoj akiritaj de la ĉina Esp-

# "La Espero" sonu tra la mondo de la juna generacio

de ŬANG DAMING\*



La aŭtoro


*Mi ne estas persono fama,  
Esperanton ne bone posedanta.  
Tamen la kortuŝa kanto  
sub la verdstela flago  
akompanis min ĉiam  
en la pasinta duonjarcento.  
Sur la batalejo kontraŭ faŝismo  
mi deklamis la kanton "La Espero".  
En mitingo celebre al la venko de justeco,  
mi plenvoĉe kantis la kanton.  
Antaŭ baroj kaj danĝeroj  
mi mallaŭte kantis la kanton.  
Ekzisto, evoluo,  
paco kaj libereco —  
estas ĉiam la plej nobla idealo.  
De la pasinteco ĝis nuntempo,  
en ĉiuj anguloj de la mondo,*

*sennombraj bravuloj,  
nekalkuleblaj herooj  
prikantis kaj prikriis ĝin,  
eĉ oferis sian vivon.  
La historio centjara  
pruvis ĝian fortan vivipovon.  
La "Espero" verda  
promesas al la homaro pacan ekziston,  
harmoniigas la socion,  
interfluigas la civilizacion de la mondo.  
La kanto ĉarma kaj kortuŝa  
sonu tra la mondo de la juna generacio,  
kuraĝigu la mastrojn de la estonta mondo!*

\* La aŭtoro lernis Esperanton meze de la tridekaj jaroj, iam funkciis kiel vicrektoro de la Universitato por Elmigrantaj Ĉinoj. Li estas membro de la societo "Amikoj de Esperanto".

movado en la pasintaj jaroj. Li diris: "Mi tre ĝojas, ke la ĉina Esp-movado senprecedence prosperas kaj havas brilan perspektivon." Rilate la 71-an UK en Pekino, li diris: "Min tre kortuŝas tio, ke mia revo antaŭ 60 jaroj nun realiĝis." Li opinias: "Nun la ĉina Esp-movado jam

prosperas, famas tra la mondo kaj havas belegan perspektivon." Li kredas, ke la ĉinaj esperantistoj nepre faros pli grandan kontribuon al la kultura interŝanĝo inter Ĉinio kaj aliaj landoj, al la mondpaco kaj Esp-movado en la dua jarcento de Esperanto. □



# KIE ESTAS LA DENASKAJ

## ESPERANTISTOJ?

En la antaŭaj jaroj oni multe klopodis eduki denaskajn esperantistojn.

Dum la Universalaj Kongresoj oni organizis apartajn kunvenojn por denaskaj e-istoj kaj por iliaj gepatroj, kaj ili estis ligitaj en aparta organizaĵo. Lastatempe oni nenion aŭdas pri ili. Ĉu ili malaperis? Ĉu ili eksmodiĝis?

Kompreneble la iamaj infanoj jam estas plenkreskuloj kaj ilia klasigo jam ne okazas laŭ iu kaprico de la gepatroj, sed laŭ aliaj personaj ecoj kaj destinoj, kiuj klasigas ilin en diversajn grupojn laŭ profesio, ŝatokupo, kapabloj, studoj ktp. Tamen, ĉu ne plu ekzistas junaj denaskaj esperantistoj?


Se la zorgo de la gepatroj-esperantistoj instrui Esperanton al siaj infanoj plen- aŭ grandparte perdis entuziasmon kaj eksteran stimolon, tute aŭ grandparte, estas bedaŭrinda fakto, kaj certe granda perdo por la Esperanto-movado.

Estas konata fakto ke infanoj pli facile lernas lingvon ol plenkreskuloj, kaj la korekta akiro de fremdlingvo en adolta aĝo tre malofte estas perfekta. Tion povas konstati partoprenanto de Universala Kongreso, kiu ofte rekonas la naciecon de nova konato laŭ lia elparolo. Estas simple aserti ke "Esperanto estas facila lingvo", sed ni malatentas la fortostreĉojn kaj mult-

jarajn klopodojn de plenkreska franco por korekte elparoli "simplan" vorton kiel "malgraŭ", kaj por ne akcenti la vorton sur la lasta silabo. La angleparolantoj scias kiom ili devas penegi por atingi la korektan elparolon de la vokaloj en Esperanto; la hungaroj kaj ĉeĥoj por ne akcenti la vortojn sur la unua silabo; la hispanparolantoj por ne diri "Estudento" anstataŭ "studento"; la poloj kaj rusoj por ne diri "nji" anstataŭ "ni".

La orientanoj — ĉinoj kaj japanoj — ne pravas dirante ke la elparolo de Esperanto estas facila por eŭropanoj, ĉar fakte ĉiu eŭropano — laŭ sia nacia lingvo — havas iun malfacilaĵon. Aliflanke, estas vero, ke por orientanoj la problemoj estas preskaŭ nesolveblaj, kaj la klopodoj eĉ de pluraj jardekoj donas tre malgrajn rezultojn. Ne mirinde, se ekzemple laŭ la japana lingvoskemo la ordinara vorto "skribi" estas neelparolebla. Ĝia plej proksima transliterumo estas "su-ku-ri-bi", por "filmo" la plej proksima ebleco estas "hiu-ru-mo".

Sed ne temas nur pri la elparolo de vortoj. Eĉ pli grava estas la kunmeto de la frazo, submetita al la pensmaniero. Eĉ se en diversaj eŭropaj lingvoj tiaj diferencoj ekzistas, ili estas multe pli grandaj en la orientaj lingvoj. La frazostukturo de la ĉina lingvo estas tiom malsama,



S-ro Tibor Sekelj

ke eŭropano, kiu ne lernis la ĉinan aŭ la japanan lingvon, ne komprenas la frazon, eĉ se li havas la tradukon de ĉiu unuopa vorto. Pro tio ne nur la orientanoj, sed ili pli ol aliaj, devas fari grandan fortostreĉon por alĝustigi al Esperanto sian pensmanieron, kiun ili uzas en sia ĉiutaga vivo, kaj kiun ili de sia naskiĝo konas kiel solan korektan esprimmanieron. Ili do devas vere perforte eltordi kaj foje inversigi sian dirindaĵon por havigi korektan esperantlingvan frazon.

Pesimisto dirus ke "ĉiam klopodegi, kaj neniam atingi perfektecon estas nia sorto". Jes, tio estas vero, por tiuj kiuj en matura aĝo komencas lerni nian komunan lingvon, kaj ne nur ĝin sed iun ajn alian.

La afero ŝanĝiĝas, se oni en la junaĝo lernas la lingvon, ju pli frue, des pli bone. En la elementa lernejo oni pli facile akiras la novan lingvon ol en la postaj jaroj. Eĉ pli nature oni ekparolas novan lingvon dum ludado en infanĝardeno.

Sed estas tute alia la afero, se infano komencas samtempe lerni du lingvojn, se ĝi ekde la komenco ekhavas du gepatrajn lin-

gvojn: la nacian lingvon de la loĝloko, kaj la internacian.

Tiel la infano ekde la komenco estas edukata en du vojoj: esti bona civitano de sia komunumo, de sia lando, kaj samtempe esti tutmondano kuncivitano de la tuta homaro.

Lernante kompreni kaj esprimi sin en du lingvoj, li ekde la komenco akiras la kapablon moduli la voĉojn laŭ la postuloj de ambaŭ, kaj li aŭ ŝi ne sentos iun ajn malfacilaĵon en la modulado de la voĉoj en ili ekzistantaj. Eĉ pli grava estas la frazkonstruo en du lingvoj: la infano ekde la plej frua aĝo komencas formigi siajn pensojn en du egalrajtaj manieroj, depende de tio, al kiu li deziras komuniki sian penson, do, en kiu lingvo.

La klasika ekesto de denaska esperantisto estas en internacia geedzeco. En tiu kazo plej nature estas, ke tiu el la geedzoj, en kies lando la familio loĝas, parolas kun la infano nur en sia nacia lingvo, dum la alia, la "fremdlandano" parolas kun ĝi ekskluzive en Esperanto. Bedaŭrinde tro ofte okazas ke la "alilanda el la gepatroj sentas sia patriota devo instrui la infanon ankaŭ sian gepatran lingvon, por ke ĝi povu paroli kun la forraj geavoj", kaj tio nuligas la ŝancojn de Esperanto, ĉar se du lingvojn lerni samtempe estas eble, eĉ facile, tri jam kreas konfuzon en la malgranda kapo.

Tamen ne estas kondiĉo ke la gepatroj estu malsamnacianoj. Inter la geedzoj, tiu kiu pli korekte kaj pli facile parolas Esperanton, parolu kun la infano ĉiam kaj ekskluzive en Esperanto, dum la alia el la gepatroj uzu ĉiam la nacian lingvon. Se nur unu el la gepatroj estas esperantisto, kompreneble, la situacio estas klara.

Mi konas kazon, kie la avo, kiu pasigis plurajn horojn tage kun la nepino, dum la gepatroj laboris, parolis kun ŝi nur en Esperanto. Tie ŝi, kvinjara, perfekte parolis ambaŭ lingvojn, la "gepatran" kaj la "avan" lingvojn, kaj uzis ilin tute nature, laŭ tio en kiu lingvo oni alparolis ŝin.

Ankaŭ ekzistas kazoj, en kiuj simple Esperanto estas la familia lingvo, kaj la infanoj lernas la nacian lingvon ludante kun aliaj infanoj, parolante kun geonkloj, geavoj, tiel ke ĝi havas neniam malfacilaĵon ĉe la atingo de lerneja aĝo.

Ĉiuj tiuj metodoj — kaj eble aliaj, kiujn mi ne menciis, estas bonvenaj por denove krei aronda denaskaj esperantistoj, kiuj klare, flue kaj senhezite parolas la internacian lingvon, kaj povos okupi postenojn, kiuj en la eston-

to — ni esperas — ĉiam pli abundos.

Tiu ĉi rekomendo validas por la tuta mondo, sed mi volas aparte emfazi la bezonon krei kategorion de denaskaj esperantistoj en Oriento, kie la lernado de Esperanto kaŭzas plej grandan malfacilaĵon, kaj la rezulto ĉiam restas nur duona, eĉ post longjara adolta lernado.

Ni pripensu la renovigon de la kunvenoj de denaskaj esperantistoj kaj de iliaj gepatroj, organizo de konvenaj eventoj mond-vaste por ili, kaj ne perdu ilin el la vidkampo. Ili povas ludi signifan rolon en la aplikado de Esperanto en la grandaj — kaj malgrandaj — internaciaj organizaĵoj. □

*\* La aŭtoro estas aktiva jugoslava esperantisto, verkisto kaj etnografo.*

*S-ro Tibor Sekelj kaj la prezidanto de UEA,  
d-ro Humphrey Tonkin, en la 71-a UK*



## CINAJ E-POSTMARKO KAJ ALIAJ E-FILATELAĴOJ MEMORE AL CENTJARA JUBILEO DE ESPERANTO

Por celebri la Centjaran Jubileon de Esperanto la Poŝta kaj Telekomunika Ministerio de la Ĉina Popola Respubliko emisiis memorigan poŝtmarkon la 26-an de julio 1987 kun valoro de RMBY 0.08.

La memoriga poŝtmarko portas verdan stelon kaj simbolon de la Centjara Jubileo de Esperanto. Ĝia bildo estas tergloba formita el la vorto ESPERANTO kvinfoje aperanta kaj tiel esprimas la tutmondecon de nia kara lingvo Esperanto (vd. la bildon 1).

La memoriga poŝtmarko estis desegnita de s-ro Xu Hongru. Li desegnis ankaŭ stampilon kaj unuataĝan koverton por la Ĉina Filatela Asocio (vd. la bildon 2).

Dorsflanke de la unuataĝa koverto estas klarigo pri Esperanto en la lingvoj ĉina, angla kaj Esperanta.

*Esperantaj kasetoj en la vendejo de fremdlingvaj libroj de Ljaŭning-provinco*



Oni informis, ke oficialajn Esperantajn stampilojn, kovertojn kaj poŝtkartojn faris aŭ faros ankaŭ poŝtejoj aŭ filatelaj kompanioj de la urboj Pekino, Ĉengdu, Suĝoŭ, Ĉingdaŭ, Hefeĵ, Ĉangĝoŭ, Ĉangŝu, Mjanĝang k.a. kaj inter ili iujn desegnis s-ino Ren Yu, la desegninto de la filatela tutajto por la 71a Universala Kongreso de Esperanto, kaj s-ro Zhang Linrui.

En Ĉinio estis uzitaj jam 4 oficialaj Esperantaj stampoj. Laŭ la plej aŭtoritata "Katalogo de Esperanto-poŝtstampoj" kompilita de ELF-AREK (Esperanto-Ligo Filatelista — Amika Rondo de Esperantaj-Kolektantoj) ili nombriĝas kiel ĈIN 1 ĝis ĈIN 4, nome:

ĈIN 1: Esperanta stampo por la Unua Ĉina Kongreso de Esperanto

ĈIN 2: Esperanta stampo por 71a UK (stelo)

ĈIN 3: Esperanta stampo por 71a UK (stelo kaj Granda Muro)

ĈIN 4: Esperanta stampo por 71a UK (kolomboforma)

## ESPERANTO-KURSO EN LA ŜANDONG-A OCEANOGRAFIA INSTITUTO

Por festi la centjaran jubileon de Esperanto, la Ĉingdaŭ-a Esperanto-Asocio organizis Esperantan prelegon en la Ŝandong-a Oceanografia Instituto, unika en Azio. Ĝin ĉeestis respondeculo de la instituto kaj pli ol tricent studentoj. La partoprenantoj postulis funkciigi Esperanto-kurson. Nun la instituto jam decidis instrui Esperanton kiel nedevigan lernobjekton. Ĉ. 80 studentoj lernas en ĝi nian lingvon kaj pli ol 200 homoj ĉeestas la kurson kiel aŭskultantoj.


## ESPERANTA TURISMA SERVO DE ŜEA

Sankciite de koncerna departemento de la Ŝenĝang-a popola registaro, la Ŝenĝang-a Esperanto-Asocio starigis Esperantan turisman servon. Nun la turisma servo povas kontaktiĝi rekte kun eksterlandaj organizoj kaj personoj por organizi Esperantan turisman grupon kaj aranĝi ĉiujn aferojn por vojaĝi en Ŝenĝang kaj aliaj lokoj de Ĉinio. Esperantistoj de Usono, Japanio, FR Germanio kaj Francio skribis al ĝi, esperante vojaĝi en Ĉinio. La asocio akceptos ilin per varma servo.

## KORESPONDA ESPERANTO-KURSO VARBAS NOVAJN LERNANTOJN

Por adaptiĝi al la bezono de la internacia kultura interŝanĝo kaj moderniga konstruado de Ĉinio kaj akceli propagandon kaj disvastigon de Esperanto, la koresponda Esperanto-kurso de la Siĉŭan-a Fremdlingva Instituto decidis varbi 2 000 novajn lernantojn.

Koresponda Esperanto-kurso estas tradicia metodo instrui Esperanton en Ĉinio. Jam en la komenco de tiu ĉi jarcento la Ŝanhaja Esperanto-Asocio jam fun-



*Nova rozo "Esperanto-Jubileo"*

kciigis la Korespondan Esperanto-Lernejon. Poste ankaŭ en Pekino, Kantono kaj Ĉongĉing fondiĝis tiaj lernejoj. En la pasintaj jaroj iuj urbaj kaj provincaj Esperanto-asocioj kaj universitatoj funkciigis korespondajn lernejojn aŭ Esperanto-kursojn, en kiuj lernis miloj kaj dekmiloj da lernantoj. Ili ludas gravan rolon en propagando kaj disvastigo de Esperanto.

#### LA UNUA ESPERANTLINGVA SEMINARIO PRI FILOZOFIA TEMO

Inter la 16-21 de febr. 1987 okazis en Chaux de Fonds, la Kultura Centro Esperantista, Svislando, seminario pri la okcidenta kaj orienta pensmanieroj kun 14 partoprenintoj el 5 landoj. La seminario unue pritraktis la okcidentan pensmanieron tra Aristotelo, Sokrato, Platono, Aŭgusteno, Tomaso, Kartezio, Kantio kaj Hegelo; kaj poste ili diskutis tra la Vedaoj, Upaniŝadoj, Aranyaka-oj pri la 6 klasikaj skoloj de la hindia filozofio kaj pri la libro Tao To King (Dao de Jing, libro de la Vojo kaj Virto) de Ĉinio de la 4-a jarcento a.K.

#### NOVA ROZO — "ESPERANTO-JUBILEO"

Okaze de la jubilea jaro de Esperanto, post la sep-jara laborado,

la brita firmo John Sanday (Roses) Ltd. el Bristol, registris novan rozon — "Esperanto-Jubileo". Ni esperas, ke ĉi tiu bela rozo estos simbolo de amikeco por la homaro.

#### GRUPO DE POLIGLOTOJ FONDITA

La sekretario pri turismaj aferoj de Ŝtato Sãn Paulo kreis en la ĉefurbo Sãn Paulo, Brazilo, grupon de poliglotoj por helpi alilandajn turistojn. Ili apartenas al la ŝtata polico kaj servas per la lingvoj angla, germana, franca, greka kaj ankaŭ Esperanto. Ĉiu parolanto kunportas sur la dekstra brako la flagon de la lando, kies lingvon li scipovas. Samideano Joel Moreira Augusto fiere portas la verdan flagon de Esperantujo. La sidejo de tiu grupo troviĝas sur la strato Omachã 182, kvartalo Penha, Sãn Paulo, Brazilo. Dum la tuta tago, duope, ili cirkulas tra la Placo de la Respubliko kaj la apudaj avenuoj de la centro de la urbejo.

#### VENEZUELO DISKONIGAS ESPERANTON EN ĴURNALOJ KAJ TELEVIDO POR LA JUBILEO

En januaro la marakaja ĵurnalo "El Aragüeno" publikigis artikolon de Esperanto-pioniro José Vicente Espinoza pri centjariĝo de Esperanto; en februaro, la grava ĉefurba ĵurnalo "El Universal" publikigis artikolon de Roberto Romanelli pri la jubileo kaj intervjuis estraron de VEA Maritza Graziani. La barkisimeta ĵurnalo "El Impulso" enhavis artikolon de Armando Cortés sub la titolo "Esperanto en Barkisimeto, dum sia unua jarcento". En sia ĉiutaga programo Pedro Berroeta intervjuis vicprezidanton de la Asocio Alfredo Portillo per la kanalo 8 de la ŝtata televidstacio; en marto la kultura televidstacio dissendis unuoran intervjuon de profesoro Jorge


Mosonyi kaj aliaj kvin geestranoj de la Asocio en la kanalo 5.

#### INFORMOJ PRI E-KURSOJ EN SVISLANDO KAJ PORTUGALIO

La Kultura Centro Esperantista organizos tutan serion da Esperanto-staĝoj, kursoj kaj seminarioj, inkluzive de tiuj por komencantoj kaj progresintoj, feriaj k.a. Petu la detalajn informojn al la Kultura Centro Esperantista, Pf 771, CH-2301 La Chaux-de-Fonds (Svislando).

La radiostacio RADIO DUORO-SUL de LAMEGO, Portugalio disaŭdigas Esperanto-kurson regatan de s-ro Manuel Teixeira. La lecionoj okazas lunde kaj merkrede, de la 21-a ĝis la 21-a k. duono. Skribu gratulante RADIO DUORO-SUL: 5100 LAMEGO, Portugalio.

*Brazila samideano Joel Moreira Augusto portanta verdan flagon*



# ĈINA KALIGRAFIO

de ĈEN JONGPENG

La han-lingvaj ideogramoj de Ĉinio evoluis el pentraĵoj kaj signoj, kaj en la praktikado iom post iom fariĝis sendependa arto — kaligrafio. La kaligrafoj per simplaj instrumentoj kaj esprimiloj — papero, peniko kaj ĉina inko, faras diversastilajn artajn skribaĵojn, kiuj disvolviĝas senfine, senhalte.

La skribaĵoj sur bestaj ostoj aŭ testudaj ŝeloj estas la plej antikvaj ĉinaj ideogramoj, kies signifojn nun oni povas distingi, kaj ankaŭ la plej fruaj kaligrafaĵoj de Ĉinio. Ili estis uzataj por noti aŭgurajn kaj kultajn aferojn en Ŝang-dinastio (ĉ. 17-a — 11-a jc. a. K.). Oni elterigis cent mil pecojn kun tiaj skribaĵoj. Laŭ la stiloj la skribaĵoj estas aŭ malmolaj kaj malgrasaj aŭ dikaj kaj fortaj. Laŭ la formoj ili estas dikaj, maldikaj, kvadrataj aŭ rondaj. Laŭ la strukturo ili estas variaj, diferencaj en grando, sed la dispozicio estas egala, simetria kaj stabila. Ili estas aŭ malorde aŭ bonorde dispoziciitaj konforme al la malsamaj grandoj kaj formoj de ostaj pecoj. Ĉio ĉi montras iliajn apartajn trajtojn.

En la dinastioj Ŝang kaj Ĝoŭ (17-a jc. — 256 a.K.) el la kaligrafaĵoj la plej gravaj estis epigrafoj sur *ding* (tripieda bronza ujo por kuiri manĝaĵon) kaj aliaj bronzaĵoj. Oni nomas ilin "ideogramoj sur bronzaĵoj". La verkoj plejparte estas rimaj, zorgeme gravuritaj. Ili malfermis stelean kaligrafion.

La eminentaj verkoj en Ĉin-dinastio (221—206 a.K.) estas "Ideogramoj sur Ŝtonaj Tamburoj". Tio estas 10 tambur-formaj ŝtonoj, sur kiuj estas gravuritaj rimaj poemoj. La gravuritaj ideografiaĵoj estas fortaj, simplaj kaj kvadratformaj, la interspacoj inter ideografiaĵoj kaj linioj estas egalaj. Ĉiu ideografiaĵo estas ĉ. 3 centimetrojn alta. La gravuro certe estis farita de talentuloj. La "Ideografiaĵoj sur Ŝtonaj Tamburoj" estas honorita kiel la unua kriterio por la ĉina kaligrafio.

La plej grandaj sukcesoj de kaligrafio en Ĉin-dinastio estas unuigo de la skribaj formoj de la ĉinaj ideografiaĵoj kaj formiĝo de novtipa kaligrafio, kiu nomiĝas malgranda *ĝŭan*-kaligrafio. Ĝi karakteriziĝas per ronda linia turniĝo en la komenca periodo kaj poste iom post iom fariĝis kvadrata turniĝo.

Han-dinastio (206 a.K. — 220 p.K.) estas ŝlosila periodo de la evoluo de la ĉina kaligrafio. Tiam furoris *li*-kaligrafaĵoj, en kiuj rektiĝas la kurbaj strioj de *ĝŭan*-kaligrafaĵoj. Tiu ŝanĝiĝo estas la plej grava ŝanĝiĝo en la evoluado de la han-lingvaj kaligrafaĵoj. La postlasitaj *li*-kaligrafaĵoj estas ĉefe gravuraĵoj sur ŝtonplatoj, bambuaj pecoj kaj skribaĵoj sur silka ŝtofo. En Han-dinastio modiĝis starigo de steleoj, kies tekstoj estis skribitaj de la tiamaj kaligrafoj kaj poste gravuritaj sur ŝtonplatoj. La majstroverkoj admirataj de

la posteuloj estas "Pri konstruo de viadukto en Ŝimen", "Pri pretigo de ceremoniaj aparatoj kaj ornamado de la Templo de Konfuceo", "Pri Ji Jing", "Pri merito de Caŭ Ĉjŭan", "Pri merito de Ĉang Ĉjan" k. a.


Krom la epigrafoj sur ŝtonplatoj estas valoraj ankaŭ la lastatempe elterigitaj kaligrafaĵoj sur bambuaj kaj lignaj pecoj kaj silka ŝtofo. Ili kun stilo de forteco kaj simpleco estas la aŭtentikaĵoj de ideogramoj plej frue skribitaj per penikoj.

En la posta periodo de Han-dinastio ekburĝonis *kaj*-kaligra-


*Steleo de Jiŝan-monto reproduktita en 993. La skribaĵo sur la originala steleo estis farita de ĉefministro Li Si de Ĉin-dinastio (221-206 a. K.).*







Skribaĵo sur la steleo por  
Caŭ Ĉjŭan starigita en la  
Orienta Han-dinastio en  
185



Skribaĵo de Cai Ŝjang (1012-1067) de Song-dinastio

fajoj, tamen kun postsigno de *li*-kaligrafajoj. Ili fariĝis la hodiaŭaj en la Ses Dinastioj\* (222-589 p.K.). Dank' al la enkondukiĝo de budhismo kaj prospero de arto, la kaligrafio multe progresis. Tiam oni gravuris ideogramojn per grifelo anstataŭ peniko kaj la ideogramoj sin montras fortaj kaj estas alte taksitaj de la posteuloj. En tiu periodo aperis talenta kaligrafo Ŭang Ŝjiĝi (321—379 p.K.). Ŭang vivis en la Orienta Ĝin-dinastio (317—420 p.K.). Li estas honorita kiel "sankta kaligrafo". El liaj verkoj la "Prefaco de la Poemaro ĉe Lanting" estas la plej fama kaj rigardata kiel la unuaj *ŝing*-kaligrafajoj en la mondo. Legi liajn verkojn estas kvazaŭ ĝui kvietan naturan pejzaĝon.

En la Norda Ŭej-dinastio (386—557 p.K.) prosperis stelea kaligrafio. La tiamaj kaligrafaj

joj estas altnivelaj kaj diversa-stilaj. Iuj el ili estas grandiozaj, aliaj simplaj kaj la triaj flua, kiuj malfermis *ŝing*-kaligrafion. La majstraj verkoj estas "epigrafo al Ĝang Menglong", "Stelea Epigrafo de Ĝang Ŝjŭan", "Dudek Epigrafoj en Longmen".

Tang-dinastio (618—907 p.K.) estis periodo kiam la proksimperioda kaligrafio prosperis. La tiel nomata proksimperioda kaligrafio konsistas el *kaj*-, *ŝing*-kaj *caŭ*-kaligrafajoj. La plej eminentaj kaligrafoj en la komencaj jaroj de Tang-dinastio estis Ju Ŝinan, Oŭjang Ŝjun, Ĉu Sujljang kaj Ŝjue Ĝji. Ju Ŝinan heredis la elegantecon de Ŭang Ŝjiĝi en la kaligrafio. La kaligrafajoj de Oŭjang Ŝjun estas fortaj kaj bonordaj kun gusto de tiuj de la Ses Dinastioj. La kaligrafajoj de Ĉu Sujljang estas malgrasaj kaj fortaj. Iliaj reprezentaj verkoj estas "Antaŭhala Ste-


leo en la Konfucea Templo" kaj "Epigrafo pri Fonto en la Palaco Ĝiŭĉeng" k.a.

La kaligrafajoj en la komenco de Tang-dinastio tendencis al maldika stilo, sed ili fariĝis dikaj en la meza periodo de la dinastio. La majstra kaligrafo en tiu periodo estis Jan Ĝenĉing, kies kaligrafio variis kun lia aĝokresko. Liaj kaligrafajoj en la maljuneco sin karakterizas per lerteco kaj forto. Lia reprezenta verko estas "Epigrafo pri Dŭobaŭ-pagodo". En la fino de Tang-dinastio aperis la fama kaligrafo Liŭ Gongĉuan, kies kaligrafajoj kun aparta gusto estas ja perfekta.

En Tang-dinastio furoris ankaŭ *caŭ*-kaligrafio. El tiaj verkoj la frenezaj *caŭ*-kaligrafajoj de Ĝang Ŝju kaj Hŭaj Su estas la plej eminentaj. Ĝang Ŝju estas honorita kiel "sankta *caŭ*-



Skribaĵo de Oŭjang Ŝjun de Tang-dinastio sur steleo por fonto en Ĝiŭceng-palaco



Skribaĵo de Jan Ĝenĉing de Tang-dinastio sur steleo starigita en 752 por Dŭobaŭ-pagodo

kaligrafo". Laŭ legendo li ĉiam ebriis ĝis freneza kriado kaj rapida kurado antaŭ ol fari kaligrafadon. Liaj kaligrafaj

similas al draka flugo kaj feniksa danco.

En Song-dinastio elstaris *ŝing*-kaligrafio. Tiam estis kvar famaj kaligrafoj: Su Dongpo, Hŭang Tingĝjan, Mi Fu kaj Caj Ŝjang. El ili la plej elstara estis Su Dongpo (1037—1101). Li estis poeto kaj pentristo. En kaligrafio li tre atentis pri uzo de peniko kaj ĉina inko. Li eĉ prove uzis pentrarton en kaligrafado.

En Jŭan-dinastio (1279—1368) la kaligrafio malrapide evoluis, heredinte la atingojn de la pasinteco. Tiam la plej eminenta kaligrafo estis Ĝaŭ Mengfu (1254—1322). Li estis la plej talenta en skribado de *kaj*- kaj *ŝing*-kaligrafaj. Li multe lernis de la antikvaj kaligrafoj. La strukturo de liaj kaligrafaj estas tre bela. Li skribis multe, rapide kaj lerte, sed ne stabile. Lia reprezenta verko estis la "Stelea Epigrafo de Ĉiŭ E".

En Ming-dinastio (1368—1644) la kaligrafoj verkis grandnombrajn rarajn kaligrafajojn, heredinte la tradicion en penikuzado, strukturo de la ideogramoj kaj aranĝo de la tuta skribaĵo. Tiam la plej eminentaj kaligrafoj estis Ĝu Junming, Ŭen Ĝengming kaj Dong Ĉjiĉang. La *kaj*-, *ŝing*- kaj *caŭ*-kaligrafaj de Ĝu posedas la plej bonajn ecojn de la kaligrafio. Liaj reprezentaj verkoj estas "Poemaro pri Tajhu-lago". La verko "Ĉibi" de Ŭen farita per *ŝing*-kaligrafio elspiras forton kaj la tuta skribaĵo estas aranĝita bele.


En Ĉing-dinastio (1644—1911) reprosperis la kaligrafio de Ĉinio. La tiamaj famaj kaligrafoj estis Ŭang Dŭo, Fu Ŝan, Deng Ŝifu, Ĝeng Banĉjaŭ, Ĝin Dongŝin, He Ŝaŭĝji kaj Ĝaŭ


Ĝiĉjan. Ĝeng Banĉjaŭ faris ĉefe *caŭ* kaj *li*-kaligrafajojn. Li skribis pentro-maniere, kaj ĉiu ideogramo kaj ĉiu streko elspiras elstarajn trajtojn de diversaj skoloj. Liaj kaligrafaj vere refreŝigis la legantojn. He Ŝaŭĝji estis diligenta kaligrafo. Li faris kaligrafadon per aparta movo de manartiko. Tial liaj verkoj havis originalan guston.

En la nuna tempo aperis majstra kaligrafo U Ĉangŝŭo. Surbaze de la "Ideogramoj sur la Ŝtonaj Tamburoj", li lernis de ĉiuj kaligrafaj kaj fariĝis majstro. Liaj verkoj estas striktaj, fluaj kaj variaj en strukturo. Li faris pentraĵojn per kaligrafaj teknikoj, tiel ke liaj pentraĵoj odoras kaligrafaje. La nunaj famaj kaligrafaj estis Ju Joŭfen kaj Ŝen Jinmo. Ili ĉiuj faris sian kontribuon al disvolviĝo de la ĉina kaligrafio. □

\* En la ĉina historio estis ses sinsekvaj dinastioj, kiuj prenis Nankinon kiel sian ĉefurbon. Ili estis U-regno en la periodo de la Tri Regno, la Orienta Ĝin-dinastio, la dinastioj Song, Ĉji, Ljang kaj Ĉen. La ĉinaj historiistoj nomas ilin kune Ses Dinastioj.

"Himno al Feino de Lŭo-rivero" skribita de Ĝu Ĝiŝan de Ming-dinastio en 1525






Osto kun gravuritaj ideogramoj

Kopio de skribaĵoj sur osto



Intajla noto interne de la mangŝujo

Manŝujo kun feniksa desegno de la Okcidenta Goŭ-dinastio



Epitafo por Gang Ĉjan de la Orienta Han-dinastio (25 a.K. — 220 p.K.)

Gravurita noto sur ŝtona tamburo de la orienta Goŭ-dinastio






Skribaĵo sur tomoŝtono de Gang Menglong de la Norda Ŭej-dinastio (220-265)

Skribaĵo de Ŭang Sjiĝi (521-579) de la Orienta Ĝin-dinastio



Skribaĵo de Liŭ Gongĉjŭan (778-865) de Tang-dinastio

Skribaĵo de Hŭaj Su (725-785) de Tang-dinastio



Skribaĵo de Su Si  
(1037-1101)  
de Song-dinastio

水雲裏空庭黃葉寒  
破竈燒滷葷那  
知是寒食但見烏  
銜帛  
君門深  
九重噴美玉在万里是  
哭塗窮死及吹不  
起

右荊州軍食二首

東坡詩云寒食為逐逐而教揚以後一人  
此字乃補裝物日所書後有山谷  
跋傾倒已極所謂無妄村佳乃佳

Skribaĵo de Hūang  
Tingĝjan (1045-  
1105) de Song-  
dinastio

我見黃河水  
凡經幾度清  
水流如激箭  
人世如浮萍  
癡屬根本  
業愛為煩惱  
阮輪迴或許  
劫不解了元明  
寒山出此語舉  
世狂癡半有


Skribaĵo de Mi Fu (1051-1107) de Song-dinastio

聲白面五郎年六  
神武東有  
天下造不使敵杆使傳道者  
錦東南第一州棘墜湖山雨清  
晴照襄陽野老漁竿密不  
愛紛華愛泉石相逢不約  
無迹與提古書同岸憤注  
明屢黨初相慕濯埃酒心求  
易憲翩、道鶴雲中侶土宜  
廷錫那一顧逐業未益業何  
深至湛、具區無底心可恰一點  
終不易拉駕躬勤尋漫仕  
漫仕平生四方走多為英才並肩  
肘少者俳辭詭罵鬼老學結  
夷慢存口一官聊具三徑資取  
捨殊塗苦迴首

元祐戊辰九月廿三日溪堂米黻記




Skribaĵo de Gao Mengfu (1254-1322) de Ĵuan-dinastio




Skribaĵo de Wang Dū (1592-1652) de Ming-dinastio

Skribaĵo de He Saūgji (1799-1873) de Ĉing-dinastio



Kopio de ideogramoj sur ŝtona tamburo, skribita de U Cangŝuo (1844-1927)



Ĉu vi interesiĝas pri la ĉina kuirarto?

Ĉu vi volas lerni la preparadon de ĉinaj pladoj?



*Jen estas 2 libroj tiuflankaj eldonitaj de la Ĉina Esperanto-Eldonejo, bonvolu legi:*

## KURACAJ MANĜAĴOJ

Kompil. Ŭeng Ŭejĝjan k.a. Trad. Tan Ŝiŭĝu  
1986.

64. 18.5 cm. 15-Es-2047P. £0,65  
US\$1,25

Estas rekomendataj 87 receptoj de sanigaj trinkaĵoj, konfitaĵoj, pladoj k.a. Ĉe la fino troviĝas 3 apendicoj: Pri efikoj de ingrediencoj de la kuracaj manĝaĵoj, Tabelo pri ĉefaj nutroelementoj bezonataj de la homa korpo, Nutraĵoj taŭgaj kaj netaŭgaj por pacientoj. Kun koloraj bildoj.



## ĈINAJ FAMILIAJ PLADOJ

Trad. Liŭ Cajŝeng. 1986. 80p. 18.5 cm.  
15-Es-2061P. £1,10 US\$2,15

Ĝi enhavas 86 ĉinajn pladojn. Plejparto el ili estas ne nur nutraj, belkoloraj kaj bongustaj sed ankaŭ malkaraj kaj facile prepareblaj. Kun detalaj klarigoj la libro multe helpas al tiuj kiuj interesiĝas pri la ĉina kuirarto. Kun koloraj bildoj.

Mendu ĉe: **Libroservo de UEA**  
**Perantoj de EPC**

aŭ **Esperanta Sekcio de la Internacia Libro-Komerca Kompanio de Ĉinio (GUOJI SHUDIAN) P.O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio**

## Vilaĝa orkestro sensacia en Pekino

Lastan septembron, iu kamparana orkestro venis al Pekino kaj faris originalan ludon, kio rapide vekis sensacion en Pekino kaj fariĝis paroltemo interesa por la ĵurnalistaro kaj muzikistaro de la ĉefurbo.

Ĝi estis kamparana orkestro el Dongbang-distrikto de la urbo Ĉangŝu sude de Jangzi-rivero.

En la komenco de la kuranta jaro, kiam mi faris oficvojaĝon en Ĝjangsu- kaj Ĝeĝjang-provincoj, mi vizitis la orkestron. Tiam regis tie ankoraŭ malvarmo. Kiam nia aŭto atingis Dongbang, de malproksime aŭdiĝis orelplaĉa koncerto "Frua Prin-tempo en Akvolando".

Laŭ la bela melodio mi trovis tiun faman orkestron en malgranda ĉambro duonluma kaj vidis, ke ĝiaj membroj lerte ludas klarnetojn, saksofonojn, trumpetojn, violonojn, kontrabasojn k.a. Ili sin tenis serioze kaj memfide kiel profesiaj ludantoj.

Maljuna Lu, estro de la Fabriko de Aparatoj el Korodimuna Ŝtalo de Dongbang-distrikto kaj direktisto de la orkestro, raportis al mi pri la orkestro.

En la lastaj jaroj, dank' al la sukcesa reformo de la ekonomia strukturo en la ĉina kamparo, la kampara var-ekonomio havis grandan disvolviĝon, leviĝis jaron post jaro la materia vivni-


velo de la kamparanoj de Dongbang-distrikto. La riĉiĝintaj kamparanoj komencis novan strebadon al kultura vivo.

Tamen, la profesiaj operaj trupoj malofte prezentis en vilaĝoj. Estis malmultaj kamparanoj, kiuj havis ŝancon spekti operon en la urbo. Kion fari? Prudenta maljuna Lu decidis investi pli ol 30 000 ĵuanojn por aĉeti eŭropajn muzikilojn, kaj fondis la orkestron en marto 1985.

Kvankam ĝiaj 26 membroj estis elektitaj el centoj da volontuloj de la tuta distrikto, tamen, plejparto de ili en la komenco eĉ ne komprenis la simplan muzikan notacion, por ne paroli pri liniaro kaj muzikludo. Tio alportis malfacilon al instruisto Ĝu, invitita el la urbo. Li devis ekzameni la kandidatojn per plej simpla etudo kaj difinis, ke tiu, kiu ludas muzikilon laŭ la etudo, povas trapasi la ekzamenon.

Kiel penige sin ekzercis la membroj en muzikludo! Kiam la altstatura junulo Hŭang Ĝjunĉji estis komisiita ludi trombonon, lia patro diris al li: "Junulo faras nenion alian krom blovi trombonon? Tion mi ne konsentas!" Ĉiutage li devis ŝtele sin ekzerci en blovado sur sovaĝejo plenenergie. La 20-jara junulino Zoŭ Ĝinghŭa estis komisiita ludi tamburon, ĉar ŝi iom ludis zimbalonon. Sekve, ŝi ofte sin ekzercis per frapado ĉie, kie ŝi estis. Oni estis ĝenata de la bruoj, kaj ŝi do

*La kamparana orkestro turneas en kamparo.*





sin kaŝis en malnova konservejo por sin ekzerci. Post unu monato fendetiĝis la lipoj de la trombonisto, veziketiĝis fingroj de la tamburistino, ŝveliĝis la brakoj de violonistoj. . .

Ili ne estis profesiaj ludistoj, tial ili ne povis forlasi la produktadon por ekzercado. Iliaj familioj ĉiuj kulturis kampojn laŭ la kontrakta laborsistemo. Frumatene ili devis mastrumi la domon, matenmanĝinte ili devis iri al la fabriko por labori, vespere reveninte de la fabriko ili devis labori surkampe. Tial ili estis tre okupitaj. Tiuj gejunuloj tamen persistis en instrumenta ekzercado matene, tagmeze kaj vespere. Por plenumi la taskon donitan de la instruisto, ili sin ekzercis preskaŭ ĉiuvespere ĝis la deka horo. Post du monatoj ili rikoltis certan sukceson en ludo. En la unuafoja ludo en la distrikto ili gajnis varman aplaŭdon de la aŭskultantoj.

Adiaŭinte la maljunan Lu, mi intervjuis pliajn membrojn de la orkestro.

Bela 18-jara flutistino Gu Lifang honteme diris al mi, ke ŝi estis malĝoja, kiam la instruisto postulis, ke ŝi lernu flutadon. Tio estis ne pro ŝia sencio pri fluto, sed pro tio, ke ŝi neniam vidis virinon fluti. Kompreneble, ŝi povis fari nenion alian ol obei la decidon de la instruisto, ĉar li opiniis ŝin taŭga por blovi fluton. Ekster ŝia atendo, la fluto ŝajne favoris ŝin. Post kiam ŝi ludis unu kompletan muzikaĵon, ŝi estis tuj ravita de la ĉarma tembro de fluto. Nun, ŝi, kiel lerta flutistino, deziras esti eminenta profesia flutisto. Por efektiviĝi sian deziron ŝi vizitas la Ŝanhajan Konservatorion unufoje en ĉiu semajno kaj lernas, flutludon. Estas tre laciga afero, ke ĉiufoje, post kiam ŝi aŭskultas



*La kamparana orkestro ludas en sia hejmloko.*

lecionon 2-3 horojn, ŝi devas reveni en la sama tago, kaj por la ira-reira vojo ŝi bezonas pli ol 6 horojn. Laŭdire, ankoraŭ pluraj membroj de la orkestro, kiel juna Gu, lernas muzikilan ludon en Ŝanhajo.

Ŝje Ĝjeĉing kun miopaj okulvitroj, ludisto de elektrona orgeno kaj vicdirektisto de la orkestro, lernis muzikan teorion en iu profesia supera mezlernejo kaj eble estas la sola membro de la orkestro, kiu estis edukita per elementa muzika teorio. Tiu ĉi-pedanta vicdirektisto ŝajne ne kontentis pri la sukceso de la orkestro gajnita en Pekino. Li ofte afliktiĝas, ke iuj membroj ne povas trovi ĝustajn sonojn, kaj ke liaj scioj pri muziko ofte faras lin tiel ambicia, ke li volas

pli normaligi la orkestron kaj havigi al ĝi pli altan nivelon, sed la realo estas multe malproksima de lia idealo. Li provis komponi kun la espero, ke liaj komponaĵoj kaj la muzikaĵoj luditaj de lia orkestro estos pli riĉaj je akvolanda gusto de Dongbang. Tio ŝajne estas pli reala, ekzemple, la konĉerto "Frua Printempo en Akvolando" estas komponita de la orkestro.

Kompreneble, se oni rigardas ĝin laŭ la normo de faka orkestro, ĝi sendube estas orkestro kun rudimenta nivelo, kaj estas netolerebla bruo en ĝia konĉerto.

Tamen, tiuj kamparanoj, longtempe laborintaj surkampe, demetis siajn ŝvitomakulajn vestojn kaj en eŭropaj vestoj ascendis muzikan halon, kio havas

# PLUMOJ DE BIRDOJ

Eksonoris por leciono. Instruisto suriris sur podion kaj diris: "Hodiaŭ mi donas al vi lecionon pri plumoj de birdoj."

"Ni scias, ke ĉiu birdo surhavas plumojn," diris iu lernanto.

"Jes, ĉiu birdo sin vestas per plumoj, sed ni ne devas subtaksi la plumojn de la birdoj. En la mondo nur la birdoj havas belajn plumojn. Kiu scias, kiom da plumoj havas pasero?" demandis la instruisto.

"Mi ne scias," alia honteme kapneis.

"Pasero havas ĉ. 3 500 plumojn en vintro. Ĝiaj plumoj en julio estas malpli multaj je 400 ol en vintro. Ordinara birdo havas po ĉ. 1 000-4 600 plumojn. Malsamspecaj birdoj havas malsamajn nombrojn da plumoj. Samspecaj birdoj havas preskaŭ saman nombron da plumoj. Kaj krome, iliaj plumoj multiĝas aŭ malmultiĝas en tiu aŭ alia sezono. Kiu scias, por kio utilas la plumoj?"


"Sen plumoj la birdoj ne povas flugi," respondis la tria.

"La plumoj havas tri ĉefajn funkciojn: unue, doni levkaj puŝforton al flugado de la birdoj; due, delikatigi ilian haŭton kaj reguligi aeron por ilia korpo; kaj trie, servi ĉiel ilia vesto," respondis la instruisto ridetante.

"Kiu scias, kiel evoluis la birdaj plumoj?" demandis la instruisto denove.

"Ni ne scias," unuvoĉe respondis la lernantoj.

"La birdoj devenas de ramploj kun skvamoj sur la korpo. La skvamoj iom post iom transformiĝis en plumojn," klarigis la instruisto. □



signifon multe pli grandan ol tiu de la muzikludo mem. Estas ne senkaŭze, ke ilia prezentado estis varme aplaŭdita de diverslokaj aŭskultantoj kaj la teatro estis plena de aŭskultantoj ĉiutage, kiam ili ludis en la urboj Pekino, Ŝanhajo, Nankino kaj Suĝoŭ.

Jam forpasis pli ol du jaroj, de kiam fondiĝis la orkestro. Je

200 000 jŭanoj ĝin financis la Fabriko de Aparatoj el Korodimuna Ŝtalo funkciigata de la distrikto. En la pasintaj du jaroj la orkestro ne postulante pagon ludis pli ol 80 fojojn por la kamparanoj en sia loko kaj ĝiaj najbaraj vilaĝoj kaj la nombro de aŭskultantoj atingis dekmilojn. Nun, la orkestro refoje aĉetis naciajn muzikilojn kontraŭ pli

ol 20 000 jŭanoj. Maljuna Lu ridete diris al mi: "En la estonteco niaj membroj scipovos ludi muzikilojn de Ĉinio kaj la Okcidento. Tion ni nomas kombiniĝo de ĉinaj kaj okcidentaj muzikiloj. Mi ne kuraĝas esperi, ke la orkestro atingos la nivelon de profesia orkestro, kaj mi estas kontenta nur, ke ĝi estas prospera, verva kaj ŝatata de la kamparanoj." □

ĈEN BAŬHE:

# LA PEKINA INFANA PIEDPILKA LERNEJO

La Pekina Infana Piedpilka Lernejo fondita antaŭ du jaroj troviĝas en la korto de la Ŝiĉahaj-a Postleciono Sporta Lernejo. Ĝi prezentas la belan perspektivon de la ĉina piedpilkado en la okuloj de tiuj, kiuj zorgas pri la afero, kaj estas rigardata kiel lulilo de piedpilkaĵo steluloj.

## NASKIĜO EN REFORMADO

La lernejo kun du klasoj kaj 32 lernantoj ne estas granda. Ĝi estas destinita por provado.

Rilate ĝian fondiĝon, lernejestro Liŭ Hongŭej emocie diris: "Ĝi estas produktaĵo de reformado."

La 46-jara lernejestro, altstatura, antaŭe estis instruisto de fizikkulturo kaj sporto en elementa lernejo, Pekino. Li tre amas piedpilkan sporton. Kiam li lernis en mezlernejo, li estis membro de la Pekina Infana Piedpilka Teamo. En 1963 li forlasis la teamon kaj fariĝis instruisto en elementa lernejo kaj kumule piedpilka trejnisto en la Ŝiĉeng-a Postleciono Sporta Lernejo de Pekino.

Post kiam Ĉinio komencis praktiki reformadon en 1979, aperis en diversaj lokoj de la lando diversaj lernejoj funkciigataj de individuoj kaj kolektiivoj, en kiuj oni instruas fremdajn lingvojn, muzikon, belarton, la ĉinan lingvon kaj literaturon, matematikon, librotena-



*Ekzercado sub la gvido de lernejestro Liŭ Hongŭej*

don, tajloradon, elektroteknikon k. a. por adaptiĝi al la bezono de la socio.

Inspirate de ili, Liŭ Hongŭej opiniis, ke unu el la kaŭzoj de la malalta nivelo de la ĉina piedpilkado kuŝas en tio, ke estas tro malfrue por la piedpilkistoj komenci la trejnadon en sia knabeco. Se oni fondos infanan piedpilkan lernejon por havigi okazon de trejniĝo al tiuj infanoj talentaj por piedpilko, tio certe favoros al la disvolviĝo de la ĉina piedpilko.

Lian opinion finfine aprobis la Fizikkultura kaj Sporta Komisiono de Pekino. En marto 1985 naskiĝis la Pekina Infana Pied-

pilka Lernejo kaj Liŭ Hongŭej ekfunkciis kiel ĝia estro.

## IRI SIAN PROPAN VOJON

Trejni infanojn en piedpilko estis tute nova tasko por Liŭ Hongŭej kaj liaj kolegoj. En Ĉinio mankis tiuflankaj spertoj, kaj estis malfacile lerni ilin alilande.

Konsultinte projektojn kaj rimedojn pri piedpilka trejnado al infanoj prezentitajn de koncernaj fakuloj kaj ripetfoje studinte fiziologiajn kaj psikologiajn karakterojn de infanoj, Liŭ Hongŭej kaj aliaj trejnistoj opiniis, ke oni devas preni la povon koni kaj teni sub si pilkon kiel

la celon en la komenca tempo de trejnado, kaj poste iom post iom sin turni al lernado de la teknikoj de pilk-transdono, pilk-haltigo, ŝoto k.a. Ili ellaboris kompletan da trejnajn procedojn malsaman ol tiu uzata ordinare en piedpilka trejnado de Ĉinio.

Dank' al ilia pacienca kaj zorgema direktado tiuj 5-6-jaraj infanaj piedpilkistoj akiris admirindan progreson post unujara trejnado. Precipe ilia pilktena povo estis admirata de multaj plenaĝaj piedpilkistoj. Nun pli ol duono de la infanoj povas teni pilkon du minutojn per la piedoj, genuoj kaj kapo, iuj eĉ povas teni ĝin tri minutojn.

Ilia progreso interesis ankaŭ la ĉinajn ĵurnalismajn rondojn. Televidstacioj kaj gazetoj de Pekino raportis pri tio unu post alia. En majo 1986 laborantoj de televidstacio de FR Germanio venis al Pekino por intervjui tiujn estontajn stelulojn de piedpilkado.

### *Infanoj en leciono*



Post la dujara baza trejnado, la lernejo aranĝis por ili ekzercajn konkursojn kun piedpilka teamoj de najbaraj elementaj lernejoj, por ke ili praktiku la sciojn kaj teknikojn lernitajn en la baza trejnado.

Rilate la dujaran trejnadon, Liŭ Hongĝej konkludis, ke la trejna orientado estis ĝusta kaj bone efikis. Tamen oni devas senĉese akumuli spertojn por turni ĉion lernitan en praktikan kapablon de la baza trejnado.

### **DEVO AL LA INFANOJ**

Pri la kulturado al tiuj 7-8-jaraj infanoj lernejestro Liŭ diris: "La infana piedpilka lernejo respondecas pri la ĉiufanka edukado al la infanoj-lernantoj. Krom trejnado, ankaŭ estas nia devo zorgi ilian lernadon kaj vivadon kaj kulturi en ili altan moralecon."

La infanoj loĝas en la lernejo de lundo ĝis sabato ĉiusemajne.

Ilin prizorgas tri instruistoj. Vespere de sabato ilin venigas hejmen iliaj gepatroj.

La infanoj lernas en najbara lernejo antaŭtagmeze ĉiutage. Por eviti akcidenton, instruistoj akompanas ilin survoje al kaj de la lernejo.

Post tagmanĝo estas siesto difinita de la lernejo. Ĉiu infano nepre devas ripozi unu kaj duonan aŭ du horojn. Post siesto ili devas fari sian hejmtaskon unu horon gvidate de la instruistoj.

La trejnado komenciĝas je 15:30 kaj daŭras ĉirkaŭ 3 horojn. Dum trejnado la trejnistoj turnas grandan atenton al la intenseco kaj tempo de trejnado kaj ripozigas ilin en konvena tempo.

Post vespermanĝo la infanoj libere disponas sian tempon gvidate de instruistoj. Iuj rigardas televidon, aliaj ĝuas muzikon, triaj daŭre faras la hejmtaskon, kiun kontrolas la instruistoj.

Vespere de merkredo estas tempo por la gepatroj viziti siajn infanojn.

En tiu ĉi vespero ĉie regas vikleco en la lernejo. Karesante sian infanon, la gepatroj interŝanĝas opiniojn kun instruistoj kaj trejnistoj, kiuj kiel eble plej detale konigas al ili la trejnadon, lernadon kaj vivon de iliaj infanoj en la lernejo. En la pasintaj du jaroj la lernejo kaj la gepatroj de la infanoj harmonie kunlaboris, kio garantiis por la sana kresko de infanoj.

Nun la 32 infanoj ne nur rapide progresas en la piedpilka trejnado, sed ankaŭ bone lernas kulturajn sciojn. En la lasta ekzameno ili ĉiuj gajnis pli ol 90 poentojn por ĉiu el la du lern-

# Kanto-stelulo migranta inter kafejoj

(Novelo)

(Dua Parto)

B

“Ĉu vi bonvolus subskribi ĉi tie? Tion mi petas por mia filino. Hodiaŭ estas ŝia naskiĝtago.”

Ŝi tenis en la mano la gazeton “Ora Tempo”.

“Pro kio vi volas havi mian subskribon?” Ĉiŭ Jang demandis la knabinon per rigardo.

“Ĉar vi estas kanto-stelulo.” La nigraj okuloj de la knabino vidigis naivecon kaj kuraĝon, tute sen ĝenateco montrita de la patrino.

Sed fakte, li neniam opiniis

sin kanto-stelulo, kaj neniam li havos tiun penson.

Tamen antaŭe li esperis esti brila stelo. Li volus eniri en la terenon de arto por realigi sian sonĝon. Li amas kanti kaj plie havas bonan voĉon.

Aŭdinte unuafoje lian kantadon, la grandokula instruisto de la kultura domo asertis, ke li estos multepromesa. Lian talenton atentis ankaŭ instruistoj de la arta fakultato de instruista instituto. Sed li lernis ne bone kaj malsukcesis en ekzamenoj de multaj lernobjektoj.

Li ne hontis esti kantisto en

kafejo. Li havis nenion por esti aroganta kaj malmodesta. Ofte okazis, ke li kaj liaj kunuloj iom kantis kaj ludis gitaron ĉe la komenco de sia strateto. Kun tagoj li ekhavis kunlaborantojn kaj ĥoristojn. Sed kompare kun stelaj kantistoj, filmaktoroj kaj pilkoludistoj, lia travivaĵo estis io bagatela.

Ĉiŭ Jang klinis la korpon, skribis sur la frontispico la vortojn “Ĝoja Naskiĝtago” kaj diris al la aŭskultantaro: “Tiu fratineto diris al mi, ke hodiaŭ estas la 14-a datreveno de ŝia naskiĝo. Tio signifas, ke ŝi adiaŭos sian infanecon. En tiu feliĉa kaj nefor-

objektoj, iuj eĉ cent poentojn por ĉiu lernobjekto.

Rilate la kreskadon de la infanoj, iliaj gepatroj estas mirigitaj, ke ilia kapablo multe progresis en aranĝo de sia vivo, pri kio iuj patrinoj eĉ estas fieraj.

La 7-jara Hŭang Pengpeng lernis en la lernejo du jarojn. Lia patrino, pli-ol-30-jara laboristino, diris, ke post kiam Pengpeng komencis lerni en la lernejo, ŝi maltrankviliĝis, ke li estas tro juna kaj ne eltenos la trejnadon, sed nun li fariĝis komprenema. Reveninte hejmen, Pengpeng eĉ helpas ŝin lavi manĝilaron kaj ŝvabri la plankon. Kiam malvarmiĝas, li tuj sin vestas per pli dika vesto. Nun li frue ellitiĝas eĉ en dimanĉo.

## VALORA SUBTENO

La Pekina Infana Piedpilka Lernejo ricevis ne nur la subtenon de koncernaj instancoj sub la Fizikkultura kaj Sporta Komisiono de Pekino, sed ankaŭ grandan helpon de diversaj rondoj de la socio. Oni povas diri, ke la lernejo ne povus ekzisti ĝis hodiaŭ sen tiuj fervoraj subtenantoj.

Ĉe la komenco mankis al la lernejo monrimedoj. La estro de la Pekina Ĝjile-a Lumil-fabriko bone komprenis la animstaton kaj aspiron de Liŭ Hongŭej pri funkciigo de la piedpilka lernejo. Li financis la lernejon per 70 000 jŭanoj kaj promesis helpi ĝin per 10 000 jŭanoj ĉiujare estonte.

La Siĝjiĉing-a Maŝin-fabriko de Pekino estas malgranda. Informiĝinte pri la financa malfacilo de la piedpilka lernejo, ĝi tuj donacis 10 000 jŭanojn.

Al la lernejo mankis taŭgaj trejnistoj. Ĝang Ĝuoŝeng, piedpilkisto de la Ŝiĝingŝan-a Ŝtala Kompanio de Pekino, decideme rezignis sian oficon de sekciestro kaj ekfunkciis kiel profesia trejnisto de la lernejo.

Iuj gepatroj de la infanoj trovis, ke mankas al la lernejo ĉiutagaj vivbezonaĵoj, ili do pruntedonis al ĝi siajn tablojn, seĝojn, televidilojn k. a.

La subteno de la socio donis grandan kuraĝigon al Liŭ Hongŭej kaj liaj kolegoj kaj vidigis al ili la esperon metitan sur la lernejon. □

gesebla momento mi prezentos al ŝi kanton kiel mian donacon. La titolo de la kanto estas 'Malgranda Olivo'."

*Avino donis etan olivon,*

*Ho, ĝi 'stas acida kaj  
adstringa.*

*Jetinte for la olivon,*

*Mi sensis la guston aromiva.*

*Mi serĉis ĉeloke la olivon,*

*L' retrovo estis neebla.*

Estas ŝajne eksterkutime, ke kantisto rifuzas alies adoron. Sed Ĉiŭ Jang tamen ĝojis, ke li ne subskribis sur la gazeto. Li estis prudenta. Li konis sin pli bone ol ĉiuj aliaj. . .

"He, amikoj, tordiĝu, svingu viajn koksojn. . ."

La triviala krio venis de per-sono kun ĉarma vizaĝo.

"Ĉu vi volas, ke mi plenigu por vi vakecon?" Ĉiŭ Jang diris kun okuloj severaj.

"Ĉar mi pagis vin!" la trivialaj okuloj montris nenian cedon.

. . . La okuloj trafitaj de la ofendo senprokraste forturniĝis de la objekto rigardata. . .

Ĉu mi nur por mono? Jes, almenaŭ mi akceptis la monon.

Nun kiam mi akceptis la monon, mi devas suferi ĝian kate-non, kiu komenciĝis de tiam, kiam direktoro Ĝang blovis sur la sigelilon kaj ambaŭmane premis ĝin sur la kontraktan paperon.

Jen tiel li kontraktis kun tri kafejoj.

Li komencis plenumi la kontraktojn kaj hastis inter la tri kafejoj.

Ĝenerale dirite, tiaj kantistoj migrantaj inter pluraj lokoj celas akiri pli da mono. . .

Tamen Ĉiŭ Jang ne pensis akcenti monon almenaŭ ĉe la komenco. Li nur volis kanti pli ofte, ĉar la grandokula instruisto tiel admonis. Sed je la unua fojo Ĉiŭ Jang jam perdis spektantojn. . .

"Kiu estas tiu knabo? Kiel alte li tenas la nazon! Mallaŭtigu la megafonon kaj donu al li lecionon."

Ĉiŭ Jang ne estis trejnita en belkantado, kaj la mikrofono fariĝis gravega instrumento por kanti vulgaran kanton. Li malsukcesis en la unuafoja prezentado, kaj tion li atribuis al la mikrofono.

"Mi intencas prezenti kelkajn aliajn kantojn," li diris al la orkestro. Li ne esperis, ke lin trafos nesavebla fiasko.

La direktisto de la orkestro foliumis lian muziknotan kajeron kaj senzorge apudmetis ĝin: "Ĉiuj tiuj kantoj estis jam prezentitaj. Ne venos al vi la vico por kanti tiujn ŝatatajn kantojn. Ha, ha. . ."

Li preskaŭ malesperiĝis. Li forkurus, se li ne estus katenita de la kontrakto.

Sed la grandokula instruisto kuraĝigis lin neniel retiriĝi, sed anstataŭe trovi por si novan eliron.

Li konsilis al li, ke li altiru al si aprecantojn per kanto kun danco, kvankam tio estos malfacila.

La sukceso en la unuafoja provo faris lin plaĉa al la aŭskultantoj. Kantante li histeriis, kriegis, grandamplekse movis siajn korpopartojn. . . Finfine

li firmigis sian pozicion en la kafejoj.

Sed li sentis laciĝon. Ĉiuvespere li devis kanti en la tri kafejoj kaj post tio revene bicikli al sia industria distrikto malproksima de la urbo. Li laboris en iu ŝipfarejo.

Vivi ne estas ĝuo, sed tre peza ŝarĝo, tamen li sentis, ke li oferis tro multe kaj bezonis kompenson praktikan kaj efektivan.

Nature li ekpensis pri mono. Li bezonis doni sumon da mono kontraŭ moderna veturilo, por ke ĝi kompensu la troan konsumiĝon de la energio. Li pli bezonis, ke mono pruvu la fakton: Li faras ĉion tion ne sole por kontribui.

La triviala krio de la "ebriulo" kun ĉarma vizaĝo tuŝis la kaŝitan vundon, ke refoje humiliĝis neesprimeble lia juna koro.

## C

Finiĝis la kaftrinkado. Kvietiĝis la halo. Restis nur kelkaj klientoj lante gustumantaj la lastajn gutojn de la malvarmiĝinta kafo.

Ĉiŭ Jang prenis sian surtuton kaj malrapide iris eksteren kun mieno laca kaj deprimita.

Kiam li trairis la mezon de la halo, subite mallumiĝis la kristala lustro en la centro de la halo. Ĉiŭ Jang haltis por momento, kaj en la mallumo li ne-reteneble fiksitis rigardon sur la separeo n-ro 14.

Li intencis tie sidi sola kelkajn minutojn. . . , sed la lokon okupis maljunulo.

Ĉiŭ Jang atakis scivolemo. Antaŭe la loko estis malofte okupita de maljunulo, ĉar la separeo najbaris al ronda kolono

kaj estis ŝatata nur de timidaj geamantoj. Ŝajne la maljunulo estis en subtila animstato. Ĉu li havis ankoraŭ la koron de junulo aŭ dronis en rememoro pri sia antaŭa amafero? . . .

Ĉiŭ Jang pretervole ekridis al li.

“Junulo, ĉu ankaŭ vi volas sidi ĉi tie?” demandis la maljunulo en obskuro, kvazaŭ la voĉo venus el profunda valo.

“Ho ne,” Ĉiŭ Jang respondis kun respekto. “Jam malfrue, mi ne ĝenos vin. . .”

“Junuloj estas bonvenaj ĉiam, ĉu en tago ĉu en profunda nokto. Venu kaj sidiĝu. Apuden metu vian surtuton.”

La vizaĝo de la maljunulo mienis afable. La haroj preskaŭ tute griziĝis kaj malstreĉiĝis la palpebroj, tamen la okuloj estis plenaj de saĝo kaj humuro.

Ĉiŭ Jang ne rifuzis plu kaj sidiĝis en la separeo.

“Ĉu mi proponu al vi tason da kafo sen sukero? Multaj junuloj ŝatas tian kafon por montri, ke ili jam ne estas sukeravidaĵaj.”

“Jes,” kun rideto Ĉiŭ Jang levis la tason kaj ektrinkis el ĝi. “Ha —” li montris grandan kontenton.

“Nu, kiel? Ĉu amara? Tamen forta. Same kiel la vivo, iom amara, tamen gustoplena.”

Ĉiŭ Jang kun miro rigardis al la maljunulo kaj penis diveni la motivon de la diro el liaj penetremaj okuloj.

La maljunulo duonfermis unu okulon kaj diris en ruzeta rideto: “Mi havas nepinon samaĝan kiel vi. Ŝi ofte plendas, ke mi estas pedanto kaj havas neniom da kono pri la nunaj junuloj. Mi ne konsentas kun ŝi. Ni maljunuloj

havas niajn proprajn manierojn por trakti aferojn, kaj ni emas observi la socion senekscite, objekte kaj aplombe. Ĵus antaŭ momento, kiam via rigardo falis sur la separeon n-ro 14, mi rimarkis aflikton en viaj okuloj. Se vi ne rigardus min fremdulo, mi do deziregus aŭskulti vian opinion. Eble mi povos iel helpi vin.”

La basa kaj lanta parolo de la maljunulo varmigis al Ĉiŭ Jang la koron. Ĉesiginte amaran rideton kaj farinte iom da paŭzo, li komencis rakonti libere: “Avo, mi estas kantisto kaj ĉiutage mi vidas milojn da vizaĝoj. Iun tagon mi vidis inter ili eksterordinaran vizaĝon, kiu ekscitis ĉe mi korbataĉon.

“Mi ne scias, kiel priskribi la vizaĝon de la knabino. Unuvorte, neniu superba vorto en la mondo taŭgas por ŝi. Ŝia vizaĝo kun kristale klara rideto sentigas ĉe mi grandan prematecon, kiun mi tamen ne volas forlasi longtempe.

“Ne ridu min, ke mi teksas romantikan sentimentalecon. Mi memoras, ke siatempe mi ja tiele turmentis min.

“La fraŭlino estis iom mistera pro sia subita veno kaj foriro, tial mi ne trovis ŝancon kontaktiĝi kun ŝi. Mi certigas nur tion, ke ŝi venis ĉiufoje en sabato kaj senescepte sidis en la separeo n-ro 14.

“Nu, mi rapidigu mian rakonton.

“Iun sabaton mi neatendite ricevis slipon kun la skribo: N-ro 14 deziras interparoli kun vi.

“Avo, mi ofte ricevas tiajn slipojn kun la skribo ‘INTERPAROLO DEZIRATA’. Ili plejparte estis senditaj de knabinoj. Antaŭe mi nur silente forbruligis

ilin kaj neniam menciis tion al aliaj. Sed tiu ĉi slipo veninta de la separeo n-ro 14 tiel ekstazis min, ke konvulsiis la muskoloj de mia vizaĝo. Mi haste paŝis al la loko. Sed ekster mia imago, la fraŭlino bonvenigis min ne per karesa rigardo kaj dolĉa rideto. Ŝi nur sin distris per tri kuleroj sur la tablo. Ŝi tute absorbiĝis en la ludo, ke ŝi eĉ ne palpebrumis ĉe mia alveno. En longa tempo mi nur stulte staris apude kun streĉita koro kaj rigardo fiksita sur ŝi, atendante ŝian parolon.

“Finfine ŝi finis sian ludon. La tri kuleroj starigitaj piramide apogis sin unu al alia, kiel subteniloj de kampfajro por pikniko. Ŝi malrapide levis la okulojn, senzorge movis rigardon al mi kaj diris ‘Volo’, montrante unu el la kuleroj per sia delikata fingro.

“Montrante alian kuleron ŝi diris: ‘Naturdoto’.

“Kiam mia rigardo sin direktis laŭ ŝia montro al la tria kulero, mi aŭdis ‘Memrespekto’. Dirinte ŝi strabis al mi. . .

“Subite ŝi forprenis la trian kuleron ĉe mia senatento, kaj je tio la ceteraj falis. Samtempe kun tio, la knabino forlasis la sidlokon kaj donis al mi malvarman ridon plenan de moko. . . La freŝa ludo dronigis min en densan nebulon.

“Tiunokte mi ne dormis turmentate de pensado pri la trikulera ludo. Subite kompreniga saĝo lumigis mian menson: Naturdoto, volo kaj memrespekto estas kondiĉoj por la valoro de la homo. Sen memrespekto naturdoto kaj volo perdos la apogon. . .

“Avo, vi certe komprenas la misteron de la ‘tri kuleroj’ kaj ankaŭ divenis, ke de tiam mi



roj kaj la maljuna avo pri la enamiĝo al kanto-stelulo? La avo, aŭstera kaj obstina, certe malkontentiĝos:

“Ĉu tio. . . ne estas ia frivolajo?”

“Avo, bonvolu atenti la lastan motivon. Krom ĝi, ĉiuj aliaj estas ne pli ol pretekstoj.

“. . . Enamiĝi al kantisto estas iom tro. . .”

“Jen finiĝis mia rakonto. La okazaĵo ĉe la separeo n-ro 14 ne estis bizara, nek kortuŝa, sed ĝi profunde turmentis kaj senĉese pensigis min. . .”

Silento.

Longa silento.

La maljunulo klinis la kapon. Ĉu li meditis aŭ konfuziĝis, ne interesiĝante pri la okazaĵo ĉe la junulo?

Ĉiŭ Jang stariĝis, prenis sian surtuton kaj forlasis la lokon.

Eble la maljunulo en la separeo ekkonsciis ion kaj diris per obtuza voĉo postdorse de Ĉiŭ Jang: “Junulo, via rakonto apenaŭ komenciĝis kaj estas ankoraŭ malproksima al la fino. . . Memoru: ‘Se ĝi estas rozo, certe ĝi floras.’”

Ĉiŭ Jang sentis subitan korbaton.

Li eliris tra la pordo kaj haltis sur la neĝkovrita strato. Jam ĉesis la neĝado. Post kelkaj horoj estos serena kaj frosta mateno. Oni ne scias, kial li denove ekpensis la kolizion de du astroj.

. . . Giganta bolido kun diametro de 96.5-145 km. koliziis kun la terglobo en la interspaco de Pacifiko kaj Atlantiko. . . La lafo fluadis. . . □

Esperantigis ŬANG ŜIJONG

dronis en sopiro. Tamen ŝi ne venis al la kafejo en sinsekvaj tri semajnoj. Mi estis forte deprimita de sento-perdo. Mi, dorlotita de granda espero, tamen rikoltis nenion. Mi estis ege turmentata de la aflikto.

“Iun alian sabatan vesperon post tri semajnoj la fraŭlino denove aperis.

“Tiutage ni sidis vidalvide kaj havis seriozan senkaŝan interparolon. Ŝi diris al mi: ‘Nuntempe ne troviĝas tia homo, kiu famiĝis dank’ al imitado.’ ‘Se vi preferas vian propran valoron, vi devas krei ion valoran por la mondo.’ Poste la temo de nia interparolo fariĝis pli praktika. Ŝi diris, ke mi estis tre proksima al la mikrofono en kantado, ke aŭdiĝis plozivoj difektantaj la tembron. Ŝi pacience klarigis al mi,

kial tro multa uzo de duonraŭkigita voĉo impresas per amoveko kaj kondukas al erotomanio. Ŝi promesis elekti kantojn taŭgajn por mia voĉo kaj helpi min ŝanĝi la stilon de kantado. Dum la parolado ŝiaj okuloj brilis kaj la vangoj radiis ruĝe. Ŝi plene montris sincerecon kaj aspektis pli ĉarme.

“Avo, kiel vi agus, se vi rejniĝus dekojn da jaroj, kaj estus en mia stato? Ĉu vi montrus al ŝi nur dankemon kaj admiron sed ne ian ajn pasion? Tiutempe en la profundo de mia koro ondis ia pasio, kiu instigis min verŝi al ŝi la koron. Sed mia sincera korverŝo estis milde rifuzita. Ŝi diris al mi, ke ŝi estas studentino en arta instituto kaj naskita en artista familio. Tro frua enamiĝo certe pereigos la karieron. Kaj cetere, kiel opinios la gepat-



# TAŬ JŬANMING

de MEJ ĜI



Taŭ Jŭanming

En la Orienta Ĝin-dinastio (317-420 p.K.) leviĝis brila stelo en la literatura historio de Ĉinio. Li estis genia poeto Taŭ Jŭanming.

Taŭ Jŭanming (365-427 p.K.) plej sukcesis en poeziverkado. Nun restas pli ol 120 poemoj verkitaj de li, el kiuj idilioj estas plej multaj kaj ankaŭ plej elstaraj. Oni povas diri, ke Taŭ Jŭanming estas iniciatinto de ĉina idilia poezio. Liaj idilioj diferencas de la postaj per tio, ke ili ne sole priskribas kamparan pejzaĝon, sed ĉefe esprimas la idiliajn vivon kaj senton spertitajn de la aŭtoro. Ĝenerale, liaj poemoj priskribas la ordinaran idilian vivon, tamen kun forta vivetoso, kondukas la legantojn al kvietaj, trankvilaj kaj modesta medio kaj sentigas al ili intimecon. Tiu trajto en liaj poemoj strikte ligiĝas kun lia persona vivo en la terkulturado.

En la Orienta Ĝin-dinastio, en kiu vivis Taŭ Jŭanming, la regado de plutokratiaj familioj estis ekstreme serioza. La praavo, avo kaj patro de Taŭ Jŭanming siatempe estis ŝtataj oficistoj, eĉ de alta rango. Sed lia familio ne apartenis al plutokratiaj kaj krome post lia naskiĝo lia familio estis jam malprosperinta. La personoj vivantaj en tia familio ne povis esti alte taksitaj, tio faris malglata la oficistan vojon de Taŭ Jŭanming. Nur de la aĝo de 29 jaroj, li rangis kiel eta ŝtata oficisto kelkfoje, kaj ĉiufoje ne tre longe. En lia oficista vivo pli-ol-10-jara, ne realiĝis lia granda ambicio savi la popolon, kaj plie li devis humile trakti iujn registarajn oficistojn. Tio malesperigis lin foje-foje kaj vekis ĉe li fortan abomenon al la koruptiĝinta burokrataro. 41-jara, li funkciis kiel guberniestro de Pengze (la nuna Pengze-gubernio, Ĝjangŝji-provinco) pli ol 80 tagojn. Foje prefekto sendis delegiton al lia gubernio. La subulo de Taŭ proponis, ke li en ceremonia vesto solene bonvenigu la delegiton por esprimi al tiu respekton. Li diris: "Mi ne riverencas al vilaĝa bubo por konservi mian kompatindan postenon." En la sama tago li rezignis sian oficon kaj verkis la faman lirikan *fu*-on "Fine mi hejmen revenis" por esprimi sian firman decidon ermitiĝi. Jam en siaj fruaj jaroj li ekamis la naturon kaj aspiris al ermita vivo. Cetere, en la Orienta Ĝin-dinastio furoris la penso de la antikvaj filozofoj Laŭzi kaj Ĝŭangzi adori la naturon kaj la ermita penso. Pro tio en sia oficista vivo de pli ol 10 jaroj li ĉiam ŝanceliĝis inter oficistiĝo kaj ermitiĝo. Ĉi-foje li senhezite surpaŝis la ermitan vojon kaj komencis sian terkulturan vivon.

Kiel poeto Taŭ Jŭanming persone partoprenis kamplaboron, kio ja estis afero tute eksterordinara siatempe. Ĝuste pro tio Taŭ havis ŝancon kontaktiĝi kun ordinaraj laboruloj kaj relative profundan scion pri la kampara vivo, dank' al kio li sukcesis verki multajn fame konatajn poemojn.

En la pasinteco preskaŭ ĉiuj poeziaj recenzistoj rigardis Taŭ Jŭanming kiel poeton idilian aŭ ermitan, sed fakte, en la idilia vivo for de la malpura medio, li neniam forlasis siajn intereson, karakteron kaj idealon. Lia nobla spirito ne voli sin miksi en fifarojn de burokratoj plene montriĝis en liaj poemoj. En la unua poemo de lia poemogrupo "Reveninte al la Kamparo" li nomis ŝtatan oficistiĝon "enreĵiĝo", "enkaĝiĝo", sian revenon al kamparo "elkaĝiĝo" kaj reveno al "la naturo", kaj ĝojis pri eskapo el "la kaĝo". Tio montras malestimon de la poeto al la malpura burokrataro. Samtempe la poemo priskribas kvietan naturan scenon: fumas kamparanaj kuirejoj, kvietas vilaĝo en malproksimo, aŭdiĝas bojado de profundaj stratetoj kaj kokeriko de sur arbosupro. La versaĵoj vekas amon de la legantoj al la naturo. La poeto sentas maksimuman agrablecon en la modesta, kvietaj idilia vivo kaj tie li trovas sian

aspiritan lokon. En la poemo-grupo "Drinkado" la aŭtoro plie esprimis sian liberan kaj kvietan animstaton. El ĝi la kvina poemo tekstas jene:

*Mi loĝas en la brua mondo aĉa,  
Ne aŭdas ĉeval-henon, nek kaleŝon.  
"Kiel vi trovis la kvieton pacan?"  
Ĉar koro mia foras de l' mondmezo.*

*Krizantem-florojn mi ĉe l' heĝo plukas,  
Aprecas belon de la monto suda.  
Birdetoj ope nesten ree flugas,  
Pejzaĝo ĉarmas je la ĵalo suna.*

*Jen vero estas de la homa vivo,  
Komprenon mi posedas sen klarigo.*

Estas aparte menciinde, ke liaj poemoj vive kaj konkrete spegulas la kamplaboron, kio faras liajn poemojn pli enhavoriĉaj. La tria el la poemo-grupo "Reveninte al la Kamparo" priskribas



*Ilustrajo por la versoj "krizantem-florojn mi ĉe l' heĝo plukas, aprecas belon de la monto suda"*

laborulon kun sarkilo revenantan de kamplaboro sur herboplena vojo. Ĝi tekstas jene:

*“Sude de l’ monto semiĝas faboj,  
Herboj abundas, sed pokas plantidoj.  
Iras tagiĝe eksteren por sarkado,  
Hejmen revenas en luno kun ŝpato.*

*Herboj kovras vojon stretan,  
Malsekigas roso l’ veston sube.  
Mi ne domaĝas la veston malsekan,  
Sed persistas en la virto pura.”*

Taŭ Jŭanming ĝuis ĝojan vivon en sia kamplaboro. Fizika laboro estis unuafoje plene prikantita en la verkoj de ĉinaj literaturistoj. Iuj liaj poemoj montras ankaŭ liajn zorgemon al agrikultura afero, spertojn kaj persistemon en peniga kamplaboro.

Jen tipaj versoj:

*Moruso, lino kreskas en prospero,  
Vastiĝas kun la tagoj la parceloj,  
Maltrankvilas mi ja pri prujno, grajlo,*

kaj

*En la homa vivo estas vero,  
Vesto, manĝo — ĉefa afero.  
Kiel oni faras eĉ nenion,  
Tamen strebas al komforta vivo.*

*De printempo mi terkulturon faras,  
Bonan rikolton mi ĉiujare havas.  
Al kamplaboro mi matene foriras,  
En vespero kun ŝpato hejmen venas.*

*Je roso, prujno ja abundas montoj,  
Ĉiam frue venas ankaŭ frostoj.  
Ĉu l’ kampuloj penon eĉ ne konas?  
Forskui tion ili ne kapablas.*

Krom idiliaj poemoj, Taŭ Jŭanming verkis ankaŭ poemojn kun forta sento, kiuj kritikis la realon per antikvaj okazaĵoj kaj prezentas lian komplikan, kontraŭdiran humoron post la ermitiĝo kaj lian neŝanĝeblan karakteron abomeni malbonon kaj batali kontraŭ tirano. En la poemo “Odo pri Ĝing Ke”, la poeto varme prikantas la antikvan bravulon Ĝing Ke, kiu oferis sian vivon por mortigi tiranon. En la deka el la poemogrupo “Libro de Montoj kaj Maroj”<sup>1</sup> li prikantas la neflekseblecon de Ĝing’ŭej<sup>2</sup> kaj Ŝingtjan<sup>3</sup> en ĉinaj mitoj:

*Ging’ŭej portas branĉojn etajn,  
Por plenigi maron grandan.  
Hakilegon, ŝildon Ŝingtjan svingas,  
Brava volo neniam ŝanĝiĝas.*

En tiuj versoj flamas la nefleksebla volo de la poeto.

En la kamplaborado Taŭ Jŭanming iom post iom profundigis sian konon pri la dekadencia socio kaj plifortigis sian aspiron pri bela ideala socio. Sekve, li verkis faman poemon kun antaŭparolo “Fonto inter Persikfloroj”, en kiu li prezentis utopian socion. Ĉi tie li priskribis bildon de socia vivo kvieta, paca kaj riĉa, sen reĝo, korteganoj kaj feŭda ekspluatado, tie ĉiuj laboras kaj ĝuas egalan rajton. Lia ideala socio draste kontrastis kun la tiama malluma realo kaj sekve montris antagonismon al la reala socio kaj seriozan kritikon al la realo.

Taŭ Jŭanming vivis mizere en siaj lastaj jaroj. Lin ofte turmentis malsato. Iam li eĉ ne povis ne almozpeti. Malgraŭ tio li ne perdis sian dignon. Kiam li kuŝis surlite pro malsato jam plurajn tagojn, loka oficisto de Ĝjangĝou (la nuna Ĝiŭĝjang-subprovinco de Ĝjangŝji-provinco), kie sin trovis lia loĝejo, sendis rizon kaj vian don al li, sed li malestime mansignis, ke oni forportu la donacaĵon. Post nelonge Taŭ Jŭanming forpasis de malriĉo kaj malsano.

Liaj verkoj ne estis alte taksitaj siatempe. Ili komencis esti atentataj nur en Tang-dinastio (618-907) kaj sekve ilia influo pli kaj pli vastiĝis. La progresaj literaturistoj ekde Tang-dinastio akiris spiritan forton por oponi kontraŭ la reala mallumo, de Taŭ Jŭanming, kiu malestime traktis altrangulojn kaj ne miksis sin en fifarojn de burokrataro. Kompreneble, iuj personoj estis pasive influitaj de li kaj vivis senzorge kaj senambicie. Koncerne la artan stilon, la simpleco, natureco kaj nerafiniteco de liaj poemoj donis profundan kaj pozitivan influon al la postaj poetoj.

1. Antikva geografia verko en folkloro. Bv. legi artikolon “Belaj mitoj kaj legendoj de la antikva Ĉinio”, n-ro 9, 1986.
2. Birda nomo en mito. Laŭ legendo ĝi estis filino de la pratempa tribestro Jandi kaj nomiĝis Njuŭa. Ŝi dronis dum naĝado en la Orienta Ĉina Maro, sekve formiĝis en Ĝing’ŭej kaj ofte transportis branĉetojn kaj ŝtonojn per la beko por plenigi la maron.
3. Mitologia persono. Li estis senkapigita post malvenko en lukto kun la Ĉielŭ Imperiestro por potenco, sed li ne fleksiĝis, kaj daŭre svingis siajn ŝildon kaj hakilegon, kun la mamoj kiel la okuloj kaj la umbiliko kiel la buŝo.

# Du verkajoj de Taŭ Jŭanming

## Reveninte al la kamparo (I)

*Junaĝe mi ne zorgis pri la moroj,  
al la montar' inklinas mia koro.  
Sed mi mispaŝis en socian reton,  
pasigis dek tri jarojn malgraŭ volo.  
Enkaĝa bird' sopiras la arbaron,  
basena fiŝ' pensadas sian maron.  
Mi virgan teron plugas vilaĝsude,  
por viv' sen ruz' revenis mi kamparon.  
Kabanoj miaj havas plurajn ĉambrojn,  
kun dekkelkmua\* bienet' en ligo.  
Domdorse kreskas ulmoj kaj salikoj,  
en front' arbar' de prunoj kaj persikoj.  
Vilaĝoj foraj montras sin vizioj,  
ŝvebadas lante ĉe ni fumoŝtrioj,  
obtuzas en la stratoj hundaj bojoj,  
sur morusarboj klaras kokokrioj.  
En mia korto regas ord' kaj puro,  
kvietas miaj ĉambroj sen mezuro.  
Mi vivis kaĝe dum tre longa tempo,  
revenis fine jam al la naturo.*

\* Muo=dekkvinono de hektaro

## Fonto inter persikfloroj

Dum la regperiodo Tajjŭan (373-396 p.K.) de Ĝin-dinastio (265-420 p.K.) vivis fiŝisto en Uling (nun Ĉangde en Hunan-provinco). Foje li boatis laŭ rivereto, ne atentante kiom longe li veturis. Subite li vidis persikarbaron, kiu etendiĝis ambaŭborde centojn da paŝoj foren. Neniu alispeca arbo enmiksiĝis en ĝin. Ĉarmis tie floroj kaj la tero estis kovrita de aromaj herboj. Ekmiregis la fiŝisto kaj iris plu por trovi la finon de la arbaro.

La arbaro finiĝis ĉe la fonto de la rivereto. Tie staris monto kun malvasta kaverno, el kiu ŝajne radiis lumo. La fiŝisto forlasis la boaton kaj eniris en la kavernon. La enirejo tiel malvastis, ke ĝi apenaŭ povis tralasi unuopulon. Li faris dekojn da paŝoj kaj trovis sin sur hela vastaĵo ebena. Vidiĝis tie domoj en bona ordo,

riĉa kamparo dividita de padoj, bela lageto, morusarboj kaj bambuoj. Tie kaj tie aŭdiĝis kokokrioj kaj hundobojoj.

La homoj sur vojo aŭ en laboro estis vestitaj same kiel la eksteraj loĝantoj. Blankharaj aĝuloj kaj nigraharaj infanoj aspektis gajaj kaj feliĉaj. Ilin surprizis la apero de la fiŝisto. Oni demandis lin pri lia deveno kaj li respondis ĉiujn iliajn demandojn. Oni invitis lin al sia hejmo kaj regalis lin per vino kaj kokaĵo. Ĉiuj vilaĝanoj, kiuj informiĝis pri lia alveno, venis al li por informiĝi.

Oni rakontis al la fiŝisto, ke dum la militado en Ĉin-dinastio (221—207 a. K.) iliaj prapatroj rifuĝis kun siaj familioj kaj najbaroj en tiu ĉi izolejo. De tiu tempo ili ne eliris kaj interrompis la rilatojn kun la eksteraj homoj. Oni demandis la fiŝiston, en kiu dinastio ili vivas, ĉar ili eĉ ne sciis la aperon de Han-dinastio (206 a.K. — 220 p.K.), por ne paroli pri la dinastioj Ŭej kaj Ĝin. La fiŝisto rakontis ĉion, kion li sciis, kaj ili ĉiuj suspiris kun bedaŭro.

Poste la fiŝiston oni regalis hejme unu post alia per vino kaj frandaĵoj. Post kelkaj tagoj li adiaŭis ilin. Je la disiĝo oni diris al li: "Ne indas paroli pri ni al eksteruloj."

Fine la fiŝisto eliris kaj trovis sian boaton. Reirante laŭ la malnova vojo, li markis la lokojn trapasitajn. Kiam li revenis en la urbon, li vizitis la prefekton kaj rakontis al li sian travivaĵon. La prefekto ekspedis homojn kun la fiŝisto por serĉi la lokon laŭ la faritaj signoj. Sed ili perdis la orienton kaj neniel povis trovi la ĝustan vojon.

Nobla sinjoro Liŭ Ziĝji en Nanjang aŭdis pri la afero kaj ĝoje sin preparis por serĉi la lokon. Sed li ne povis tion fari, ĉar baldaŭ li mortis pro malsano. Post tio neniu plu okupiĝis pri tio.

Elĉinigiŝ LAŬLUM

# Abako—antikva kalkulilo de Ĉinio

de LAN ŠAN

Abako estas kalkulilo inventita de la ĉina popolo en antikveco. Abaka kalkulo originis el Ĉinio kaj disvastiĝis en la mondo. Dum centoj da jaroj la abaka kalkulo ludis grandegan rolon en la disvolvo de produkto, eduko, scienco kaj kulturo de Ĉinio. Ĝi estas valora scienca kaj kultura heredaĵo de Ĉinio.

Abaka kalkulo evoluis el la antikva stangeta kalkulo. Tiam laŭ la decimala nombrosistemo oni faris la kvar bazajn operaciojn de aritmetiko kaj operaciojn de radikigo kaj kvadratigo per bambuaj stangetoj longaj je ĉirkaŭ unu decimetro aranĝitaj en diversaj formoj. Jam en la periodo de Printempo kaj Aŭtuno (770-476 a. K.) ĉinaj matematikistoj povis lerte kalkuli per mallongaj bambuaj stangetoj.

Kun la disvolviĝo de la agrikulturo, metio, komerco kaj ekstera komerco aperis granda nombro da simplaj formuloj de stangeta kalkulo. Tamen estis


tre maloportune kalkuli per plenumo da stangetoj dum negocado. Ofte okazis eraroj pro ne ĝuste aranĝitaj stangetoj, precipe kiam oni faris kalkulon en granda cifero kaj granda rapido. Stangeta kalkulo ne povis plenumi la bezonon de la objektiva realo, tial oni kalkulis per malgrandaj globetoj anstataŭ stangetoj. Fine de Han-dinastio (206 a.K.-220 p.K.) aperis notoj pri abaka kalkulo. Tial historiistoj asertis, ke en Han-dinastio de Ĉinio oni jam komencis uzi abakon el globetoj netrairitaj de stangetoj kaj ekde tiam abaka kalkulo iom post iom anstataŭis stangetan kalkulon.

Matematika libro de Song-dinastio (960-1279 p.K.) notis, ke la tiama abako havis horizontalan trabeton. Estis evidente, ke tiam oni uzis abakon el globetoj trairitaj de stangetoj. Estas tre malfacile konstati, en kiu jaro oni komencis uzi abakon kaj kiu inventis ĝin. En Song-dinastio kaj Ĵuan-dinastio (1271-


1368 p.K.) abako jam estis vaste uzata tra Ĉinio.

En Ming-dinastio (1386-1644 p.K.) abako estis tre populara. Kaj multe progresis la metodo de kalkulo. La plej frua libro pri abaka kalkulo de Ĉinio estas "Fundamenta Matematiko" (1578 p.K.) de Ke Ŝangĉjan de Ming-dinastio. Bildo pri abako en la libro montris, ke la tiama abako havis 13 stangetojn kaj similas al la nuna, kies stangeto havas sur si po sep globetojn. Majstro Ĉeng Daŭej de abaka kalkulo de Ming-dinastio komencis sian komercadon ĉe la meza kaj malsupra parto de Jangzivero en la aĝo de pli ol 20 jaroj. Kiam li estis 60-jara (1592 p.K.), li verkis la libron "Kompleta Operaciario", sisteme kaj detale klarigante pri abaka kalkulo. La libro havas en si 595 matematikajn problemojn kalkulatajn per abako, 26 formulojn por adicio kaj 22 formulojn por subtraho. La libro estis bonvena tra la lando kaj represita multfoje.

En tiu sama tempo abako de Ĉinio estis enportita en Japanion, Koreion, Vjetnamion, Tajlandon k.a. Laŭ esplorado de japanaj historiistoj, kiam japanaj studentoj en Ĉinio revenis al sia patrolando fine de Ming-dinastio, ili kunportis en Japanion la libron "Kompleta Operaciario" kaj abakojn de Ĉinio. Post la Dua Mondmilito abako estis enportita de Japanio en Eŭropon. Japanoj tre atentis pri uzo de abako. Eĉ en la nuna Japanio, kie komputi-



Antikva globeta abako



*Nuna abako*

loj vastege uziĝas, la populariĝo kaj aplikado de abakoj en Japanio rimarkinde superis tiujn en Ĉinio laŭ proporcio de loĝantaro.

Post kiam la arabaj ciferoj estis enkondukitaj en Ĉinion, la moderna abaka kalkulo disvolviĝis grandpaŝe. Post la Japana-Rusa Milito Japanio ekspansiigis sian forton al la Nordoriento de Ĉinio, kaj populariĝis en la Nordoriento la japana oblonga abaketo kun kvin globetoj sur ĉiu stangeto. Pro siaj malgrandeco kaj facile moveblaj rombaj globetoj, ĝi estas tre taŭga por fari kalkulon per arabaj ciferoj kaj iom post iom anstataŭis la kvadratan abakon kun sep rondaj globetoj sur ĉiu stangeto.

Abako ludas intuician rolon en instruado. Ĝi ne nur figure montras la koncepton de la fundamenta matematiko kaj la principojn de la decimala nombrosistemo, kaj pli grave estas, ke, kiam oni kalkulas per abako, oni movas globetojn per fingroj, cerbumante pri matematika logiko; tio lertigas kaj la fingrojn kaj la cerbon. Tial dank' al lernado de abaka kalkulo, la lernantoj povas pli bone kompreni la koncepton pri nombro, akriĝi pens-kapablon, intensigi memor-kapablon kaj altigi kalkul-kapablon.

Nun estas la epoko mastrata de komputiloj, tamen abako ankoraŭ havas fortan vivipovon. Abaka kalkulo estas la plej taŭga por fari adicon kaj subtrahon, precipe por fari kontinuan adicon kaj subtrahon de plurcifera nombro. Abaka kalkulo estas multe pli rapida ol la komputila. En kalkulado, kontado kaj statistikado oni plejofte uzas adicon kaj subtrahon, kiuj konsistigas 80% de la kvar bazaj operacioj de aritmetiko. Kaj plie, abako havas multe da superecoj, kiaj simpla strukturo, oportuneco por uzado, rapida kaj preciza

kalkulado, malmulta kosto, funkciado sen elektro kaj forti-keco. Tiujn superecojn ne havas la komputiloj. Nun ĉiutage miloj kaj dekmiloj da kontistoj, kassistoj, komercistoj, intendantoj kaj saldistoj uzas abakojn por bilanci grandan nombron da kvitancoj, fakturoj kaj eksped-paperoj. El tio videblas, ke la antikva abako ankoraŭ ludas grandan rolon en ekonomia aktivado.

Kompreneble, kun paso de tempo ankaŭ abako devas disvolviĝi antaŭen. Utiligante elektronikan teknikon, la Ĉina Abakkalkula Asocio faris elektronikan abakon. Dum adicio kaj subtrahado oni movas globetojn kaj dum multobligado kaj dividado oni faras kalkulon per komputilo. La novtipa elektronika abako facile portebla rapidigas kalkulon kaj faciligas kontroladon, kunporton kaj uzadon. Kun apero de elektronika abako la abako disvolviĝos en novan stadion kaj havas brilan perspektivon. □

*Kontistino kaj ŝia abako*



# FOTADO, ŜATOKUPO DISVASTIĜANTA EN LA ĈINA KAMPARO

Fotoj de CAJ MING



*Ĉiu havas sian guston!*

La kamparanoj de Uŝji, kiuj nur sciis uzi ŝpaton en la pasintaj generacioj, nun amikiĝis al kodako, kiun antaŭe nur bonhavaj urbanoj posedis. Laŭ statistiko, sep distriktoj de la gubernio Uŝji fondis kamparano-fotistajn asociojn kun 458 membroj.


Ne subtaksu la estetikon de la kamparanoj, ke ili aĉetis kodakon nur por fari simplajn fotojn pri la ĉiutaga vivo. Iu juna kamparano havanta simplan kodakon diris al mi, kun plena memfido:

“Ni ne toleras, ke la galerio estas ĉiam okupata de fotoj faritaj de urbanoj, ni devas havi nian lokon en la galerio.”

La kamparano-fotistaj asocioj de Uŝji estis fonditaj de la membroj mem. Ĉi tiuj estas tre fervoraj por fotografio. Ili mem kolektas monon por okazigi foto-kurson, konkurson kaj kunsidon. Dank’ al tiuj aktivadoj rapide leviĝis ilia arto de fotografado.



*Kiel bele!*



*Foto-kurso*



*Fotista familio*







*Kamparano-fotisto kaj liaj verkoj*




*Kamparanoj rigardas fotojn.*

*Foto-ekspozicio ĉe kampo*



# Prifosado de la Kulturo de la Okcidenta Ŝja

de MA ŬENKŬAN kaj ĜANG LJANŜJI



*Parto de la imperiestraj maŭzoleoj de la Okcidenta Ŝja*



*Porcelana vazo kun  
ĉizitaj figuraĵoj*

*Orumita bronza bovo*



De la 10-a ĝis la 13-a jc. p.K., en Ĉinio aperis kvar dinastioj — Ljaŭ (916-1125), Song (960-1279), la Okcidenta Ŝja (1038-1227) kaj Ĝin (1115-1234). La areo de la Okcidenta Ŝja ampleksis grandan parton de la nunaj Ningŝja kaj Ĝansu, nordan parton de Ŝenŝji kaj parton de la Interna Mongolio kaj Ĉinghaj. La Okcidenta Ŝja daŭris 190 jarojn en la nordokcidento de Ĉinio kaj ludis gravan rolon en la evoluado de la ĉina kulturo. Bedaŭrinde, ĝi postlasis nur malmulte da nekompletaj historiaj materialoj.


Komence de la 20-a jc. rusa aventuristo P. K. Kozloff kun sia ekspedicio venis al Halahot (ĉe la ruiniĝinta urbeto Hejĉeng de la nuna Eĝin-gubernio, la Interna Mongolio) kaj trovis multajn dokumentojn, budhismajn sutrojn, pentraĵojn kaj aliajn kulturajn objektojn de la Okcidenta Ŝja kaj ŝtele veturigis ilin al Rusio. Post nelonge ankaŭ brita aventuristo A. Stein trovis tie grandan kvanton da historiaj objektoj kaj ŝtele transportis ilin al Britio. La du malnobraĵoj skuis ĉinajn arkeologojn, kaj ili ekatentis pri kolekto kaj studo de la historiaj kulturaj objektoj de la Okcidenta Ŝja. Tamen en la tumultaj jaroj de la malnova Ĉinio oni ne povis fari grandskalan studon kaj arkeologian prifosadon. La laŭplana esplorado pri la historiaj objektoj de la Okcidenta Ŝja komenciĝis nur post 1949, kiam fondiĝis la Ĉina Popola Respubliko. Nun ĉinaj fakuloj jam havas kompare profundan konon pri la Okcidenta Ŝja, koncerne ĝiajn prosperon, pereon, ekonomiajn kaj kulturajn sukcesojn. Ankaŭ la arkeologoj rikoltis ĝojigajn sukcesojn.

La Okcidenta Ŝja estis sendependa loka reĝimo kun nacimal-

plimulto dangŝjangĉjang-oj kiel siaj ĉefaj loĝantoj. Ilia ĉefo Li Jŭanhaŭ imperiestriĝis en 1038. Jen oficiale fondiĝis la imperio. Je la 5-a generacio de la imperiestreco, kiam Li Ŝenŝjaŭ estis sur la trono, la imperio atingis sian kulminon en la disvolviĝo kaj post li iom post iom kadukiĝis.

La Okcidenta Ŝja estis pereigita de mongoloj. La ĉiamvenka Ĝingis-Hano, ĉefo de la mongoloj, kvankam estis terura por Eŭropo kaj Azio, tamen renkontis obstinan rezistadon en la milito kontraŭ la Okcidenta Ŝja. Li pereigis la Okcidentan Ŝja nur post 5 kampanjoj. En la lasta fojo, komandante grandan armeon, li konkeris plurajn gravajn urbojn de la Okcidenta Ŝja, tamen ĉie renkontis fortan reziston de la malamikoj kaj suferis gravan perdon. Februare de 1227, la mongoloj sieĝis la ĉefurbon Ĝongŝingfu (la nuna urbo Jinĉŭan) de la Okcidenta Ŝja duonjaron. Sed Ĝingis-Hano mortis de malsano antaŭvespere de la venko. La mongoloj kun malamoto rentis en la urbon kaj faris masakron al la loĝantoj kaj brute detruis la kulturon de la Okcidenta Ŝja, bruligis la imperiestrajn maŭzoleojn kaj ruinigis preskaŭ ĉiujn konstruaĵojn de la imperio. Pro tio nun videblas tre malmultaj historiaj objektoj kaj literaturoj. Tial oni povas studi ĝiajn historion kaj kulturon nur surbaze de la materialoj elterigitaj de arkeologoj.

En la 70-aj jaroj de la 20-a jc. ĉinaj arkeologoj esploris kaj prifosis la imperiestrajn maŭzoleojn de la Okcidenta Ŝja-dinastio. La maŭzoleoj, 4 km. longaj deoriente okcidenten kaj 10 km. larĝaj desude norden kun totala areo de 50 kvadrataj kilometroj,



*Gemelaj pagodoj de la Okcidenta Ŝja*

situas ĉe la orienta montpiedo de Helan-monto, okcidente de la urbo Jinĉŭan. Tie kuŝas tomboj de 9 imperiestroj de la dinastio kaj 140 akompanaj tomboj.

Oni prifosis la imperiestran maŭzoleon n-ro 8 kaj 3 akompanajn tombojn. Post esplorado oni konstatis, ke la maŭzoleo n-ro 8 estas la tombo de Li Zunŝju, la oka imperiestro (1211-1226 p.K. sur la trono) de la Okcidenta Ŝja. En la maŭzoleo estas ruinoj de gvatturo, monumenta kiosko, kvarangula turo, omaĝa halo k.a. Ambaŭflanke de la vojo al la maŭzoleo staras ŝtonaj skulptaĵoj. Nordokcidente de la maŭzoleo kuŝas subtera palaco 24.6 metrojn sub la tero kaj pagodforma funebra teraso 16.5 metrojn alta. Ĝenerale la aranĝo de la maŭzoleoj de la Okcidenta Ŝja similas al tiuj de Song-dinastio en la gubernio Gongŝjan, Henan-provinco, tamen la skalo de la antaŭaj estas multe malpli granda. Tio

montris, ke la Okcidenta Ŝja penis imiti kaj asimili la kulturon de han-nacieco. La pagoda formo de la funebra teraso atestis, ke la Okcidenta Ŝja pie kredis al budhismo. Inter la elterigitaj objektoj estas orumitaj bronzaj bovjoj kaj multaj vazoj oraj kaj arĝentaj, kio pruvis, ke kvankam la Okcidenta Ŝja situis en la nordokcidenta Ĉinio, tamen posedis kompare altan nivelon en metalurgio.

La strukturo de la imperiestraj maŭzoleoj de la Okcidenta Ŝja estis diferencaj de tiuj de han-nacieco. La antaŭaj estis terkavoj, dum tiuj de han-nacieco brikaĵoj domoj. La subtera konstruo spegulas ilian surteran vivon, kio indikis, ke dangŝjangĉjang-oj kutime loĝis en tera domo.

El la arkitekturo de la maŭzoleoj oni konstatis, ke ĝi estas organika kombino de la han-nacieca kulturo kun tiu de

dangŝjangĉjang-oj kaj partikulara stilo en la ĉina maŭzolea arkitekturo.

Inter la elterigitaj objektoj estas multaj oraj kaj arĝentaj objektoj. Sur la arĝentaj bovjoj elterigitaj en Ling'u estas vortoj en la lingvo de la Okcidenta Ŝja, kiuj montris la pezon de la objekto. Tio liveris materialon por studi la pezo-sistemon de la Okcidenta Ŝja. La orumita arĝentaĵo elterigita el la maŭzoleo n-ro 8 estas lotus-forma kun turkiso inkrustita sur la stamena parto. La elterigitaj oraĵoj kaj arĝentaĵoj, delikate faritaj, estas raraj metiartaĵoj.

Inter la historiaj objektoj estas granda kvanto da moneroj. Ili plejparte estas de Song-dinastio. Kaj ankaŭ estas moneroj de la Okcidenta Ŝja. La lastaj konsistas el du specoj. Unuaj portas la han-lingvajn ideografiajn kaj la aliaj skriblingvaj vortojn de la Okcidenta Ŝja. Inter ili es-

tas moneroj unuafoje trovitaj. La delikate faritaj moneroj konigas, kiel altan nivelon atingis la Okcidentan Ŝja en monerfarado.

De 1983 ĝis 1986 ĉinaj arkeologoj faris prifosadon al la ruino de porcelanaĵa bakujo en Cijaŭpu, Ling'u-gubernio, Ningŝja-a Huj-nacieca Aŭtonoma Regiono. La bakujo eklaboris de la Okcidenta Ŝja ĝis Ĉing-dinastio (1644-1911). El la porcelanaĵoj produktitaj en diversaj periodoj tiuj de la Okcidenta Ŝja estas la plej bonkvalitaj. La porcelanaĵoj kun ĉizitaj figuraĵoj estas aparte plaĉaj. La floroj ĉizitaj havas fluajn liniojn. La homoj kaj bestoj versimilaj. La peonioj ĉarmaj plene montras la pompecon. Juna cervo buŝe tenas floron kaj kun kapo turnita malantaŭen, kio vivece vidigis la rapidmovecon kaj singardecon de la cervido. La porcelanaj skulptaĵoj plej parte estas homaj kaj bestaj figuroj. Tiuj diversaj skulptaĵoj montris la lertan teknikon de metiartistoj de la Okcidenta Ŝja kaj ilian profundan konon pri la reala vivo.

La bakujo produktis ankaŭ multe da blankaj porcelanaj tegoloj, nigre glazuraj tegoloj, tubformaj tegoloj, tegmentrandaj tegoloj kaj aliaj konstruaj materialoj. El la trovitaj materialoj normaj kaj delikataj oni povas konstati, kiel imponaj estis la tiamaj palaco kaj maŭzoleoj de la Okcidenta Ŝja. Krome, la bakujo produktis ankaŭ porcelanajn hokojn, ŝakpecojn, Ŝjunojn (blovinstrumentojn el terakoto, buloforma kun truetoj) k.a., kio spegulis la popolan vivon de la Okcidenta Ŝja de malsamaj flankoj.

La prifosado kaj esplorado pri la porcelanaĵoj de la Ok-



*Paĝo el la Vortaro Okcident-Ŝjaa-Hana*

## Fiŝado per spegulo

(Humuraĵo)

Iu vidis, ke fiŝisto staras ĉe lago kun spegulo en la mano.

“Kion vi faras?” demandis li.

“Fiŝas,” respondis la fiŝisto.

“Ĉu per spegulo?” miris la demandanto.

“Jes, tio estas nova inventaĵo”.

“Ĉu vi povus diri al mi la sekreton?”

“Jes, sed vi devas pagi al mi 10 jŭanojn por tio.”

“Bone.”



Poste, la fiŝisto klarigis al li: “Kiam fiŝo alnaĝas, reflektu

lumon al ĝi per la spegulo, kaj ĝi estas kapturige kaptita.”

“Ja neimageble! Kiom da fiŝoj vi kaptis tiamaniere?”


“Hodiaŭ mi jam kaptis 50 fiŝojn, inkl. de vi.”

## Tigroŝako

(Popola ludo)

Desegnu ŝaktabulon (Vd. la bildon) sur planko aŭ papero. Du personoj ludas. Unu el ili estu “ŝafo”. La 15 ŝakpecojn de la ŝafo metu ĉe la intersekcaj punktoj de la 3 horizontalaj linioj kaj 3 vertikalaj linioj en la granda kvadrato; la alia estu “tigro”. Lian ŝakpecon metu ĉe la centro de la malgranda kvadrato.

Unue la ŝafo movas unupaŝe ŝakpecojn en ajna direkto; pos-



te la tigro movas unupaŝe sian ŝakpecon en iu direkto. Kiam

la ŝakpeco de la tigro alproksimiĝas al tiu de la ŝafo kaj se ne estas ŝakpeco malantaŭ ĝi, la tigro povas transalti kaj formangi unu ŝakpecon de la ŝafo. Se la ŝakpecoj ĉirkaŭas la tigron kaj ĝi ne povas sin movi, do la ŝafo venkas la tigron, alie la tigro venkas.

## Frapado de pilko

(Sporta ludo)

Preparado: Sur tereno streku linion kaj sur la loko 7 m. for de la linio tiru ŝnuron 2.6 m. altan paralele al la linio. Sur la ŝnuro pendigu 4 grandajn pilkojn. Dividu la ludantojn en 4 grupojn ĉiu el egala nombro da homoj. Ĉiuj ludantoj staru trans la linio kaj frontu kontraŭ la 4 grandaj pilkoj. La unua de ĉiu grupo tenu 5 malgrandajn pilkojn (aŭ sablosakojn) en la mano.

Ludmaniero: Post kiam oni donas ordonon, la unua de ĉiu grupo ĵetas siajn 5 malgrandajn pilkojn unu post alia kontraŭ la grandan pilkon antaŭ si. Al la ludantoj estas malpermesite transpasi la linion por ĵeti. Ĉiu trafo gajnas unu poenton. Se iu trafas la grandan pilkon de alia grupo, lia grupo devas dekalkuli unu poenton. Ĉiuj grupanoj laŭvice ĵetas tiamaniere. Fine, venkas tiu, kiu gajnas plej multe da poentoj. □

cidenta Ŝja atestis, ke ĝia ceramiko jam atingis kompare altan nivelon. Kompare kun aliaj porcelanaĵaj bakujoj ĝi havis siajn apartajn stilon kaj trajtojn. Ĝi okupis certan pozicion en la porcelanaĵa historio de Ĉinio.

Krom tio, oni trovis amason da libroj de la Okcidenta Ŝja.

La regantoj de la dinastio alte taksis gravuradon kaj presadon de libroj. En ĝia registaro estis aparta administracio pri la ksilografia presado. En la ksilografiaj eldonaĵoj la budhismaj sutroj konsistigis grandan parton. Oni trovis ankaŭ poemojn, artikolojn, vortarojn, novelojn,

jurajn verkojn, kalendarojn, librojn pri medicino kaj aŭgurado. El ili estas pluraj tradukaĵoj el la hana lingvo, kio montras, ke la regantoj de la Okcidenta Ŝja alte taksis lernadon de la hana kulturo kaj la hana kulturo siatempe multe influis la kulturon de la Okcidenta Ŝja en ĝia disvolvigo. □

## DISKUTO PRI EDZECO KAJ FAMILIO

Lastatempe, la tritaga gazeto "Ĉinaj Virinoj" aperigis serion da artikoloj pri ses multe laŭdataj virinoj en edzeco kaj familio. La plej laŭdata estas vilaĝa virino Tjan Ĝjuhŭa. Antaŭ ok jaroj, nelonge post ŝia edziniĝo, ŝia edzo paraliziĝis pro akcidento. Tiam Tjan estis nur 24 jara. Ŝin rigardante suspekta, la vilaĝanoj diris: "Kiel ŝi, tiel juna, povos vidvine vivi ĉe sia edzo?" "Ŝi ankoraŭ ne naskis infanon, simple eksedziĝu, kaj ŝi eble trovos bonan edzon." Timante ke ŝi foriros, familianoj de ŝia edzo ŝlisis ŝian biciklon. Tjan decidis resti kaj diris al la edzo: "Estu trankvila, mi vivos kune kun vi dum la tuta vivo, nur se vi vivos." Dum la ok jaroj, ŝi flegis la edzon ĉiamaniere. Multfoje ŝia familio estis elektita kiel "familio kun kvin bonoj" kaj ŝi, Flago-tenanto de la Oka de Marto de la Gubernia Virina Federacio.

Estas ankaŭ aliaj laŭdataj virinoj. Iu virino decidis ne reedziniĝi dum la tuta vivo por prizorgi la bogepatrojn post la morto de la edzo. Iu 17-jara junulino devigite edziniĝis al blindulo pli aĝa ol ŝi je 12 jaroj, kaj vivis kun li 20 jarojn por intereso de siaj gepatroj kaj frato. Alia virino ne volis eksedziniĝi, nek reedziniĝi, post kiam ŝia edzo estis kondamnita al 15-jara mallibereco.

La raportoj kaŭzis disputon de legantoj. La gazeto "Ĉinaj

Virinoj" faris diskuton kun la temo "Spirita civilizacio aŭ feŭda malklereco". Ĝia redakcio ricevis pli ol 600 artikolojn de legantoj. La diskuto transiris de simpla juĝo pri moralo al reflektado de la homaj rajtoj, leĝa sistemo, virina emancipo, nacia psiko kaj la tradicia konfuceanisma kulturo de Ĉinio. En la diskuto oni prezentis tute malsamajn eĉ pinto-kontraŭ-pintajn opiniojn. Iuj opiniis, ke la raportoj pri tia konduto estas propagando pri feŭda malklereco kaj virina ofero por perfektigi kaj feliĉigi la familion. Ili pledis por radikale renovigi la koncepton.

Aliaj opiniis, ke tiuj faroj enkorpigis la tradician virton de la orientaj virinoj kaj estas konkreta speguliĝo de la spirita civilizacio. Kvankam tiuj virinoj estas malfeliĉaj en la vivo, tamen ili estas riĉaj en la spirito. Oni do povas diri, ke ili estas reprezentantoj de la ĉinaj virinoj de la 80-aj jaroj.

Kaj la triaj opiniis, ke oni ne devas simple aprobi aŭ nei la konduton de tiuj virinoj, eksedziniĝi, reedziniĝi aŭ resti plu en la bopatra hejmo. Pri tio oni devas respekti iliajn sentojn kaj volon. La socio ne devas inter-

*Telefono kaj leteroj ligas la redakcion kaj legantojn.*



veni en ilian privatan vivon per publika opinio.

Ni aperigas jene artikolojn kun reprezenta opinio.

## NE PLU KATENU LA VIRINOJN

En la lastaj jaroj, en nia hejmloko furoris "festo de bonaj bofilinoj". Tiutage la vilaĝo estis movoplena en tamburado kaj gongado. La vilaĝanoj kunvenis en draŝejo por rigardi, ke la vilaĝaj kadroj alkroĉas al la laŭdatoj ruĝan floron kaj donas honoran paperon. El tiuj "bonaj bofilinoj", iu prizorgis sian psikozan edzon dum dek jaroj; alia virino ne reedziniĝis kaj volonte zorgas pri siaj gefiloj dum la tuta vivo post la morto de la edzo.

Kiam iuj virinoj estis elektitaj kiel "bonaj bofilinoj", ankaŭ la familianoj de iliaj bogepatroj kaj gepatroj estis ĝojaj. Kaj tiuj, kiuj estis ne elektitaj kiel "bonaj bofilinoj", sentis sin ŝajne malpli altaj ol la aliaj. Kiel povus ne aperi malplezuraj okazoj en la familia vivo? Se neelektita bofilino kverelis kun iu ajn en la familio de la edzo, oni do diris: "Alportu honoran paperon, se vi kapablas." Kion povas diri tiam la bofilino?

En la feŭda socio oni propagandis pri virtaj virinoj por ke la aliaj lernu de ili. Nun, oni opinias la virinojn, kiuj edziniĝis unufoje por ĉiam, bonaj bofilinoj, trumpetante, ke tio povas akceli la spiritan civilizacion. Estas malfacile kompreneble, ke iuj kadroj de virina federacio de gubernio kaj subdistrikto estas fervoraj por la aktivado kaj persone alvenis por soleni la tagon kaj doni donacon al la "bonaj bofilinoj", ankaŭ iuj virinaj ĵurnaloj kaj gazetoj propagandis la aferon. Ni ne



Redaktorinoj de "Ĉinaj Virinoj"

povas ne demandi, ĉu la ĉinaj virinoj de la 80-aj jaroj prenas tiujn "bonajn bofilinojn" kiel modelon?

Ni ankoraŭ ne edziniĝis kaj ne deziras fariĝi tiel nomataj "bonaj bofilinoj". Ni opinias, ke jam estas katenitaj la virinoj, kaj ne plu katenu ilin!

**Ĝang Min kaj Cong Hŭa**

### MALANTAŬ LAŬDOJ

Miaj kvara onklino kaj kvara onklo geedziĝis laŭ la decido de miaj geavoj en la 50-aj jaroj. Mia kvara onklo malkontentis pri la edziĝo kaj eksedziĝis ne longe post sia edziĝo. Li fondis novan familion en urbo. Sed mia kvara onklino ne forlasis la bogepatran familion, dirante, ke post sia edziniĝo ŝi ja fariĝis membro de tiu ĉi familio. Ŝi estis rigardata kiel filino de miaj geavoj. Forpasis 30 jaroj. Ĉiuj najbaroj laŭdis ŝin. Ŝi, kompetenta kaj virta, flegis miajn geavojn ĝis ilia for-

paso. Ŝi ne reedziniĝis dum la tuta vivo. Nun ŝi estas pli-ol-50-jara kaj ree sole vivas.

En miaj okuloj ŝia vivo kva-zaŭ ne apartenas al ŝi mem. Ŝi multe suferis, sed neniam plendis, eble pro tio, ke ŝi ne scias, kio estas feliĉo. Ĉu ŝia konduto meritas laŭdon? Absurde! Ŝi ja estas laŭdata fama bona bofilino en nia regiono. Mi opinias, ke malantaŭ la laŭdo sin kaŝas ŝia doloro kaj ĉagreno neeldirebla.

**Ŝjaŭ He**

### GLORON AL LA VIRINOJ OFEREMAJ

Mi opinias, ke la faro de Tjan Ĝjuhŭa estas manifestiĝo de spirita civilizado. Mi ne timas eldiri, ke ankaŭ la virinoj estas karnuloj, kaj havas senton. Por iuj la faro de Tjan estas tro kruela. Sed laŭ mi, tio ĝuste montris ŝin eksterordinara. Se iu viro estas forlasita de sia edzino post korpa

vundiĝo, li perdos la kuraĝon elteni la duoblan atakon.

Ĉu antikve, ĉu hodiaŭ, en Ĉinio aŭ alilande, kiuj kuraĝas sin oferi por aliaj, tiuj estas respektataj kaj laŭdataj. Nun, iuj eksterlandanoj esploras pri la ĉina tradicia kulturo, sed iuj el ni neas la propran.

Fan Jan

### EKSTERORDINARA VIRINO

Mi opinias, ke Tjan Ĝjuhŭa havas bonan kaj puran koron. Post kiam la edzo paraplegiiĝis

kaj perdis seksan funkcion, Tjan restas ĉiam fidela al li kaj senegoisme oferis sian junecon al la malfeliĉulo, tio estas la bona virto de la ĉinaj virinoj. Traleginte raporton pri ŝia faro, mi havis altan respekton al ŝi. Ŝi estas eksterordinara virino.


Eĉ la luno iam brilas kaj iam malheliĝas, ankaŭ la homoj havas feliĉon kaj malĝojon. La vojo de vivo estas ne glata. Neniu volas malfeliĉon. Se unu el geedza paro renkontis malfeliĉon, kaj la alia forlasis lin (ŝin) nur por sia propra feli-

ĉo, tio estas duobla doloro por la malfeliĉulo. Kiom da familioj en nia socio disiĝus kaj kiom da homoj estus forlasitaj, se ĉiuj pensus nur pri si mem kaj ne zorgus pri la alia.

Por la edzo, Tjan faris grandan oferon, vere ŝi meritas respekton de la aliaj. Ŝia sinofera konduto konsolis la malfeliĉan edzon en malespero kaj vidigis al li la belan mondon, en kio ja lumas la amo: Laŭ mi, la sinofero de Tjan estas multe respektinda.

Ŭang Jŭetang

## LOKOJ MENCITAJ EN ĈI TIU NUMERO



1. Sanŝji-provinco
2. Fuĝjan-provinco
3. Ĝeĝjang-provinco

4. Ĝinŝa-rivero
5. Dezerto Taklimakan
6. Jinĉŭan

7. Granda Sing'an-montaro



# Nacimalplimulto lerta en kantado

de LAN ŠAN kaj ŬANG TJA NĈJI

En la montaj kaj marbordaj regionoj inter la provincoj Fuĝjan, Ĝeĝjang, Gŭangdong, Ĝjangŝji kaj Anhuĵ de Ĉinio vivas la antikva ŝe-nacieco kun 360 000 loĝantoj, kies 60% loĝas en Fuĝjan-provinco. En longtempa miksluado de ŝe-oj kun hanoj, ĝia ekonomio disvolviĝas preskaŭ sur la sama nivelo kiel tiu de han-nacieco. Ankaŭ ĝiaj kulturo, moroj kaj kutimoj multe similas al tiuj de han-nacieco. La ŝe-oj posedas sian parolan lingvon, sed pro manko de la skriba ili uzas hanajn ideogramojn. La ŝe-oj en diversaj lokoj bone scias la hanan lingvon.

La hejmolando de ŝe-oj estas honore nomata "maro de kantoj". Popolkanto estas konsistiga parto nemankigebla en ilia ĉiutaga vivo. Ĉiuj ŝe-oj, ĉu viroj ĉu virinoj, ĉu junuloj ĉu maljunuloj, ŝatas kanti popolkantojn. Iu ŝe-a maljunulo diris, ke tiu, kiu ne povas kanti tian kanton, ne estas ŝe-o. En la historio de 2 000 jaroj ili kreis en sia lingvo milojn kaj dekmilojn da popolkantoj, kiuj cirkulas de generacio al generacio. Ĉiuj povas kanti kantojn pri la historia legendo de ŝe-nacieco, krom amantoj. Ili esprimas sin per kantoj ne nur en la festaj tagoj, sed ankaŭ en ĉiutaga vivo kaj kamlaboro.

La ŝe-a kanto ĝenerale konsistas el 4 versoj, kun 7 ideogramoj por ĉiu verso. Ĝi havas harmonian melodion kaj severajn

rimojn kaj estas kantata per falseto. La kantoj estas prezentataj en solo, interkantado, unisono, kanono k.a. kaj la enhavo viveca kaj riĉa.

La Novjara Tago estas la plej granda festo de la ŝe-oj, kaj interkantado estas la plej verva sceno en la festo. Kiam venas gasto al iu ajn hejmo, ĝojas la tuta vilaĝo. Se la gasto estas virino, eliras por interkantado viroj de la vilaĝo. Se la gasto estas viro, eliras virinoj por tiu celo. Ili alterne kantas kun la gasto ĝis tagiĝo. Se ne estas gajninto en la nokta interkantado, ĝi do daŭras en la sekva tago. Post la kantado, la mastroj kompleze regalas la gaston kaj donacas al li ruĝan saketon kun monbiletoj ene por esprimi sian dankon pro lia kantado. La monsumo en la saketo varias laŭ la nivelo de kantado de la gasto.

Interkantado estas unu el la amo-esprimaj manieroj de la ŝe-

aj gejunuloj. Junulinoj trovas sian amaton en interkantado dum laborado. En festaj tagoj ili donacas al la amato belan koloran rubandon mem teksitan el silkaj fadenoj. Post kiam la geamantoj ricevis konsenton de la gepatroj, la familio de la junulo petas svatanton iri al la familio de la junulino por ge-fianĉiĝo.

La svatanto ĝenerale estas prestiĝa kaj kompetenta kantisto. Veninte al la hejmo de la junulino, li faras svatadon per kantoj. Ankaŭ la gepatroj de la junulino kante respondas al li. Se la gepatroj konsentas pri la edziniĝopeto, ili do akceptas la donacon kaj difinas la daton por "ekzameni la bofilon". Se ili ne konsentas, ili rifuzas per ĝentila kanto, kaj la svatanto devas reveni kun la donaco.

La "ekzamenado al la bofilo" iras en la vilaĝo de la fianĉino. Unue la junulinoj de la vilaĝo

*Knabinoj en kantado*





Ŝe-aj knabinoj

kaj la “bofilo” reciprokas kantojn tra la tuta nokto. La junulinoj prezentas al li malfacilajn demandojn unu post alia. La fianĉino, sin kaŝante en angulo, observas la respondadon de sia fianĉo. Ifoje, ankaŭ la patrino de la junulino donas demandojn al sia “bofilo”. Post kiam ŝi estas kontenta pri liaj respondoj, ŝi permesas al sia filino renkontiĝi kun la junulo kaj lasas ilin reciproki kantojn.

Post la gefianĉiĝo la gepatroj de la junulo kaj junulino anoncas la ĝojigan informon al siaj parencoj kaj amikoj, kaj tiel la afero estas agnoskita de la socio. Ĝenerale, ili neniam bedaŭras la gefianĉiĝon. La fianĉiniĝinta junulino ĝenerale ne plu amikiĝas kun viroj kaj ankaŭ ne vidiĝas kun la fianĉo, eĉ kiam li gastas en ŝia hejmo, ĝis la edziniĝo.

La doto estas simpla. Oni dotas sian filinon ĝenerale per ŝranko, vestokesto kaj aliaj mebloj, kaj ankaŭ per laboriloj, ki-

aj sarkilo, plugilo kaj falĉilo. La nupta ceremonio estas simpla. Kelkajn tagojn antaŭ la geedziĝo, la fianĉo portas sian donacon al la familio de la fianĉino, sciigas al ili, ke estas finita la edziĝa preparo, kaj interkonsentas pri la nuptodato.

Bonvenigo al la novedzino estas kulmino de la nupto. La novedzo devas inviti homon kompetentan kaj en kuirado kaj en kantado kiel sian akompananton por bonvenigi la novedzinon. Kiam ili atingas la hejmon de la novedzino, la mastroj fervore invitas ilin en sian domon kaj regalias ilin festene. Strange, estas nenio sur la festena tablo. Tiam la novedzo devas kanti por surtabligi la manĝilaron kaj manĝaĵojn. Ekzemple, la novedzo kantas pri manĝbastonetoj, la akompananta kuiristo kante respondas kaj elprenas la bastonetojn, poste la novedzo kantas pri vino kaj pladoj, la kuiristo surtabligas ilin laŭ peto.

La novedzo kantas, la kuiristo kante respondas kaj surtabligas la bezonatajn objektojn unu post alia. Post la festeno la novedzo denove kantas kaj la kuiristo kantante deprenas la objektojn de sur la tablo unu post alia.

Tiam la plorado de la novedzino en alia ĉambro estas aparte interesa. Kvankam edziniĝo estas ĝojiga afero, tamen la junulino ĉagreniĝas pro forlaso de la hejmo. Ŝi plorante kantas pri la flegado far siaj gepatroj, pri la frateco inter siaj gefratoj kaj la amikeco inter siaj junaj kamaradinoj. . . Ju pli ŝi kantas, des pli ŝi malĝojiĝas, kaj ŝi ploradas ĝis plena elĉerpiĝo de siaj fortoj. Tiam la akompanantaj junulinoj ŝin vestas per novaj vestoj, ornamas ŝin per ruĝaj floroj, por ke ŝi vidiĝu kun la novedzo.

En la hejmo de la novedzino la novgeedzoj riverencas unu al la alia, poste genuas al la prapatra templo kaj fine adiaŭas la gepatrojn kaj parencojn. Forlasinte la domon de la novedzino, la novedzo antaŭiras kaj lin sekvas la novedzino, ĉiu kun pluvombrelo en la mano. Survoje la novgeedzoj reciprokas kantojn kaj baldaŭ venas al la vilaĝo de la novedzo.

Atinginte la hejmon de la novedzo, la novedzino unue genuas al la bogepatroj, poste al la prapatra templo. La nupta ceremonio okazas en la domo de la novedzo. La mastroj festene regalias la gastojn. Post la festeno estas kantkunveno. Ĉiuj, ĉu junuloj ĉu maljunuloj, gaje kolektiĝas kune. Iuj reciprokas kantojn, aliaj kantas solaj. En la domo regas varma atmosfero. Ĉiuj ĉeestantoj plezure sin amuzas ĝis la tagiĝo. Ili kune matenmanĝas ĉe la mastroj, kaj tiel finiĝas la nupto. □

# RAKONTO PRI LA LIBRO “JI ĜING” KAJ ĜIA AŬTORO

*La aŭgura libro “Ji Ĝing” interesas multajn legantojn. Nia brazila leganto Izabel Santiago skribis al ni kun propono, ke ni konigu tiun ĉi libron en EPC. Jen artikolo verkita de fakulo.*

La Red.

Estis kvin klasikaj verkoj, kiujn la intelektuloj de la antikva Ĉinio devis studi senescepte. Ili estas “Ji Ĝing” (verko pri aŭgurado), “Ŝang Ŝu” (kolekto de historiaj dokumentoj), “Libro de Poezio” (elektita kolekto de antikvaj popolkantoj), “Etiketo” (kolekto de diversaj verkoj pri etiketo antaŭ la dinastioj Ĉin (221-207 a.K.) kaj Han (206 a.K. -220 p.K.), kaj “Printempo kaj Aŭtuno” (kroniko pri la periodo inter 722-481 a.K.)

“Ji Ĝing” estas libro pri aŭgurado kun filozofiaj pensoj de la antikva Ĉinio. En la libro konserviĝas grandnombraj historiaj materialoj pri la regno Ĝoŭ, kiuj prezentas la tiamajn politikon, militaferon, socion, ekonomion kaj aliajn. La libron verkis Ĝji Ĉang, kies filo nomis lin Reĝo Ŭenŭang de Ĝoŭ-dinastio, gvidanto de Ĝoŭ, sklavsistema regno en la 11-a jc. a.K. Tiam Ĝoŭ estis dependa regno de Ŝang. En verkado de “Ji Ĝing” li spertis malfeliĉan historion. Legendo diras, ke en politika batalo li estis malliberigita kaj verkis la libron.

La reĝo Ĝoŭŭang de Ŝang-dinastio estis tirano ekstreme di-boĉema kaj kruela. De longe li kovis en si malkonfidon kaj mal-

kontenton al Ĝoŭ-regno pli kaj pli potenciĝanta kaj subtenata de la popolanoj. Tiam okazis akcidento: La filino de Ĝiŭ Hoŭ, altrangulo de Ŝang-kortego, estis

prenita de la tirana suvereno kiel lia kromedzino. Tamen ŝi estis ne flatema al li kaj estis mortigita. La akcidento implikis ankaŭ ŝian patron. Alia kortegano



E Hoŭ flamiĝis pro la maljusta ago de la tirano kaj eldiris kelkajn justajn vortojn en la ĉeesto de la reĝo. Pro tio E Hoŭ estis ekzekutita. Ankaŭ Ĝji Ĉang opiniis tion maljusta, tamen li ne kuraĝis prezenti sian opinion. Li nur suspiris. Ĉong Hoŭhu, lakeo de la tirano, informiĝis pri tio kaj denunciis lin al la tirano pri la afero kalumniante, ke Ĝji Ĉang intencas ribeli kontraŭ la kortego. Sekve, la tirano ŝetis Ĝji Ĉang en la malliberejon de la urbo Joŭli, ĉe la rivero Joŭŝuj.

La tirano ne tuj mortigis sian politikan malamikon, sed anstataŭe torturis lin: Li mortigis la plejaĝan filon de Ĝji Ĉang, ordonis prepari buljonon el lia karno kaj devigis Ĝji Ĉang manĝi la buljonon. Tiam Ĝji Ĉang, 82-jara, eltenis multan humiliĝon, diligente studis pri la aŭgura arto, utiligante la 7

jarojn en la malliberejo. Legendo diras, ke la prahistoria sanktulo de Ĉinio Fuŝji kreis aŭguradon Ok Trigramoj (ok signoj por aŭgurado). Surbaze de tio Ĝji Ĉang disvolvis la aŭguradon en 64 Trigramojn kaj 384 *jaŭ*-ojn (*jaŭ*-oj estas horizontalaj strekoj longaj kaj mallongaj konsistigantaj la trigramojn).


La libro "Ji Ĝing", nun ekzistanta, konsistas el du partoj: "Ĝing", (klasikaĵo) kaj "Ĝŭan" (klarigoj). La filozofiaj pensoj de la libro fundamente havas tri flankojn: Unue, la koncepto, ke bildo estas prenata laŭ objekto. Ĝi elektis 8 ofte vidatajn materiajn fenomenojn kiel bazon por klarigi ceterajn objektojn en la mondo: Iliaj reprezentaj enhavoj kaj signoj estas jene: Ĉielo (*ĉjan* ☰), tero (*kun* ☷), tondro (*ĝen* ☳), fajro (*li* ☲), vento (*ŝjun* ☱), lageto (*duj* ☵), akvo (*kan* ☶), monto

(*gen* ☶). Inter ili la ĉielo kaj tero estas rigardataj kiel la ĝenerala fonto kaj gepatroj, de kiuj devenas ses gefiloj — tondro, fajro, vento, lageto, akvo kaj monto. Li abstrakte ĝeneraligis variajn kaj komplikajn objektojn per du fundamentaj kategorioj: negativo (—) kaj pozitivo (—), opiniante, ke la reciproka efiko de negativo kaj pozitivo elfontigas la universon. Tial ĉiu objekto estas regata de la ĝenerala principo — negativo kaj pozitivo. Ĝuste pro tio, ĉiuj du trigramoj (ekz. ☰ kaj ☷, ☷ kaj ☰) el la OK Trigramoj estas kontraŭstaraj. Ĉiuj du formas unu paron kaj de tio estiĝas la 64 trigramoj kaj 384 *jaŭ*-oj. Tio estas naiva materialisma vidpunkto pri estiĝo de la universo, kaj havis profundan influon sur la disvolviĝo de la postaj filozofio kaj sciencoj.

Due, la koncepto pri la reciproka influo de la universalaj objektoj. La universalaj objektoj, movate kaj malhelpate de la negativaj kaj pozitivaj fortoj, ŝanĝiĝas kaj disvolviĝas pere de sia reciproka influo. Ni prenu kiel ekzemplon la feliĉan trigramon. Ĝenerale dirite, la supra kaj malsupra trigramoj havas trajton de reciproka influo, dum la malfeliĉa trigramo ne havas trajton de reciproka influo je la supra kaj malsupra trigramoj. Jen sub la mantelo de religia superstiĉo la aŭgurado montras naivajn dialektikajn pensojn.

Trie, la koncepto pri evoluo kaj ŝanĝiĝo. Ni prenu kiel ekzemplon drakon en la trigramo "ĉjan" (☰). Ĝi montras, ke antaŭeniĝo kaj retiriĝo ĉiam kune ekzistas por la afero, tiel same estas por gajno kaj perdo, glato kaj malglato. La afero kaŭzos al si kontraŭan rezulton atinginte certan stadion kaj transiros al

Joŭli, la plej frua malliberejo de Ĉinio



sia antipodo. Legiĝas en la 93-a jaŭ-o de la trigramo *taj* “Sen ebena ne estas deklivo, sen alveno ne estas reveno”. Tio aludas, ke ĉiu ajn afero povas transformiĝi en sian kontraŭon, kiam ĝi atingas sian ekstremon. En tio kaŝiĝas dialektika vero. Tial tiu ĉi libro estas legata de generacio al generacio.

En 1066 a.K. t.e. la kvaran jaron post la morto de Ĝji Ĉang, lia dua filo Ĝji Fa (poste la Reĝo Uŭang de Ĝoŭ-dinastio) asociis aliajn dependajn regnojn de Ŝang kaj kolektiĝis en Muje (la nuna Ĝjiŝjan-gubernio, Henan-provinco) por ĵuri batali kontraŭ la reĝo Ĝoŭŭang de Ŝang-dinastio. Ili publikigis la krimojn de la kruela tirana reĝo de Ŝang-dinastio, denuncante, ke li ne kultas siajn prapatrojn, ne konfidas siajn parencojn, kaj ŝirmis krimulojn de diversaj lokoj, kio vekis la komunan malamon ĉe la asociataj regnoj. En la batalo la armeoj de la tirana reĝo turnis la lancpinton kontraŭ la tirano, kaj fine la alianca armeo konkeris la ĉefurbon de Ŝang-dinastio Ĝaŭge (la nuna Ĝjiŝjan-gubernio de Henan-provinco). La tirana reĝo sin bruligis. Tiel pereis Ŝang-dinastio, kaj fondiĝis la Okcidenta Ĝoŭ-dinastio. Poste la urbo Joŭli fariĝis unu el la plej fruaj ŝtataj karceroj konataj en la ĉina literaturo. Kaj plie, la urbo fariĝis fama historia kultura loko pro tio, ke tie la reĝo Ŭenŭang de Ĝoŭ-dinastio estis malliberigita kaj plenumis la verkadon “*Ji Ĝing*.”

La ruino de la urbo situas 4 kilometrojn norde de la gubernia urbo Tangjin, Henan-provinco. La ruino, 106 metrojn longa de sude norden kaj 103 metrojn larĝa de oriente okcidenten, kovras 10 918 kvadratajn metrojn.



*Loko, kie Ŭenŭang eksplikis “Ji Ĝing”*

Ĝi estas je 5 metroj pli alta ol la tersurfaco. Sub ĝi kuŝas la ruino de Longŝan-kulturo\* kun riĉaj historiaj objektoj. En ĝia suda parto staras alta ŝtona arkado kun tri ideogramoj sur si, kiuj signifas “Lokon de Aŭgurado”. Ambaŭflanke de la arkado staras po unu ŝtona steleo. Ili estis konstruitaj en 1474 kaj 1543 respektive, sur la unua legeblas la vortoj “Urbo Joŭli de la Reĝo Ŭenŭang de Ĝoŭ-dinastio”.

Sur la alta teraso norde de la arkado majestas la Templo de la Reĝo Ŭenŭang. Ĉe la supro de la ŝtuparo vidiĝas la templa pordo delikate farita. Interne de la pordo sin trovas vasta korto, kie bonorde staras domoj kaj multaj steleoj, prosperas antikvaj cipresoj. La medio estas kvieta kaj gracia. La ĉefa halo staras meze de la korto. En la halo estis kultata la statuo de la reĝo Ŭenŭang de Ĝoŭ-dinastio, kiu tamen estis cindrigita en milito, 1942. Okcidente de la halo staras duetaĝa domo kun

tri ĉambroj, 10 metrojn alta, konstruita sur brika bazo pli ol unu metron alta. Sur la lintelo estas bluŝtona tabulo kun ĉizitaj vortoj “Teraso por Aŭgurado” sur si. La halo estis rekonstruita en la 16-a jc. Oni diris, ke tie siatempe faris aŭguradon Ĝji Ĉang. En la korto troviĝas multaj ŝtonaj steleoj, kiuj plejparte estas farigitaj de postaj imperiestroj, korteganoj kaj generaloj por montri ilian respekton al Ĝji Ĉang, kaj iuj notis rekonstruon kaj riparadon de la templo. La plej okulfrapa estas steleo kun 64 trigramoj de “*Ji Ĝing*” kaj iliaj klarigoj en la mezo de la korto. □

\* *Longŝan-kulturo* — kulturo en la posta periodo de neolitiko en Ĉinio, antaŭ pli ol 4 000 jaroj. Ĝi estis trovita unuafoje en la urbeto Longŝan de Ĝangĉiŭ, Ŝandong-provinco, en 1928. Pro tio ĝi ricevis la nomon. La kulturaj ruinoj troviĝas en la meza kaj malsupra basenoj de la Flava Rivero.

# Gardi arbaron kontraŭ incendio

La arbara incendio ofte okazanta sur la terglobo jam vekis grandan atenton de ĉiuj landoj. Ĉijare en Usono, Kanado, Ĉinio kaj Sovetio okazis arbaraj incendioj. Koncernaj specialistoj opiniis, kiel gardi la arbaran riĉfonton kontraŭ incendio aŭ kiel redukti ĝian damaĝon jam fariĝis grava problemo urĝe solvenda por tiuj landoj, kiuj posedas arbaran riĉfonton.

Arbara incendio, precipe la grandarea, estas rigardata kiel unu el la plej seriozaj naturaj katastrofoj en la nuna mondo. Ĝi povas ne nur cindrigi vastan

arbaron en mallonga tempo, sed ankaŭ mortigi grandan kvanton da bestoj kaj plantoj, kio serioze detruas la ekologian ekvilibron. Tial la damaĝo kaŭzita de arbara incendio estas malfacile taks-ebla. Laŭ statistiko, en la arbaroj de 3.7 miliardoj da hektaroj de la mondo okazas incendio 200 000 fojojn ĉiujare. Precipe la arbara incendio de la mondo okazinta en aprilo kaj majo ĉijare estas malofte vidita en la historio en la nombro, forteco kaj tempodaŭro de la incendio kaj en la vasteco de la forbruligita arbaro. Ĉijare en majo, arbara incendio okazis en la Gran-

da Ŝing'an-montaro de Ĉinio kaj daŭris pli ol 20 tagojn. La incendio atakis arbaron de 650 000 hektaroj. En la postbajkala regiono de USSR okazis en aprilo arbara incendio, kiu bruligis arbaron de 200 000 hektaroj en daŭro de 30 tagoj. La 13-an de majo en Peten de Gvatemalio de Latinameriko okazis incendio, kiu forglutis praarbaron de 2 000 kvadrataj km. En la nordo de Miĉigano kaj la nordokcidento de Oregonio de Usono okazis dufoje arbara fajrego en majo, kiu forbruligis arbaron de 25 000 hektaroj. Nordoriente de la urbo Winnipeg kaj en la norda Saskatchewan de Kanado la kvar arbaraj incendioj, kiuj okazis antaŭ nelonge, detruis arbaron de 89 000 hektaroj.

*Estingado de incendio en la Granda Ŝing'an-montaro*



Enketoj montris, ke la arbaraj incendioj okazis pro naturaj kaj homagaj faktoroj. El la naturaj faktoroj ĉefe estas fulmo. Laŭ statistiko, la ofteco de fulmotondroj super la arbara regiono estas centoble kiom super la oceano. Se arbaron trafas fulmofrapo, tuj leviĝas brulo. En la mondo ĉiujare okazas ĉ. 20 000 fulmofrapaj bruloj. Sed la plejparto de la arbaraj fajregoj estiĝis pro neperfektaĵoj de fajroprevento, neglekto aŭ sencio de koncernaj laborantoj pri fajroprevento. La nombro de la fajregoj kaŭzitaj de homa ago estas naŭoble pli granda ol

tiu pro fulmofrapo. En la mondo okazas ĉijare 180 000 arbaraj fajregoj estigitaj de homoj.

Incendio estas feroĉa malamiĉo de la arbaroj. Tial oni devas alpreni efikajn rimedojn preventi kaj estingi fajron por maksimume redukti la damaĝon de incendio al arbaro.

Kanado, kies arbara areo kovras 44% de la tuta teritorio, tre atentis pri protekto de arbaroj. Ĉiu provinco havas sistemon de arbara fajroprevento kun diversnivela administrado, fajropreventan centron, respondecantan pri projekto, budĝeto, materiala liverado de fajroprevento, uzado de fajroestingaj aeroplanoj kaj homaj fortoj. En la arbara fajroprevento kaj fajroestingo la sistemo plene ekspluatas la avantaĝojn de aeroplanoj. Ĝi havas modernajn komunikajn rimedojn

kaj sistemon de antaŭsciigo de arbaraj fajregoj, nombron da spertaj kaj bone trejnitaj fajropreventaj kaj fajroestingaj trupoj kaj sufiĉecon da materialoj. Hispanio alprenis metodojn forigi herbojn kaj veprojn por malpliigi bruligeblaĵojn, disvolvi edukajn aktivadojn pri fajropreventaj scioj kaj starigi praktikan fajroestingan sistemon. Ĝi havas landan antaŭsciigan sistemon por ĉiutage fari kontrolon super arbara fajro. Krome, ĝiaj ĉefaj arbaraj regionoj ĉiuj havas sian fajropreventan stacion provizitan per diversaj modernaj fajroestingaj ekipaĵoj. En 1966 la franca registaro publikigis dekreton, kiu detale difinis regularon pri arbara protekto kaj fajroprevento. En la fajroza sezono malpezaj aeroplanoj faras periodan kontrolon. Francio de longe metis sian grandan atenton sur fajroestingaj

ekipaĵoj, kontrolo de fajro kaj komunika reto pri fajro. En Aŭstralio ofte okazas arbara fajrego. Ĝi aplikas la plej efikan kaj plej simplan rimedon por redukti bruligeblaĵojn, nome ĵeti bruligajn botelojn per malpezaj aeroplanoj por levi brulon en antaŭdifinitaj lokoj kaj izoli fajregon. Nun, ankaŭ Usono kaj Tajlando aplikas tiun praktikan kaj efikan rimedon.

Post la arbara incendio de la Granda Ŝing'an-montaro, ankaŭ Ĉinio aplikis pli praktikan kaj pli efikan rimedon en prevento, antaŭsciigo kaj estingo de arbara fajrego.

Sed nun en la tuta mondo ankoraŭ mankas plej efika rimedo kontraŭ arbara fajrego. Tial la plej grava kaj plej radikala rimedo estas preventi fajregon kaŭzitan de homaĵoj. □

## KORESPONDI DEZIRAS

\* Novaj geesp-istoj de nia ĉijara kurso dez. kor. kun tutmondaj gesamideanoj. Adr.: Grupo de Esperanto I. B. Seneca./Avenida Menendez Pidal s.n. /E-1400 4 Cordoba/Hispanio.

\* 15-j. Gyula Vass dez. kor. tm. pri muziko, sporto, kalendaretoj, glumarkoj ktp. Adr.: 4150 Odorheiu-Secuiesc, Bd. Independentei n-ro 36; ap 10, Rumanio.

\* 21-jara knabino dez. kor. tm. kaj interesiĝas pri lingvoj, muziko, bildkartoj de urboj, pri moroj, tradicioj alilandaj. Adr. Silke, Dirk Radloff, Bergstr. 31, 2757 Schwerin, DDR.

\* Nova sekcio de esperantistoj handikapitaj en Ĉeĥoslovakio ser-

ĉas korespondantojn tutmonde. S-ino Olga Novakova, Foerstrova 13, 779 00 Olomouc, Ĉeĥoslovakio.

\* 23-j. Denes Paitay dez. kor. kun ĉinaj knabinoj (17-23j.) kaj interesiĝas pri elektroniko, muziko, turismo kaj Esperanto. Adr.: Kaposvar, Damjanichu, 1/1, 111/2, H-7400, Hungario.

\*Klub MPiK (Esperanta Sekcio), ul. Westerplatte 19, 65-034 Zielona Gora, Pollando deziras kunlabori kun ĉiuj kluboj, grupoj kaj izolitaj esperantistoj. Ni sendos Esperantan informilon al ĉiuj volontuloj.

\* Kolektantojn de pm stampoj, etiketoj pri Esperanto serĉas tutmonde Manfred Granitz, Ernst Schneller Str. 87, 9091 Karl Marx Standt, DDR.

\* 5-j. Michal KALKOWSKI dez. kor. kun ĉinaj amikoj. Adr. ul. Sucha 18, Szkota Podstawowa, 98-204 Sucha k/Sieradzo, Pollando.

\* Estona fraŭlino dez. kor. kun ĉinaj esperantistoj pri medicinaj popolkuracadoj. Adr. CCCP/USSR-Estonia, 200034 Tallinn, pk. 907, A.K. Piiskop.

\* 29-j. kuracisto serĉas korespondamikon en Ĉinio precipe pri akupunkturo. Adr. Mudr Ludek Zemanek, 43400 Most, Jiraskova 1794, Ĉeĥoslovakio.

\* 20-j lernantino dez. kor. tm. Adr. Helena Tamaliunas, Travessa Colonia, 36 BR-91050, Porto Alegre, RS, Brazilo.

# Ambaŭborde de Ĝinŝa-rivero

Teksto de DA ŬEJ

Fotoj de CAJ HAJFENG

Laŭ la arbara zono Ĝongdjan, la larĝa Ĝinŝa-rivero torente kuras suden, kaj post cent kilometroj ĝi atingas la urbeton Ŝigu de la naŝi-a aŭtonoma gubernio Liĝjang kaj ŝanĝas sian direkton je 180 gradoj.

## LA UNUA KURBIĜO DE JANGZI-RIVERO

Ĉi tie estas la fama Unua Kurbiĝo de Jangzi-rivero. Sur la


deklivo de monteto ĉe la kurbiĝo sidas antikva malgranda urbeto Ŝigu (Ŝtona Tamburo). Ĝi ricevis la nomon pro la tamburforma steleo el blanka marmoro ĉe la piedo de la monto.

La unua farenda afero post la veno al la urbeto estis vizito al la Ŝtontambura Kiosko kvarangula kaj duetaĝa. Sur la soklo meze de la kiosko staras ronda steleo kun diametro de 1.5 metroj kaj diko de duonmetro. Pro


la formo la steleo estis nomata ŝtona tamburo. Ĝi estis starigita en 1561, kun gravuritaj poemoj sur ambaŭ flankoj. La poemoj ĉefe laŭdas la meritojn de la estro de tribo Mu en bataloj kun aliaj naciecoj. Pro veterdetruo la gravuritaj ideogramoj sur la ŝtona tamburo estis difektitaj kaj malfacile legeblaj.

Malgranda ligna ŝtuparo post la ŝtona steleo kondukas al la supra etaĝo ĉirkaŭita de balustrado. Tie oni povas vidi la Unuan Kurbiĝon de Jangzi-rivero, la kviete fluantan akvon kaj salikaron sur la bordo.

Post la vizito al la kiosko mi venis al la urbeto. Maro da tegolaj tegmentoj estas retigitaj de altaj kaj malaltaj zigzagaj stratoj el ŝtonplatoj. Apud iu strato staras antikva scenejo, multe pli luksa ol la domoj de la urbanoj. La loko estas trafike grava por la naŝioj, tibetanoj, bajoj, lisuoj kaj primioj. Multaj alilokaj komercistoj venis por fari negocon kaj fiksloĝis tie. En la lastaj jaroj multe pli vigliĝis la foiro, kiu okazas en la tria, sesa kaj naŭa tagoj de ĉiu tagdeko. Al la foiro venas loĝantoj ambaŭborde de Ĝinŝa-rivero por inter-







*Kanjono de Ĝinŝa-rivero*

ŝanĝi objektojn, ĉefe agrikultu-rajn produktaĵojn.

## HUTJAŬ, LA PLEJ PROFUNDA KANJONO

35 kilometrojn malsupre de la urbeto Ŝigu laŭ la rivero, inter du neĝaj montoj, estas profunda kanjono, kiu nomiĝas Hutjaŭ.

Ĉe la enirejo de la kanjono mi renkontis naŝi-on kaj ni iris en kompanio. Li loĝas en la kanjono kaj ofte elportas volframan ercon per muloj por vendi. Sonoriletoj sub la kolo de la muloj tintadis dum la irado.

La kanjonon Hutjaŭ kreis Ĝinŝa-rivero inter la neĝaj montoj Julong kaj Haba. Similaj al gigantaj pordoklapoj, la du montoj cedis nur mallarĝan trairejon, kie la rivero Ĝinŝa subite mallarĝiĝas kaj sovaĝiĝas torentante en la mallarĝan trapasejon.

La krutega neĝa monto Julong 5 000 metrojn super la marnivelo sude de la rivero estas la plej suda moderna oceana glaci-rivero en la norda hemisfero. Ĝiaj sendegelaj montpintoj eten-

diĝas 35 kilometrojn kontinue. La unika vojo por eniri en la kanjonon zigzagas ĉe la talio de Haba-monto norde de la rivero. Unuflanke estas krutaĵo, sub kiu muĝas la torenta rivero, kaj supre fendoplenaj ŝtonegoj kva-zaŭ falontaj en ajna momento. Kiel timige!

La kanjono Hutjaŭ longas 16 kilometrojn kaj la niveldiferenco estas 200 metroj. Oni diras, ke la elektroprodukta povo de la rivero povas atingi 2.9 milionojn da kilovattoj. La kanjono dividiĝas en tri partojn, nome la Supra, Meza kaj Malsupra Hutjaŭ. En la kanjono estas 13 danĝeraj malprofundaĵoj kaj la fluo ialoke estas nur 30 metrojn larĝa. La distanco inter la montosupro kaj la rivero estas 3 900 metroj. Meze en la rivero ĉe la Supra Hutjaŭ kuŝas giganta ŝtono nomata Supra Hutjaŭ. Legendo diras, ke iam tigro transsaltis la riveron pere de la ŝtono. Pro tio la kanjono akiris la nomon Hutjaŭ, kiu en la ĉina lingvo signifas "salto de tigro". La roko malhelpas la torenton kaj la akvo forte frapas la rokon kaj dividiĝas en du fluojn.

Trairinte la Supran Hutjaŭ, mi kaj la naŝi-o disiĝis kaj mi prenis alian vojeton. Ĉe vesperiĝo la deklivo fariĝis pli kaj pli milda kaj la vojeto multe larĝiĝis. Mi venis al domoj ĉe la monto-talio. Tie estas la sidejo de la subdistrikta registaro sub la gubernio Ĝongdjan. Iu membro de la registaro diris al mi, ke en la subdistrikto loĝas pli ol 100 familioj en la Meza kaj Malsupra Hutjaŭ. En 1986 la ĉina flosgrupo de Jangzi-rivero kampadis tie, kaj en kaj ekster la lignaj dometoj pasloĝis multaj flosistoj kaj ĵurnalistoj. Kelkaj el ili martiriĝis dum flosado en la kanjono Hutjaŭ.

Mi pasigis neordinaran nokton en la kanjono en akompano de la senĉesa muĝado de la rivero.

## ANTIKA URBO LIĜJANG

Sude de la neĝa monto Julong, nemalproksime de Ĝinŝa-rivero, estas la naŝi-a aŭtonoma gubernio Liĝjang. La rivero havas sian 447-kilometran parton en la gubernio, kie loĝas pli ol 300 000 homoj, el kiuj pli ol 60% estas naŝi-oj.

Irinte en la gubernian urbon, vi povas tuj trovi, ke la plej okulfrapaj estas vestornamoj de la naŝi-aj virinoj. Ili ĉiuj portas bluan nankenon kostumon kun nigra aŭ blua antaŭtuko kaj surdorse T-forman ŝafledon kun sep broditaj steloj simbolantaj la konstelacion Granda Ursino. Sub ĉiu stelo pendas fasko da blankaj fadenoj signifanta lumon de la stelo. Laŭdire, iliaj ornamaĵoj simbolas, ke ili laboras diligente eĉ sub la steloj kaj la luno.

Liĝjang estas antikva urbo kun la aĝo de 700-800 jaroj. La urbeto ĉirkaŭita de montoj, je



*Naŝi-a maljunulino faranta silkan rubandon*

2 400 metroj super la marnivelo, okupas 1.4 kvadratajn kilometrojn. Fontakvo alkondukita de sude fluas en tri ĉefaj kanaloj kaj sennombraj kanaletoj, kiuj trairas la tutan urbon. Oni vidas, ke sur ĉiu strato kaj antaŭ ĉiu domo fluas akvo. Iuj butikoj ja kuŝas sur kanaletoj kiel palafito. La urbanoj lavas legomojn kaj vestojn en la fluo.

En la mezo de la urbo estas kvadrata placo ĉirkaŭita de interpuŝaj butikoj en la gusto de antikveco. Tie kvar ĉefaj stratoj kunligas ĉiujn stratetojn en la urbo. Ambaŭflanke de la stratoj estas duetaĝaj domoj el ligno kaj tero, kies teretaĝo servas kiel butikoj kaj la supra etaĝo kiel loĝejo. Preskaŭ antaŭ ĉiu domo gajigas papago. La nomoj de la butikoj estas tre in-

teresaj, ekzemple restoracio "Malfermita Pordo", gastejo "Maljuna Tritiko" k. s. La butikoj de kukoj sendas agrablan odoron tre malproksimen. Mi rimarkis, ke iliaj knedtabuloj estas faritaj el marmoro, kaj la pavimo de la stratoj grandaj kaj malgrandaj el koloraj ŝtonplatoj propraj al Liĝjang. Ĉu en pluva ĉu en suna tago, la stratoj estas ĉiam puraj. Pro la paŝado de la homoj en la pasintaj centoj da jaroj, la vejnoj de la ŝtonplatoj evidentiĝis kaj post pluvo fariĝis pli klaraj kaj buntaj.

La regiono Liĝjang ĉe la limo de Siĉŭan, Tibeto kaj Junnan estis probatalata de kelkaj grandaj naciecoj en la historio. Tamen la nacieco naŝi restas ĉiam vigla kaj prospera dum longa tempo pro tio, ke ĝi atentis asimili la avangardajn kulturojn kaj produktajn teknikojn de aliaj naciecoj dum la interkomunikiĝo kun ili. Tion ekzemplas la freska arto de Liĝjang, la kunfandiĝo de la artoj de la han-oj, tibetanoj kaj naŝi-oj. Estis bedaŭrinde, ke mi ne povis rigardi la valoran artaĵon pro la riparo. Krom tio, la naŝi-oj kreis ankaŭ sian propran antikvan dongba-an kulturon (Bv. legi la artikolon "Antikva Dongba-a Kulturo", n-ro 4, 1987, EPC).

Mi aŭdis, ke la naŝi-oj havas plurajn orkestrojn el melomanoj. Kun granda intereso mi intervjuis maljunulan orkestron de antikva muziko en Bajhŭa-subdistrikto. Enirinte en korton, mi vidis domon sen fenestro, pordo kaj fasado. En la domo dekkelkaj maljunuloj kun muzikiloj ludis "Maljunulo ĉe Klara Rivero" kaj "La Sezonoj". La muzikiloj estis ĉefe blovaj, kordaj kaj perkutaj, tradiciaj por Ĉinio. La plej aĝa el la ludantoj superis 80 jarojn kaj la plej juna jam

estas 50-jara. Plejparto de ili estas kamparanoj kaj kelkaj estas instruistoj. Ili tre amas muzikon, kaj cetere, pro la maljuneco ili ne plu zorgas pri dommastrumado, ili do fondis la orkestron. La membroj de la orkestro kunvenas ĉiun dimanĉon. Kelkfoje ili surbendigas sian ludon por mem ĝui kaj interkonsiliĝi pri altigo de ludarto. Sur la muroj de la domo pendas mapoj, kaligrafitaj versaĵoj kaj ankaŭ fotoj kaj skribaĵoj de fremdlandaj vizitantoj.

La naŝi-oj ĉiam zorgas pri la disvolvo de metiartoj. Antaŭ longe tie jam aperis metioj de kupraĵo, ledoj, peltoj, teksado, feraĵo, kudro, arkitekturo, skulpturo, bambua plektaĵo k. a.

En la eksponejo de la gubernia tanejo mi vidis diversajn peltojn kaj peltajn vestojn, kiuj estas brilaj, molaj, senodoraj kaj plezuraj por la manoj. Gvidanto de la tanejo informis min, ke la tanejo fondita antaŭ 30 jaroj surbaze de 2 000 jŭanoj, dekoj da laboristoj kaj tri kudriloj havas 1.7 milionojn da fiksa kapitalo kaj 300 laboristojn. La tanejo ĉiujare faras 35 000 pecojn da ledoj kaj 150 000 pecojn da peltoj de dekoj da specoj, kaj la totala produktovalorato atingis 2.05 milionojn da jŭanoj. Nun la tanejo jam fariĝis unu el la ĉefaj prilaborejoj de eksportataj peltaĵoj kaj ledaĵoj de Junnan-provinco.

En Liĝjang mi vizitis ankaŭ fabrikojn de naciecaj metiartaĵoj, ceramikaĵoj, vino kaj naciecaj kostumoj. Nun en la gubernio estas ĉ. 80 industriaj entreprenoj, kies totala produktovalorato atingis 30 milionojn da jŭanoj. En la pasintaj jaroj granda ŝanĝiĝo okazis al la ekonomio kaj kulturo de la loko. □



*La pitoreska parko Hejlongtan en Liĝjang*


Foto de DA ŬEJ



*La torenta Ĝin-  
ŝa-rivero en la  
kanjono Hutjaŭ*



*Šigu, la Unua Kurbi-  
ĝo de Jangzi-rivero*





*Sur strato de Liĝiang*  
Foto de DA ŬEJ



*Maljunula orkestro  
de naŝi-nacieco*

*La neĝa monto  
Julong ĉe Ĝinŝa-  
rivero*



# LIBREJOJ NE-ESPERANTAJ EN BELGIO

## AKCEPTAS MENDOJN DE

### E-LIBROJ ELDONITAJ DE EPĈ



Laŭ informo de Eldonejo kaj Librejo Sonorilo (Doornstraat 22, 2610 Wilrijk, Belgio), la subaj librejoj (ne-esperantaj) en Belgio nun akceptas mendojn de E-libroj eldonitaj de El Popola Ĉinio. Aliflanke, Eldonejo kaj Librejo Sonorilo mem, same kiel antaŭe, ankoraŭ akceptas mendojn de tiuj samaj libroj.

Het Volk (Aalst Brugge, Dendermonde, Eeklo, Gent, Hasselt, Kortrijk, Ieper, St. Niklaas, Tongeren kaj Turnhout)

Boekhandel Spectator (Izegem)

Boekhandel De Nieuwe Gids (Roeselare)

Standaard Boekhandel (ekz. en: Aalst, Aalter, Aarschot, Antwerpen, Asse, Diest, Eeklo, Geel, Gent, Halle, Hasselt, ktp.)

Delta (Wilrijk)

Ulenspiegel (Antwerpen)

Veritas (Antwerpen)

Van Geel en Cie (Herentals)

Boekhandel Van Sande (Herentals)

Levet Scone (Ieper)

Acco (Leuven)

Van In (Lier)

Internationale Boekhandel (Oostende)

Hernieuwen Uitgaven (Roeselare)

Wase Boekhandel (St. Niklaas) Edel

(Ingelmunster)

Boekhandel Corman (Bruxelles) Europese Boekhandel (Bruxelles)

Simon Stevin Boekhandel (Bruxelles)

Librairie Goedert (Namur)

Ciuj mendantoj bonvolu ĉiam mencii, ke viaj mendoj temas pri Esperantaj libroj.

## 1987, REKORDA JARO POR FUNKCIIGI GENERATOROJN EN ĈINIO

La elektroprodukta povo de Ĉinio en 1987 kreskos je ses milionoj da kilovattoj.

Tio starigos novan rekordon en la historio de la ĉina elektra industrio, je kvinono pli granda ol en 1985 kaj 1986, en kiuj oni produktis plej multe da elektro.

En 1987 Ĉinio ekfunkciigos pli ol 50 novajn generatorojn, inkl. du generatorojn, ĉiu kun kapacito de 320 000 kilovattoj, de Longjang-ŝja-hidroelektrejo sur la Flava Rivero, kvin generatorojn, ĉiu kun kapacito de 125 000 kilovattoj, de Daĝjang-elektrejo ĉe la akvobaraĵo Geĝoŭba sur Jangzi-rivero kaj novajn generatorojn de la hidroelektrejoj Juziŝji, Ĝinŝujtan kaj Hongŝi respektive en Siĉŭan-, Ĉeĝjang-kaj Ĝjilin-provincoj. Videble, en 1987 Ĉinio funkciigos plej multe da generatoroj.

*Konstruata hidroelektrejo ĉe Hongŝuj-rivero de Ĝuangŝji*



En 1987 Ĉinio havos pli ol dek novajn termoelektrajn generatorojn, ĉiu kun produktopovo de pli ol 200 000 kilovattoj. La termoelektra generatoro kun kapacito de 300 000 kilovattoj farita de Ĉinio mem unuafoje per importita avangarda teknologio ekfunkciis jam en la unua duono de 1987 en Ŝiheng, Ŝandong-provinco.

## GRANDA MONSUMO POR REFORMI LA MALPEZAN INDUSTRION DE ĈINIO

Ĉi-jare Ĉinio asignas 1.23 miliardojn da jŭanoj al la teknika reformado de sia malpeza industrio.

La monsumo estas uzata ĉefe en produktado de konsumaĵoj koncernantaj la popolan vivon kaj produktado de eksportotaj varoj, inkl. produkton de mangaĵoj, porfamiliaj elektraj aparatoj, led-ŝuoj, ceramikaĵoj kaj metiartaĵoj, sume en proksimume mil entreprenoj. La uzado de la monsumo havas jenajn karakterizaĵojn: pli da

investo por produktado de varoj mankantaj al kaj urĝe bezonataj de la merkato; investo al produktado de varoj facile vendataj kaj kvalite eminentaj; altigo de kapablo de asimilo, novo-kreo kaj disvolvo; akcelo de ŝanĝo de la strukturo de la apudmara malpeza industrio en tiun de al-ekstera ekonomio; kaj redukto de la investo por entreprenoj aŭ varoj influataj de la merkato kaj krudmaterialoj.

## NOVA LASERA APARATO EKSPERTIZITA

1.52-mikrometra helium-neona Zeemana frekvence stabiligita lasera aparato kune farita de la Ĉina Mezurscienca Instituto kaj la Pekina Poŝt-Telekomunika Instituto sukcese trapasis ekspertizon en Pekino. Ĝi ŝtopis la mankon de Ĉinio en la kampo de optikfibra komunikado kaj markis ke la tiurilata esploro de Ĉinio atingis la avangardan nivelon de la mondo.

La optik-fibra komunikado estas nova teknologio disvolvita kun lasera esplorado kaj aplikado. La radioj produktitaj de la nova lasera aparato povas servi kiel kohera lumfonto por optikfibra komunikado. Oni komparis ĝin kun alilanda 0.633-mikrometra lasera aparato kaj trovis, ke iliaj ĉefaj funkcioj kaj normoj estas egalaj. Fakuloj opinias, ke originalaj estas la strukturo kaj metodo de farado de la nova lasera aparato kaj ĝia frekvence stabiligita rega cirkvito, kaj ke la aparato kun stabila frekvenco povas esti longe uzata.

## LAKŜPRUCIGAJ ROBOTAJ PRODUKTITAJ EN ĈINIO

Jam proviĝis la kvar lakŝprucigaj robotoj de tipo PJ-I faritaj de la Pekina Instituto pri Aŭtomacio de Industriaj Maŝinoj sub la Ĉina Maŝina Komisiono. Ili estas la



unuaj porindustriaj robotoj po-grande produktitaj de Ĉinio.

La lakŝpruciga roboto de tipo PJ-I regata per mikromaŝino havas artikohavan aranĝaĵon de kvin liberaj gradoj movatan per elektro. Per ĝi oni povas fari kaj ripeti demonstradon. Kun granda komputilmemoro ĝi povas ŝprucigi lakon en malsamaj rapidecoj. Ĝi bone funkcias eĉ je 0° C. La skalo de ĝia sinkrona frekvenco estas granda. Ĝi kostas nur trione kiom alilanda samspeca roboto.

Oni informis, ke fabrikoj de Hindio, Singapuro kaj Hongkongo mendis tiajn robotojn.



### **BRULEGO EN PRIMITIVA ARBARO DE LA GRANDA SING'AN-MONTARO**

Je la 6-a de majo 1987 okazis eksterordinara arbara brulego en la Granda Sing'an-montaro, nord-orienta Ĉinio. La brulego daŭris 28 tagojn kaj estingiĝis la 2-an de junio. Laŭ statistiko, la fajro kovris 1 010 000 hektarojn, el kiuj ĉ. 70% estas arbara areo. La

incendio forbruligis domojn de 614 000 kvadrataj metroj, inter kiuj preskaŭ du trionoj estis loĝdomoj. La brulego detruis kvar kaj duonan ligno-tenejojn, naŭ forstokulturejojn, 855 000 kubmetrojn da konservata ligno, 3 250 tunojn da greno, 67 pontojn kaj tunelojn, 9.2 kilometrojn da fervojo, 483 kilometrojn da komunika linio kaj 284.2 kilometrojn da transsenda lineo kaj suferigis pli ol 50 000 homojn, el kiuj 193 viktimiĝis kaj 226 vundiĝis.

Kontraŭ la brulego batalis 58 800 armeanoj, arbaraj kaj kontraŭincendiaj policianoj, fajrestingistoj, milicianoj, forstistoj kaj loĝantoj. Ili uzis artefaritan pluvon el aviadilo, fajrestingajn kemiaĵojn kaj ventenergiajn fajrestingilojn kaj faris fajrizolajn zonojn. La brulego home farita komenciĝis en kvar lokoj. La Ŝtata Konsilantaro de Ĉinio punis koncernatojn, ekzemple, ĝi eksigis Jang Ĝong, la ministron de forsto, kiu faris gravan eraron de burokratismo.

*Li Peng (dekstre), vicĉefministro de la Ĉina Popola Respubliko, faras dispozicion por la savlaboro en la katastrofita arbara regiono de la Granda Sing'an-montaro.*



*Industria roboto en laboro*

### **EKKONSTRUITA EN PEKINO LA VILAĜO POR LA 11-a AZIA SPORTKUNVENO**

Antaŭ nelonge okazis en Pekino la solena ceremonio pri konstruado de la sportista vilaĝo por la 11-a Azia Sportkunveno okazonta septembre de 1990.

La vilaĝo situas en la norda antaŭurbo. Ĝi kovras 30.5 hektarojn. La konstruo ampleksas du hotelojn kun 6 000 litoj, kvin pensionojn, distran centron, garaĝojn kaj aliajn. Samtempe oni ekkonstruis tie ankaŭ la ofidomegon por la organiza komitato de la azia sportkunveno kaj la gaze-taran centron.


### **TREZOROJ ELTERIGITAJ EN ŜENŜJI**

Lastatempe oni malkovris grandan kvanton da trezoroj en la subtera ĉambro de Famentemplo, Ŝenŝji-provinco. Tio estas alia grava arkeologia trovo post la malkovro de la terakotaj soldatoj kaj ĉevaloj ĉe la maŭzoleo

## PERSPEKTIVO DE LA CINA-ITALA KUNLABORO PRI ENERGIO

Sub la aŭspicioj de la Ministerio de Eksteraj Aferoj, la Ministerio de Ekstera Komerco kaj la Ministerio de Industrio, Komerco kaj Metiindustrio de Italio kaj la Ministerio de Nuklea Industrio kaj la Ministerio de Akvomastromado kaj Elektra Energio de Ĉinio, oni okazigis la prelegon "La Fabrikado kaj Mastromado de Italaj Elektraj Ekipaĵoj" de la 21-a ĝis la 23-a de majo en la hotelo Granda Muro, Pekino. Samtempe oni inaŭguris la ekspozicion "Italaj Departementoj pri Energio". Tio celas komenci la ĉina-italan kunlaboron pri energio.

Ĉinio kaj Italio bone kunlaboris tiurilate en la pasinteco. Laŭ la ĉina politiko pri energio, ambaŭ landoj havas vastan perspektivon de kunlaboro por termo- kaj hidro-elektrejoj, akvopumpa elektrejo, ventenergia elektrejo, tervarma elektrejo, alttensia lineo kaj desulfiga teknologio.



*Ora pagodo kun perlo ĉe la supro, konservujo por restaĵoj de Sakjamunio*

de la Unua Imperiestro de Ĉindinastio en la sama provinco.


El la elterigitaj objektoj la plej valoraj estas kvar fingrostaj fragmentoj de Sakjamunio rigardataj de la budhistoj kiel sanktaĵo. En la subtera ĉambro kun areo de 31.48 kvadrataj metroj oni trovis ankaŭ 120 oraĵojn kaj arĝentaĵojn, 17 vitraĵojn, ĉ. 400 juvelojn kaj jadaĵojn, 16 porcelanaĵojn, 12 ŝtonajn objektojn, 19 lakitajn lignajn kaj alispecajn objektojn, 16 feraĵojn kaj multajn silkaĵojn.

Inter la oraĵoj kaj arĝentaĵoj troviĝas stanita arĝenta promenbastono kun longeco de 1.96 metroj, arĝenta pelvo kun du teniloj kaj diametro de 45.5 centimetroj, orumita tetrinkilo kun desegno de sovaĝansero kaj orumita arĝenta forno kun figuro de testudo kaj desegno de lotusfloroj, kiuj ĉiuj estas raraĵoj unuafoje trovitaj.

La ĉi-foje elterigitaj silkaĵoj kvalite kaj teknologie multe superas tiujn malkovritajn en la pasintaj pli ol 30 jaroj.

La elterigo de pli ol 20 glazuritaj pladoj, teleroj, bovloj kaj vazoj estis grava malkovro de glazuraĵoj dum la pasintaj pli ol 30 jaroj.

*Reprezentantoj de la konferenco pri energia kunlaboro de Ĉinio kaj Italio*




ĈINAJ POŝTMARKOJ

Poŝtmarkoj pri ĉinaj raraj animaloj



de ĜJI ŜING

En Ĉinio vivas multegaj specoj da animaloj, kaj la ŝtato tre atentis la protektadon al raraj animaloj, donante garantion en juro kaj financo. Nun en Ĉinio establiĝis diversaj rezervejoj por efike protekti tiujn animalojn. La poŝtmarkoj ĉi tie montras animalojn ĉefe protektatajn de la ŝtato: tiuj pri pando emisiitaj la 15-an de januaro 1973, tiuj pri orhara simio emisiitaj la 25-an de septembro 1963, tiuj pri ruĝverta gruo emisiitaj la 10-an de junio 1962 kaj tiuj pri tigro de nordorienta Ĉinio emisiitaj la 20-an de julio 1979.



81574

*Liĝang-rivero en subiranta suno*

Foto de **ZENG SJANGMIN**